


V-19034/1903

EL *Popola*  
**ĈINIO**

N-ro 2

MARTO-APRILIO 1966





Baza oksigena  
fornego konstruita mem de  
la Pekina Ŝingŝan-a Fer-  
ŝtala Kompanio

*Foto de Vang De*



# LA SPIRITO DE DAKING

*Multaj amikoj, kiuj vizitis Ĉinion aŭ ekspozicion pri la ekonomiaj atingoj de Ĉinio kaj scias la realan staton en nia lando, kaj precipe tiuj kiuj scias ankaŭ la staton de la malnova Ĉinio, profunde impresiĝis pri la impeta disvolviĝo de la ekonomia konstruado kaj scienco kaj teknikoj de Ĉinio. En la pasinteco, Ĉinio estis tiel mizera kaj tre longe suferis agresadon kaj prirabadon fare de imperiismo, sed en la mallongaj pli ol 16 jaroj post la Liberiĝo, ĝi jam sukcesis prosperigi sian nacian ekonomion, rimarkinde plibonigi la vivon de la tuta popolo kaj per siaj propraj fortoj atingi avangardan nivelon de la mondo en iuj sciencaj kaj teknikaj kampoj. Iuj trovas tion ĉi afero nekomprenebla.*

*Sed fakte estas nemalfacile tion kompreni, kaj vi solvos la enigmon, se vi nur akiros konon pri la spirito de Daking, kiun la ĉina popolo klopodas lerni kaj disvolvi nuntempe.*

*Kio estas la spirito de Daking? Mallonge dirite, ĝi estas la spirito, per kiu la laboristoj kaj oficistoj de Daking konstruis sian novan petrolkampon, alivorte, la spirito konstrui la landon sin apogante sur la propraj fortoj, strebi energie al prospero, pene lukti kontraŭ malfaciloj kaj konstrui la landon kun laboremo kaj ŝparemo.*

*La konstruantoj de Daking-petrolkampo komencis sian laboron ĝuste en la tempo, kiam Ĉinio frontis plej grandajn malfacilojn kaj plej seriozan mankon de petrolo post la Liberiĝo. Tiam oni klopodis devigi nin formeti la revolucian ruĝan standardon, nin sufokante per ĉesigo de petrol-vendo al ni. Per lernado de verkoj de Prezidanto Maŭ Zedong, la konstruantoj de Daking ekkomprenis, ke tio ĉi koncernas la gravan demandon, ĉu oni persistu en batalado kontraŭ imperiismo kaj konduku la socialisman revolucion ĝis la fino aŭ ne. Por la revolucio, ili donis tute senrezervan jeson al tiu demando kaj decidis puŝiĝi antaŭen sed ne sin retiri, spite al kiom ajn grandaj malfaciloj kaj kiom ajn malfavoraj kondiĉoj.*

*Je la komenco, vere nemalmultajn malfacilojn renkontis la dekmiloj da konstruantoj de Daking. Kiam ili amase venis sur la konstruejon, ili havis nur la bluan ĉielon super la kapo kaj la vastan stepon sub la piedoj, kaj krome ankaŭ la neĝoŝtormoj kaj terura frosto tre malfaciligis la viv- kaj labor-kondiĉojn. Sed la laboristoj kaj oficistoj decidis venki la malfacilojn kaj malcedi al penigado kaj solvi la radikalan malfacilon de la patrio en manko de petrolo, per la spirito de la Malsaĝa Avo, kiu translokigis du montegojn dank' al sia persistemo.*

*Venko ja ĉiam apartenas al tiuj, kiuj kuraĝas kaj lertas en konduko de revolucio. Post 2-3-jara intensa luktado, ili jam konstruis Daking en grandan petrolkampon, kiu povas provizi Ĉinion per granda kvanto da petrolo.*

*Same kiel la industria konstruado, tiel iras ankaŭ la konstruado de agrokulturo, komerca kaj financa laboroj kaj la laboroj de kulturo, edukado kaj scienco kaj teknikoj. Per tiu ĉi spirito, la ĉina popolo sin liberigis el sub la subpremado de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo, kaj nun ĝi estas per ĝi plirapidiganta sian socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon kaj klopodanta realigi la Trian Kvinjaran Planon, alte tenante plu la kontraŭimperiisman standardon.*

*La Red.*



*Prezidanto Maŭ ĝoje interparolas kun la aŭtoro.*

# Prezidanto Maŭ, Ni Diversnaciaj

## Popoloj Varme Amas Vin!

KURBAN TULUM

### I

Mi estas unu el la ujuguraj kamparanoj nombrigitaj je kelkaj milionoj. Same kiel tiu de la aliaj klasaj fratoj, mia vivo estis plena de sango, larmoj kaj malamo antaŭ la Liberiĝo. Mia patro estis dungita terlaboristo de Kurban Haĝi kaj mia patrino servistino ĉe la terposedanto. Kaj mi fariĝis sklavo de tiu terposedanto tuj post mia naskiĝo. En mia infaneco miaj gepatroj jam mortis unu post la alia pro la ekstreme peza vivo ĉe la terposedanto. Kiam mi havis 7-8 jarojn, mi komencis falci herbojn kaj fari aliajn laborojn. En mia deka jaro mi zorgis por li la ĉevalon. Kiam

la mastro volis fari vojaĝon, mi devis surgenuiĝi ĉe la ĉevalo per unu gambo, tiel ke li povu surpaŝi miajn genuojn kaj ŝultron por surseliĝi. Li estis grasa kiel porko, kaj mi ofte estis faligita sub lia peza treto. Tiam mi devis rapide leviĝi por denove servi al li kiel ŝtono por surĉevaliĝo. Kiam la ĉevalo kuris, mi devis plenforte postsekvi. Post ĉiu longa vojaĝo miaj kapo kaj ŝultroj ofte estis plenaj de vipsignoj. Alveninte la cellokon, la mastro amuziĝis kaj diboĉis en la domo kaj ankaŭ la ĉevalo havis antaŭ si bonan furaĝon, sed mi povis nur plori apud la trogo kun malplena stomako.

Kaj la suferoj en mia vivo kreskis kun la jaroj antaŭ la Liberiĝo. En mia 25-a jaro, foje la mastro

ordonis min falĉi mil ligaĵojn da fragmitoj en iu senhoma sablejo. Mi devis foresti 15 tagojn, sed la mastro donis al mi nur 6.5 kilogramojn da maiza faruno. Dumtage, mi laboris en la fragmitaro altā pli ol homkresko, la varmeĉo kaj malsekeco sufoke kaj brule turmentis. Dumnokte, la moskitoj svarme pikis mian tutan korpon. Mi kovris la plejparton de mia korpo per sablo, sed la vizaĝo kaj brusto ankoraŭ ne povis eskapi de la pikado, tiel ke mi ne povis dormi la tutan nokton. Kiam mi estis malsata, mi knedis la farunon kun la maldolĉa akvo el kavaĵoj de la fragmitejo por kuiru farunbulaĵojn. La manĝaĵo jam tre frue forkonsumiĝis antaŭ ol la laboro estis plenumita. Tiam mi povis min vivteni nur per sovaĝaj fruktoj kaj laboregis tutforte. Kiam mi revenis hejmen, mi tiel malgrasiĝis ke mi jam tute perdis la formon de homo. Sed, la mastro ne estis kontenta pri miaj falĉaĵoj, kaj post forta batado li ĵetis min en la karceron, kiu profundis pli ol du homojn kaj estis malvarma kaj malseka. Oni povis nur stari en ĝi, sed ne sidi. Tie mi restis 8 tagojn kaj preskaŭ perdis mian vivon.....

## II

En 1949, la Popola Liberiga Armeo venis al la gubernio Jutian kaj liberigis nin el la homa infero. Sed, tiutempe ni ne kuraĝis alproksimiĝi al la PLA-anoj pro la trompado kaj kalumnioj de la terposedantoj. Poste, la PLA-anoj surportis sterkokorbon kaj *kantuman*\* sur la ŝultro sur kiu ili portis pafilon, kaj helpis nin en sterkokolektado, plugado kaj brulligna hakado. Ili manĝis kun ni el la sama kaldrono kaj klarigis al ni la veran kaŭzon de nia mizero. De tiam mi eksciis, ke la PLA-anoj estas ankaŭ terkulturistoj kiel ni kaj estas niaj fratoj. Jen, mi renkontas miajn proprajn fratojn! Dum kelkaj tagoj mi elverŝis miajn traspertitajn amaraĵojn el mia koro. Dum la agrara reformo ni luktis kontraŭ la terposedantoj kaj ilin renversis. Ni fine nin supren turnis kaj mi ricevis 14 muojn da tero kaj unu bovon. Por pluraj noktoj mi kaj mia maljunulino ne povis endormiĝi pro ĝojego. Ni ŝtele iris al la kampo, levis plenmanon da tero kaj ĝin kisis kaj kisis. Ni rigardadis kaj rigardadis la bovon, senĉese larmante kaj ne volante ĝin forlasi.

Dum la agrara reformo mi unuafoje eksciis, ke la Partio kaj Prezidanto Maŭ estas la savantoj de ni diversnaciaj popoloj. Kaj en tiu tempo mi ekhavis la deziron lin viziti. Mi aŭdis ke Prezidanto Maŭ loĝas en Tian-anmen, Pekino, kaj mi tuj petis iun skribi por mi leteron al la Prezidanto. De tiam mi intense min preparis por la vojaĝo. Kiam maturiĝis abrikotoj, mi faris sekabrikotojn, kiam maturiĝis persikoj, mi faris sekpersikojn.

Kiam maturiĝis dolĉaj melonoj, mi konservis la plej grandajn kaj plej bonajn. Kaj mi ŝparis monon por vojaĝi al Pekino.

Tiutempe mi ne sciis, kiom fore estas Pekino de mia hejmo. Mi aŭdis nur ke la distanco estas tre longa, sed mi pensis, kiom ajn longa estas la vojaĝo, mi ja devas viziti nian savanton. Fine de la jaro 1952, mi kelkfoje ekrajdis mian azenon por vojaĝi al Pekino kun la sekaj abrikotoj kaj persikoj kaj la dolĉaj melonoj. Sed, ĉiufoje mi estis retenita de lokaj funkciuloj. Ili diris al mi, ke oni ne povas atingi Pekinon rajdante sur azeno. Foje la guberniestro venis al mia hejmo rajdante sur ĉevalo, kaj mi provis prunti de li la ĉevalon por entrepreni mian vojaĝon al Pekino. Kiam mi survoje renkontis aŭtomobilon, mi ankaŭ provis peti la ŝoforon kunporti min al Pekino.

## III

En somero de 1958, fine venis al mi la ŝanco por viziti Prezidanton Maŭ en Pekino.

En la tago kiam mi ricevis la sciigon, mi estis falĉanta herbojn kaj paŝtis azenon sur herbejo. Informiĝinte ke oni sendos min al Pekino, mi estis tiom ĝojigita ke mi tute forgesis la azenon kaj falĉitajn herbojn kaj rapidegis al la hejmo. Mi enpakis la de antaŭe pretigitajn abrikotajn kernojn, sekajn fruktojn, heliantajn semojn kaj hejme teksitan kalikoton en sakon, penante kiel eble plej multe plenigi ĝin. Eĉ se pli granda estus la sako kaj pli ŝvele ĝi pleniĝus, mi ne povis enmeti en ĝin mian tutan senton, kiun saman havis la popoloj de la diversaj nacioj! Mi surmetis miajn novajn vestojn kaj babildis kun mia maljunulino pri la pasinteco kaj la nuntempo, ĝis elkrepuskiĝis nerimarkite. Tiam mi forlasis mian hejmon kun la sako kaj la unua anoncis mian alvenon ĉe la gubernia registaro.

En la 28-a de junio 1958 mia revo fine realiĝis. Prezidanto Maŭ donis al ni aŭdiencon. Ni estis fotitaj kune kun li. Li eĉ alproksimiĝis al mi. Dufoje mi premis lian manon kaj ne volis ĝin ellasi. Kiam mi estis hejme kaj survoje, mi havis tiom multe por diri al Prezidanto Maŭ. Sed, nun starante antaŭ li, mi ne povis elbuŝigi eĉ unu frazon. Varmaj larmoj nereteneble ruliĝis el miaj okuloj kaj mi nur emocie prezentis al li miajn kunportitajn donacaĵojn.

## IV

De kiam mi persone vidis Prezidanton Maŭ, al mia koro malfermis du grandaj fenestroj, tiel ke ĝi fariĝis pli granda kaj pli luma. Antaŭe en mia koro estis nur mia hejmo, mia tero kaj mia

\* *Terkultura instrumento uzata de la ujguroj.*

kooperativo. Dum la longega vojaĝo de miloj kaj miloj da kilometroj de Jutian al Pekino mi ekvidis, kiom vasta estas la patrio, kiom belaj estas niaj montoj kaj riveroj, kaj kiom bone konstruita estas la lando. En mia koro enestis tiam nia patrio kaj mi ekhavis la ideon pri aliĝo al la Partio. Tion mi komunikis al la partia organizo de la Rondvizita Grupo. Tiam iuj diris al mi: "Prefere lasu tion, vi estas tro maljuna." Tio tre ĉagrenis min. Veninte al Urumĉi mi forrazigis mian blankan barbon kaj pensis ke nun oni ne povas diri ke mi estas tro maljuna.

Nelonge post mia reveno al la Komunumo, mi denove prezentis mian deziron aliĝi al la Partio al la partia filio kaj la Partia Komitato de la Komunumo. Kiam mi renkontis iujn funkciulojn, mi petis ankaŭ ilin montri al mi miajn mankojn. Mi diris: Montru al mi la mankojn kaj mi volonte ilin eliminos, sed oni ne devas rifuzi mian aliĝon al la Partio pro mia maljuneco. Mi aĉetis librojn pri la Programo de la Partio kaj la ok kondiĉoj de kompartiano. En tago mi laboris kaj en vespero mi petis mian filon, kiu vizitis lernejon, legi por mi la librojn, por ke mi agu laŭ la libroj.

En la 5-a de julio 1959, realiĝis mia plej alta revo, la partia organizo akceptis min en la Partion! De tiu tago mi fariĝis kvazaŭ alia homo, mi ekhavis kvazaŭ senfinan energion. Vespere, reveninte al mia hejmo, mi longe staris antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ. Mi diris al la Prezidanto: Prezidanto Maŭ, nun mi fariĝis kompartiano, kiu estas sub via gvidado! Kiom mi deziras vin revidi kaj raporti al vi miajn laborojn.

En oktobro de la jaro mi efektive havis ŝancon duafoje viziti la Prezidanton en Pekino.

## V

Post la aliĝo al la Partio, mia sento al Prezidanto Maŭ estis jam alia ol antaŭe. La antaŭa Kurban Tulum estis homo kiu sentis dankemon kaj amon al sia bonfarinto. Nun mi estas batalanto de la proleta klaso kaj kara kamarado de Prezidanto Maŭ. La granda afero de socialismo kaj komunismo gvidata de Prezidanto Maŭ fariĝis mia batalcelo de mia tuta vivo.

Nun mi havas 82 jarojn. La gvidantaj kamaradoj konsilas al mi multe ripozi. Sed mi ne povas, mi volas plejeble multe fari por la Partio, socialismo kaj la revolucio! Mi ne povas partopreni la laborojn sur la kampoj, mi do plenforte faras kion mi povas: amasigi sterkon por la laborgrupo. Por tiu celo, sole kolektadi fekaĵojn ne sufiĉas. Kiam mi rondvizitis en Gansu-provinco, mi lernis de la hanaj fratoj la metodon de preparado de sterko el herboj. En la lastaj jaroj, dum la herbokreskaj sezonoj, mi ĉiutage eliris kun ŝnuro,

falĉilo kaj azeno por falĉi herbojn kaj kreskaĵojn kune kun mia maljunulino. La reportitajn herbojn kaj kreskaĵojn mi distranĉis apud la fosaĵo por fermentado. Dum tranĉado mi ofte forgesis pri manĝado kaj ripozo. Kiam mi venis en la ĉambron alvokite al manĝado, ofte mi reeliris por labori ankoraŭ kelkan tempon, ĉar vidinte la portreton de Prezidanto Maŭ mi forgesis la lacon kaj malsaton. Mia maljunulino ne sciis la kialon kaj grumbliis, ke mi malsaniĝis pro maljuneco. Mi devis klarigi al ŝi, ke vidante Prezidanton Maŭ, kiu tiom zorgas nin laborulojn, mi ne povas ne klopodi pli multe labori por nia kolektivo. Ĉar ĉiujare mi preparis multe da sterko por la produkta grupo, la komunumanoj nomas nian hejmon "sterko-preparejo" de la grupo.

## VI

Mi estas membro de la Kongreso de Popolaj Reprezentantoj de nia aŭtonoma regiono, tial mi sentas ke mi havas devon movi miajn fratojn malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kune lukti por socialismo, eterne sekvante la Partion kaj Prezidanton Maŭ! Mi devas bone eduki la junulojn kune kun ili.

Antaŭe mi ankaŭ helpis miajn mizerajn fratojn, kiuj kune suferis kun mi, kiam ni estis dungitaj terlaboristoj de terposedanto. Mi dividis kun ili vestaĵojn kaj manĝaĵojn. Sed mi tion faris nur pro simpatio por solvi ilian ekonomian malfacilon. Mi ne pensis helpi ilin levi sian klasan konscion. Efektive, ankaŭ mi tiam ne havis klaran kapon. De post mi vidis Prezidanton Maŭ kaj aliĝis al la Partio, mia penso ŝanĝiĝis. Por helpi aliajn oni devas helpi ilin je la penso. En la lastaj jaroj, okaze de novjaro aŭ aliaj festtagoj, mi ofte invitis fratojn malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn por kunbabiladi. En Kurban-festo de la antaŭlasta jaro, mi buĉis ŝafon de mi mem breditan por regali miajn malnovajn kunulojn dungitajn terlaboristojn. Kunmanĝante ni rememorigis niajn antaŭajn amaraĵojn. Lastjare kamarado Vang Enmaŭ, la unua sekretario de la Partia Komitato de la Aŭtonoma Regiono, donacis al mi kvanton da teo, kiam li min vizitis. Mi dividis ĝin kun la 25 familioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kiam ili dankis min en tiaj okazoj, mi ĉiam diris: Ne danku min. Ni memoru la pasintecon kaj komparu ĝin kun la nuno. Se ni volas danki, danku ni la Komunistan Partion kaj Prezidanton Maŭ!

Ho Prezidanto Maŭ, la idoj de la diversaj popoloj de Hingiang poreterne vin varme amos! Kaj de generacio al generacio ili antaŭenmarŝos sekvante vin!

*(Redaktita laŭ la rakontado de la maljunulo.)*

# La Usona Popolo Vekiĝis


*Nia Raportisto*

**L**A heroaĵo ke la 82-jara usona esperantistino s-ino Alice Herz sinbruligis en marto, 1965, por protesti kontraŭ la agresmilito farata de la Johnson-registaro kontraŭ Vjetnamio, jam vekis eĥojn de diverslandaj esperantistoj, kaj ankaŭ atentojn de la tutmonda popolo. Ĉar tio montris la vekigon de la usona popolo, kaj ne estis hazarda okazaĵo.

En la pasinta jaro, la usona popolo sin organizis en senĉese sinsekvajn protestojn kaj manifestaciojn kontraŭ la agresiva milito en Vjetnamio fare de la Johnson-registaro kaj ĉiam pli grandaj fariĝis iliaj skalo kaj influo. En la tri tagoj de la 15a ĝis la 17a de oktobro, la oponado de la usona popolo kontraŭ la agresado en Vjetnamio ondegis tra ĝia tuta lando, pli ol centmil usonanoj de multaj urboj, grandaj kaj malgrandaj, spite de subpremado de policistoj kaj perforta malhelpado de kanajloj, okazigis en la sama tempo grandajn manifestaciojn, alte tenante flagojn kaj tabulojn kun surskribitaj sloganoj "Tuj Finu la Militon

en Vjetnamio!", "Ĉesigu la Militon de Johnson!", "Kontraŭ la Imperiisma Milito!", "For de Vjetnamio, Usonaj Trupoj!", kriante laŭte sloganojn kaj kantante en ĥoro, montris sian volon kaj forton. La 27an de novembro, dekmiloj da popolanoj el pli 40 ŝtatoj de Usono denove okazigis grandan marŝon de protesto al Vaŝingtono. En la antaŭtagmezo de tiu tago, proksimume 30,000 personoj formis densajn homringojn ĉirkaŭ la Blanka Domo, la oficejo de la usona prezidanto, kaj poste okazis ankaŭ protesta mitingo antaŭ la Vaŝingtona Monumento, en kiu partoprenis 50,000 personoj. La marŝantoj venis el diversaj socitavoloj de Usono, inter kiuj troviĝis ankaŭ 800 delegitoj el 140 porpacaj grupoj partoprenantaj en la Tutlanda Paca Kongreso en Vaŝingtono, kiuj interrompis sian diskuton kaj sin vicigis inter la marŝantojn. La justa kontraŭmilita agado de la usona popolo komplete frakasis la mensogon de Johnson, ke la agresiva milito kontraŭ Vjetnamio estas "aprobata kaj subtenata" de la popolo.

*Brave antaŭen marŝas la usonaj manifestaciaj amasoj kun alte tenataj standardoj de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio (la maldekstra) kaj la Demokratia Respubliko de Vjetnamio.*





*La 17-an de apr. 1965 25,000 usonanoj faris protestan marŝon en Vaŝingtono kontraŭ la agresmilito.*

Jam en la 7-a de februaro, 1965, kiam Johnson senskrupule deklaris ekbombadon kontraŭ la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, multe da usonanoj okazigis protestan manifestacion por oponi tiun kriman decidon. Sekve de la paŝopostpaŝa plivastigo de la agresa milito kontraŭ Vjetnamio fare de la Johnson-registaro, en marto, la profesoroj kaj gestudentoj de la Universitato de Michigan komencis refuti la diversajn mensogojn fabrikitajn de la Johnson-registaro por plivastigi la agresan militon kontraŭ Vjetnamio, kaj oponi ĝian politikon de agresado kontraŭ Vjet-

namio, per "Postkursa Simpozio", montrante la faktojn kaj sin pravigante per racia rezonado. La 17-an de aprilo, 25,000 personoj okazigis en Vaŝingtono grandajn manifestaciojn dum tri tagoj, formante la unuan tajdon de oponado kontraŭ la agresa politiko kontraŭ Vjetnamio. En majo, oni okazigis en Vaŝingtono tutlandan Forumon, en kiu partoprenis kelkaj miloj da personoj el la rondoj de la usona alta edukado, formante novan kulminon de la protestado kontraŭ la agreso en la sfero de usonaj altaj lernejoj. Dum la Forumo ĉirkaŭ 100,000 profesoroj kaj gestudentoj el pli ol 120 kolegioj

*La 6-an de aŭg. 1965 usonaj popolanoj faris protestan sidadon antaŭ la Blanka Domo, spite al minaco de policanoj.*



*La 12-an de aŭg. 1965 manifestaciantaj amasoj de Berkeley baris trajnon kiu transportis trupojn por agreso kontraŭ Vjetnamio.*





kaj universitatoj en 35 ŝtatoj de Usono rigardis kaj aŭskultis la debatadon pere de televido, radio-disaŭdigo kaj la reto de longdistanca telefono. En junio, oni okazigis en Novjorko protestan mitingon en kiu partoprenis 18,000 homoj kaj tie oni montris, ke la usona imperiisma sistemo estas la kaŭzo de la agresa milito kontraŭ Vjetnamio. En la mezo de tiu monato, 200 loĝantoj en Vaŝingtono invadis la Pentagonon — La Usona Defenda Ministerio, kaj disdonis 60,000 flugfoliojn postulantajn tujan retiron de la usona armeo el suda Vjetnamio. Pli ol 570 personoj el la usonaj rondoj de literaturo kaj arto, publikigis deklaron en *New York Times* de la 27-a de junio, dirante ke “Ni ne povas silenti antaŭ la ĉiam pli mal-kaŝa, malhumana politiko de diplomatio... Estas necese igi nian prezidanton scii ke liaj ‘pacaj’ vortoj estas neaŭdeblaj en la eksploda bruado de bomboj ĵetitaj sur Vjetnamion.” De la 6-a ĝis 9-a de aŭgusto, 2,000 homoj venintaj el 30 ŝtatoj manifestaciis en Vaŝingtono, esprimante sian volon doni al prezidanto Johnson deklaron kontraŭmilitan kun subskriboj de 7,000 personoj. La Johnson-registaro alprenis drastan rimedon de perforta subpremado kaj arestis 400 el la 2,000 personoj, kreante per tiu terura faŝista krimago la rekordan nombron de arestitoj en Usono pro kontraŭmilita aktivado post la Dua Mond-

milito. Sed la popolo perdis neniom da batalvolvo, kaj male, la perforta subpremado neeviteble vekis pli grandan kontraŭstaron. Ĝuste sur tiu ĉi bazo eksplodis la tutlandaj protestaj manifestacioj meze de oktobro.


Ĝuste tio ke la Johnson-registaro intensigis siajn paŝojn al plivastigado de la agresa milito kontraŭ Vjetnamio, ne nur alportis al la vjetnama popolo grandegan suferon, sed ankaŭ grandan katastrofon al la usona popolo. Senĉesa kresko de la militaj elspezoj por agresado kontraŭ Vjetnamio ĉiam pli multe pezigas la ŝarĝon al la usona popolo, kaj donas al la usona monopolista kliko bonŝancon subite pligrandigi sian riĉon. Miloj kaj miloj da usonaj junuloj estas pelitaj de la Johnson-registaro sur amasbuĉejoj, kaj miloj kaj miloj da usonaj hejmoj estas trafitaj de la tragedio de ruiniĝo kaj morto: patrinoj perdis siajn filojn, edzinoj la edzojn, kaj infanoj povos neniam plu revidi siajn paĉjojn. Ĉi tiuj tragedioj estas ja kaŭzitaj de la agresa kaj milita politikoj de la usona imperiismo!

Aliflanke, la Johnson-registaro freneze bombadis Vjetnamion, ŝprucigis venenan gason, disŝutis bakteriojn, masakris, senhautéigis homojn kaj elprenis iliajn korojn, perfortis virinojn, buĉis infanojn, virinojn kaj maljunulojn en suda Vjetnamio, ĉiuj ĉi tiuj teruraj faŝistaj krimagoj konigis al la usona popolo, ke la

*N. Morrison, la usonano kiu sin bruloferis je la 2-a de nov. 1965, antaŭ la domo de la Defenda Ministerio en Vaŝingtono, por oponi la agresadon de Usono.*

*La 20-an de nov. 1965, amasoj de Berkeley de Kalifornio marŝis kun alte tenataj slogantabuloj al la militbazo ĉe Oakland, kiu estas unu el la gravaj transsendaj stacioj por la usonaj agresantoj kontraŭ Vjetnamio.*

*Protestan manifestacion partoprenis eĉ maljunulino en radseĝo kun slogan-tabulo.*





*La 27-an de nov. 1965, 50,000 usonanoj kunvenis antaŭ la Monumento de Vaŝingtono por protesti la agresadon.*



*Usonaj junuloj ne volas fariĝi agresantoj! Jen ili publike bruligas siajn konskripciajn kartojn.*

agresa milito estas maljusta kaj la suferoj de la usonanoj kaj la vjetnamoj devenis de la sama fonto, nome la agresa kaj milita politikoj de la Johnson-registaro.

Tial, multe da usonaj junuloj atingintaj la aĝon de enarmeigado, timante nek enkarceriĝon, nek punlaboron kaj monpunon, nek ĉiajn faŝistajn persekutojn de la Johnson-registaro, forbruligis antaŭ la publiko siajn konskripciajn kartojn, firme rifuzis oferi sian vivon en la maljusta milito por la intereso nur de la usona reganta klico. Post s-ino Alice Herz, sinbruligis la 31-jara junulo N. Morrison, Roger

Laport — studento de la Universitato de Novjorko, s-ino Celene Jankowski k. a. por oponi kontraŭ la agresa politiko kontraŭ Vjetnamio fare de la Johnson-registaro. Ankaŭ usonaj negroj sinsekve esprimis, ke ili neniam iros militi kontraŭ Vjetnamio, sed restos en sia loko por batali por siaj rajtoj. Ilia forta protesto kredeble timigis kaj konsternis la Johnson-registaron.

La batalado de la usona popolo por oponi la agresan militon kontraŭ Vjetnamio ja tute ne finiĝis. Sekve de la intensigo kaj plivastigo de la agresa milito de la Johnson-registaro, la rezista fajro de la usona popolo certe brulos ĉiam pli arde. En la impeta fluo de oponado al la agresa milito kontraŭ Vjetnamio, usonaj blankuloj, negroj, portorikanoj, latinamerikdevenaj usonanoj, laboristoj, junuloj, studentoj, dommastrinoj, etkomercistoj, kolportistoj kaj personoj el la intelekta, literatura, arta kaj religia rondoj, ĉiuj ĉi tiuj homoj de malsamaj okupoj, socitavoloj, naciecoj, kredoj en politiko kaj religio jam sin organizis en impetan fluegon dum la protesta manifestaciado, koncentre esprimante la volon de la usona popolo oponi la agresan militon kontraŭ Vjetnamio, spegulate ĝian decidemon postuli finon al la milito en Vjetnamio kaj retiriĝon de la usona armeo el suda Vjetnamio.

Unu vasta fronto kontraŭ la agresa kaj milita politikoj de la Johnson-registaro pluapase formiĝas interne de Usono. Pli kaj pli multe da usonaj popolanoj jam vekiĝis kaj ekagis. En la vespero de la Novjartago, ĉijare, unu aeroplano de la usona popolo flugis super la marbazon de Long Beach ĉe Los Angeles kaj Amuzan Parkon de Disneyland kaj disĵetis malsupren grandan nombron da flugfolioj, por protesti kontraŭ la usona agresmilito en Vjetnamio, kaj kondamni la brutalan krimagon de la usona imperiismo en Vjetnamio. Tio montris, ke la usona popolo levos en la kuranta jaro, ankoraŭ pli potencajn protestajn manifestaciojn por montri sian grandan forton. Prezidanto Maŭ Zedong diris, “. . . estos pruvite ke same kiel ĉiuj reakciuloj en la historio, ankaŭ la usonaj reakciuloj ne havas multe da forto. En Usono estas aliaj homoj, kiuj estas vere fortaj, t. e. la usona popolo.” La vekiĝinta popolo de Usono certe fariĝos la tombofosanto por la usona imperiismo.

# Vakcino de Feliĉo

**N**UN estas jam eltrovita metodo de prevento kontraŭ morbilo, kiu serioze minacas la sanon de infanoj. Post longtempa studo de ĉinaj laborantoj pri viruso kaj biologiaj produktaĵoj, vakcino de malfortigita viva viruso de morbilo, nomata "Vakcino de Feliĉo", estas elfarita.

Frue en 1957, la Pekina Instituto de Biologiaj Produktaĵoj jam sukcese izolis la viruson de morbilo. Poste, la esplora laboro pri vakcino kontraŭ morbilo estis disvolvita en diversaj organizoj koncernaj en Pekino, Ĉangĉun, Ŝanhajo, ktp. La vakcino de alte malfortigita viva viruso de morbilo estas la rezulto de la multfojaj eksperimentoj de tiuj organizoj. Ekde 1962, la viva vakcino estis uzata en iuj lokoj por provo kaj observo. Laŭ la unua statistiko centmil infanoj estis vakcinitaj. La rezulto pruvis ke la vakcino estas sekura, kun reakcio malgranda kaj efiko bona. La reakcio de febro estis sub 5%, kaj la pozitiva reakcio de kontraŭkorpo, inter 91.5 kaj 98.7%. Ĉe la facile infekteblaj infanoj kiuj tuŝkontaktiĝas kun suferantoj de morbilo, la ofteco de malsaniĝo pro infekto estis sub 2% post vakcinado, dum la nevakcinitaj infanoj sub la samaj kondiĉoj preskaŭ ĉiuj malsaniĝis pro infekto.

La uzado de la vakcino en vasta areo kaj en kamparo ankaŭ donis bonan rezultaton. Laŭ statistiko, kiam ĉirkaŭ 50% de la facile infekteblaj infanoj estas vakcinitaj, la epidemio de morbilo povas esti regata. Kaj la imuneco okazas rapide: Personoj kiuj kontaktiĝas

kun suferantoj de morbilo en la sama tago de vakcinado povas esti protektataj. Vakcinita dum la periodo de kovo, oni ankoraŭ malsaniĝas, sed ne pli grave. La spertoj de la uzado de la vakcino en urboj kaj kamparo montras, ke en la epidemia periodo, oni povas rapide regi la epidemion per vakcinado.

Ĉu la infanetoj povas esti imunataj per tia vakcino? Eksperimentoj montras, ke infanetoj malpli ol ses-monataj povas esti imunataj sukcese per vakcino de pli forta raso de viruso aŭ per pli granda dozo.

En la komplika proceso de la studo de morbila viruso — la prova fabrikado de la vakcino, la studo de la metodo de uzo, la takso pri la efiko kaj la plua studo bazita sur la efiko — la ĉinaj medicinaj laborantoj disvolvis la sperton de kombino de gvidantoj, medicinaj laborantoj kaj la amaso, tiel akcelante la esploradon, kaj akiris sukceson en ne tre longa tempo.

Dum la proceso de esploro kaj prova fabrikado de la vakcino, la gvidantaj kadroj mem direktadis ĉeloke; la sanprotektaj laborantoj de iuj regionoj kaj multaj var-tistoj aktive partoprenis en la laboro por akiri senerarajn historiojn de kontakto kaj malsaniĝo de la infanoj, kaj iuj gepatroj postulis ke oni vakcinu iliajn infanojn por observo, por ke la milionoj kaj milionoj da infanoj povu havi pli frue "Vakcinon de Feliĉo" kontraŭ la danĝera morbilo.

Nun la "Vakcino de Feliĉo" jam sukcesis, alportante novan benon al la infanoj de Ĉinio.

## RADIO PEKINO

### DISAŬDIGAS EN LA PRINTEMPO DE 1966 LAŬ JENA HORARO

Al Regionoj	Pekina Tempo	G M T	Ondoj
Eŭropo	4:00-4:30	20:00-20:30	48m. kaj 42m.
	ĉiusabate	ĉiuvendrede	
Koreio kaj Japanio	4:00-4:30	20:00-20:30	40m. kaj 39m.
	ĉiudimanĉe	ĉiusabate	
Sudorienta Azio	19:00-19:30		48m. kaj 41m.
	ĉiusabate kaj ĉiudimanĉe		
Sudorienta Azio	20:30-21:00		30m. kaj 25m.
	ĉiusabate kaj ĉiudimanĉe		

# Por la Kamparo kaj Kamparanoj

**L**A nova Ĉinio havas 650 milionojn da popoloj, el kiuj 500 milionoj estas kamparanoj. Ili estas kiel produktantoj de multaj specoj de industriaj krudmaterialoj, tiel ankaŭ ĉefaj konsumantoj de industriaj produktaĵoj. Tial la industria produkto de la nova Ĉinio devas direktiĝi al la kamparo kaj kamparanoj. Multaj estas anekdotoj pri tia frata rilato de reciproka helpo kaj reciproka subtenado inter industrio kaj agrikulturo. Ĉi tie ni konigas al niaj legantoj kelkajn historietojn, kiuj rakontas kiel iuj fabrikoj de malpez-kaj meti-industrioj en la urbo Ningbo, Ĝeĝiang-provinco, ĉiamaniere klopodas por servi al la kamparanaj fratoj.

## LEDAJ PORLABORAJ SANDALOJ

Je la fino de marto de 1965 la Buroo de Malpeza Industrio de Ningbo ricevis leteron de iu kamparano. La letero legiĝis: “Ni ĉiutage laboras en kampoj aŭ sur montoj, kaj ĉiam bezonas porti pajlajn sandalojn en kia ajn vetero. Sed tia sandalo povas elteni nur la uzadon de unu aŭ du tagoj. Ni proponas, ke fabriko en Ningbo produktu specon de porlabora sandalo, malkara kaj malfacile difektebla, por anstataŭigi la pajlajn sandalojn.....”

Baldaŭ poste la Buroo de Malpeza Industrio donis tiun ĉi taskon al la Ningbo-a Ledaĵ-fabriko, postulante, ke ĝi provu kontentigi la bezonon de la kamparanaj fratoj.

Kamarado Hju Lianghuj, estro de tiu fabriko, antaŭe estis tre lerta produktanto de ledaj ŝuoj. Ricevinte la taskon li tuj mem komencis kun entuziasmo projekti kaj provfabriki “ledajn porlaborajn sandalojn” por la kamparanaj fratoj. Li elfaris kiel specimenon paron da ledaj porlaboraj

sandaloj, kun plandumoj el eluzita kaŭĉuk-radringo kaj laĉoj el ledpecetoj, neutiligeblaj por fari ŝuojn. Tamen, provportante ilin sur siaj piedoj, li sentis sin nekomforte, kaj aliaj homoj trovis, ke ilin portante oni ne povas facile paŝadi.

La provo malsukcesis. Poste li aĉetis paron da pajlaj sandaloj kaj faris detalan esploradon al ili kune kun laboristoj kaj, laŭ la formo de la pajlaj sandaloj, kiujn la batalantoj de la Oka-voja Armeo uzis en la pasinteco, denove elfaris paron da “ledaj porlaboraj sandaloj”, novtipaj kaj belaj. Provportante ilin sur la piedoj, oni sentis sin tre komforte kaj, cetere, la produktokosto estis malalta.

Portante kun si la specimenon, kiun li mem projektis, li piediris al kamparo spite laciĝon por multe peti opiniojn kaj konsilojn de kamparanaj fratoj. Farinte provuzadon, multaj kamparanoj tre interesiĝis pri tiaj sandaloj; li do komencis desegni piedformojn kaj mezuri piedgrandecojn por kamparanoj. Li faris desegnojn kaj por viroj kaj por virinoj, mezuris piedojn kaj grandajn kaj malgrandajn, kaj fine ĝoje revenis al la fabriko kun siaj abundaj rikoltaĵoj.

Baldaŭ poste la “ledaj porlaboraj sandaloj” komencis po-grande produktiĝi kaj disvendiĝi en la kamparo. Ili estas tre bonvenigataj de la kamparanoj kaj laŭdataj kiel “centjaraj sandaloj”.

## PORPOPOLAMASAJ EMAJLITAJ LAVOPELVOJ

En la lasta jaro la emajlitaj lavopelvoj produktitaj de la Ningbo-a Emajlaĵ-fabriko pli kaj pli multe amasiĝis en tenejoj pro malrapida vendiĝo. Kial? Post diskutado la laboristoj kaj oficistoj de la fabriko opiniis, ke la kaŭzo kuŝas en la monotoneco de la koloroj de desegnaĵoj. Ili do pliigis la kolornombron de kvar ĝis dek du. Malgraŭ tio la lavopelvoj tamen ankoraŭ ne havis vastan merkaton. La fakto pruvis, ke la kaŭzo ja ne kuŝas en la kolornombro. La enigmo, kial la emajlitaj lavopelvoj ne havis vastan merkaton, malkovriĝis nur post kiam laboristoj de la emajlaĵ-fabriko, gvidate de la fabrikestro, iris viziti kamparajn vendejojn. La ĉefa kaŭzo estis, ke la specoj ne plaĉas al la kamparanoj kaj la prezoj estis iom altaj.

Reveninte en la fabrikon, ili do projektis kaj fabrikis nombron da porpopolamasaj emajlitaj lavopelvoj, kaj bonkvalitaj kaj malkaraj. Kiam tiaj lavopelvoj estis alportitaj al vilaĝoj por provvendi, la kamparanoj ilin ekŝatis kaj konkure aĉetis tuj ĉe la unua vido, kaj nur momenton poste jam la pli ol 200 pecoj estis forvenditaj.

Por kontentigi la bezonon de la kamparanoj la nomita fabriko provfabrikis kaj produktas krome ankaŭ aliajn pli ol dek novajn specojn de emajlaĵoj, inkluzive de emajlitaj kukujoj kaj taso, kiuj senescepte havas vastan merkaton.



Por pli bone priservi la kamparanajn fratojn la Ĝedong-a Trikot-fabriko en Ningbo sendis iujn al vilaĝoj speciale por fari enketojn kaj peti opiniojn kaj konsilojn de la kamparanoj. Nemalmultaj kamparanoj diris, ke la manikoj de la puloveroj de ili produktitaj estas tro mallongaj, kaj postulis, ke ili plilongigu la manikojn je kelkaj centimetroj.

En tiu ĉi fabriko la puloveroj estis produktataj laŭ la ŝtata normo, tial plilongigi la manikojn je kelkaj cm. ja signifis revizii la ŝtatan normon. Kiel do solvi la problemon? Post kiam la gvidantaj kadroj de la fabriko organizis la laboristojn kaj oficistojn studi kaj pridiskuti la politikon pri loka industrio difinitan de la ŝtato, ĉiuj iom post iom komprenis, ke la ŝtataj normoj, ĝenerale ja estas difinitaj laŭ la objektiva realo, tamen ili ne povas tute respondi diversajn postulojn kaj specialajn bezonojn de la popolamaso. La fabrikoj devas samtempe kaj severe observi la ŝtatajn normojn kaj akomodigeme fari alĝustigojn kaj kompletigojn laŭ efektivaj bezonoj de la uzantoj. Post tio la fabriko do decidis plilongigi la manikojn de la puloveroj je tri cm. por kontentigi la postulon de la kamparanaj fratoj.

Post nelonge ili elproduktis unuajn longmanikajn puloverojn tre bonvenigatajn de la kamparanoj.

#### MALKARAJ MUZIKILOJ POR LA KAMPARANOJ

La Vendejo de la Orstela Muzikinstrumenta Farejo de Ningbo estas aparte multklienta. Fluo da kamparanaj klientoj eniras kaj eliras, kaj svarmas en la vendejo por fari aĉetadon. Sed antaŭe ne estis tiel. La kaŭzo estis, ke ĝiaj muzikiloj estis multekostaj, kaj tial nur tre malmultaj kamparanoj ilin aĉetis.

Sekve de la plialtiĝo de la tajdo de la industria kaj agrikultura produkto de nia lando, aperis ankaŭ kultura tajdo. Nun en preskaŭ ĉiuj vilaĝoj estas starigitaj kluboj kaj kamparaj opertrupoj, kiuj tre bezonas aĉeti muzikilojn por riĉigi la kulturan vivon en la kamparo. Por kontentigi tiun ĉi bezonon la laboristoj de la muzikinstrumenta farejo decidis produkti popularajn muzikilojn. Unuflanke ili grandskale disvolvis teknikan renovigon sin apogante sur la propraj fortoj kaj, aliflanke, sendis iujn al muzikinstrumentaj farejoj en Ŝanhajo, Suĝoŭ kaj aliaj urboj por lerni de ili valorajn spertojn. Dank' al siaj klopodoj finfine la laboristoj de la farejo sukcesis produkti aron post aro da popularaj muzikiloj, bonkvalitaj kaj malkaraj.

Post kiam tiaj muzikiloj estis elmontritaj en la dirita vendejo, sennombraj kamparanoj konkure aĉetas ilin por si mem aŭ por siaj kluboj kaj laŭdas la farejon kiel modelan entreprenon en servado al la kamparanoj.

## En Konstruado

**ALUMINI-KROMO-FERA REZISTODRATO** — Laboristoj de la Pekina Ŝtaldrata Fabriko produktis antaŭ nelonge atklasan alojdraton — alumini-kromo-fera rezistodrato.

Tia rezistodrato estas tiel maldika ke ĝi estas apenaŭ videbla per nudaj okuloj. Ĝi estas tre varme akceptata de multaj sciencaj esploroj kaj koncernaj fabrikoj. Kun alta rezisteco kaj forta sensiveco ĝi estas tre bona elektrozistaĵo uzata en malproksimaj kontrolo kaj mezuro.

**MIKROPESILO** — La Ŝanhaja Pesila Fabriko sukcese faris precizan mikropesilon. Ĝia minimuma peskvanto estas milionona gramo, kaj la maksimuma peskvanto estas 2 gramoj.

La pezajo uzata por tiu ĉi pesilo estas pli malgranda ol ero de subtila sukero, se oni ne estus atenta, spiro povus ĝin forblovi.

#### FORSTOZONOJ EN LA NORDORIENTO

— Multaj forstozonoj estas konstruitaj en la okcidenta parto de la Nordoriento de Ĉinio sur la vasta ebenejo pli ol 800 km. longa kaj pli ol 200 km. larĝa post 15-jara penlaborado ekde 1950.

Ili komencis ludi amplekse sian rolon en protektado de la grenkampoj kontraŭ vento kaj por firmigi sablojn kaj en akcelado de agrokultura kaj bestobreda pliproduktado.

**EKSPOZICIO DE DAĜAJ-TIPAJ AGROKULTURAJ MODELOJ** — La Ekspozicio de Daĝaj-tipaj Agrokulturaj Modeloj inaŭguriĝis la 1-an de nov., 1965 en la Tutlanda Agrokultura Ekspoziciejo en Pekino.

Ekspozitaj estas sume 52 Daĝaj-tipaj agrokulturaj modelaj kolektivoj. Ili estas nur parteto el la multaj progresintaj kolektivoj Daĝaj-tipaj kiuj emergis en diversaj lokoj. Inter ili iuj estas en montregionoj, aliaj en ebenaĵoj; estas tiuj de agrokulturo, forstumado, bestobredado kaj fiŝkaptado. Ĉiuj ili estas karakterizataj per la komuna revolucia spirito de sinapogo sur la propraj fortoj de la kolektivo, strebado al prospero kaj luktado kontraŭ malfaciloj. Ili penlaboradis por reformi montojn kaj utiligi akvojn, transformis kampojn de malriĉa rikolto, reformis kultivan teknikon, konstruis kampojn de stabila abunda rikolto, ŝanĝis la naturajn fizionomiojn de sia propra loko aŭ regiono, kaj akcelas la disvolvon de agrokultura produktado. Ĉiu el la 52 organizoj havas sian kuraĝigan "historion de luktado" por konkero de la granda naturo.

## En la Gaŭbejdiana Popolkomunumo

**K**IAM venas aŭtuno, en la ĉirkaŭurbo de Pekino, ore brilas la vasta grenkamparo kaj ĉie sonoras ridoj de komunumanoj. Ĝuste en tia sezono de rikolto, lastjare, ni vizitis la Gaŭbejdianan Popolkomunumon.


Tiu ĉi komunumo situas ambaŭflanke de la ŝoseo inter Pekino kaj Tonghian, kaj havas teron de pli ol 870 hektaroj. Same kiel multaj aliaj komunumoj en la ĉirkaŭurbo de Pekino, krom grenplantojn, ĝi kulturas ankaŭ legomojn sur parto de sia tero por kontentigi la bezonon de la urbanoj.

### KAMPARANOJ DE DU GENERACIOJ

Luo Ŝumin, traktoristino de la Dongdiana Produkta Brigado, la unua altiris nian atenton. Dum ni vidis ŝin, ŝi estis kuriganta man-traktoron en la kampo. Kompaktaj termasoj ruliĝis post ĝi kiel ondoj. Vidinte nin la knabino haltigis sian traktoron kaj faris saluton al ni kun ridetoj. Tiel ni komencis mallongan konversacion.

Tuj post kiam ŝi finis sian lernadon en elementa lernejo en 1962, ŝi revenis en la kamparon kaj partoprenis agrokulturan produktadon. En tiu tempo ilia brigado aĉetis 5 man-traktorojn kaj ŝi estis elektita por lerni manipulado de tia traktoro.

*Luo Ŝumin fariĝis lerta man-traktoristino.*



Nun ŝi jam fariĝis traktoristino lerta en sia metio.

“Kiom da tero vi povas plugi maksimume en unu tago?” ni ŝin demandis.

“Proksimume unu hektaron,” sonore diris Luo Ŝumin gestante per la manoj.

“Unu hektaron! Kiom da homforto oni bezonis por tion fari en la pasinteco?”

La maljunulo Luo Fenglaj, patro de Luo Ŝumin solvis nian demandon. Li diris: “Por fari tiom kiom nun mia filino povas fari per la traktoro en unu tago, mi devis ŝvite labori antaŭe pli ol dudek tagojn. Verdire, en komparo kun mi, ŝi ja vivas hodiaŭ en feliĉo.”

Liaj vortoj eldiris la doloron kaj feliĉon de la du generacioj de kamparanoj en Ĉinio la malnova kaj la nova. Li estas nun 60-jara, kaj laboris kiel jardungito pli ol 30 jarojn en la malnova socio. Tiam li kulturis legomojn por bienulo, kaj penegante per ĉiuj siaj fortoj povis plugi nur pli ol 3 arojn da tero en ĉiu tago. Nun en ilia komunumo, parto de tiaj pezaj laboroj jam estas anstataŭe farataj de maŝinoj. En ĉiuj laboroj de plugado, semado, rikoltado, draŝado, akvumado, riz-senŝeligado kaj farunigado oni jam komencis uzi maŝinojn.

### NE PLU PREGI AL DIO

De Lu Delaŭ, estro de la Hiaŭgiaŭting-a Produkta Brigado de la komunumo, ni informiĝis pri alia ŝanĝiĝo en tiu loko. Dum la reakcia regado de Kuomintango en 1929, Hiaŭgiaŭting-vilaĝon trafis terura plago de akridoj. Tiam la finsektoj estis tro multaj por plene ekstermi, kaj la kamparanoj havis nenian alian rimedon krom peti helpon de dio. Kompreneble dio ne helpis ilin, kaj la maizplantoj sur la kampoj de pli ol 60 hektaroj de la vilaĝo estis tute formanĝitaj de akridoj. Mizeraj kamparanoj devis forlasi la vilaĝon por gajni vivpanon aliloke.

Hodiaŭ, la kamparanoj de Hiaŭgiaŭting ne plu restas senhelpaj kontraŭ la finsektoj. En la pasinta printempo, sur iliaj tritikaj kampoj troviĝis “tranĉ-vermoj” (*familio Noctuidae*), kiuj atencis tritikajn plantidojn, kaj en julio, “ruĝaj araneetoj” (*familio Tetranychidae*) atakis iliajn kampojn de maizo, sed en mallonga tempo ili jam ekstermis tiujn finsektojn per kemiaĵoj kaj garantiis la kreskadon de la plantoj.


Tiel statas, kompreneble, ne nur la Hiaŭgiaŭting-a Produkta Brigado sola. Depost kiam la popola komunumo de Gaŭbejdian fondiĝis en 1958, ĉiu brigado sub ĝi starigis sian scienc-teknikan grupon, dank' al granda helpo de la ŝtato kaj kunlaboro de koncernaj organizoj agronomiaj, komunumanoj ne nur ellernis novajn teknikojn por preventi kaj elimini planto-malsanojn kaj fiinsektojn, sed ankaŭ disvastigis fervore la aplikon de diversaj kemisterkoj por akceli pliprodukton de greno. En 1964 sola, la tuta komunumo jam konsumis 400,000 kilogramojn da kemisterko.

### ANTAŬE VINĈOJ, NUN ELEKTRAJ PUMPILOJ

Nun en la tuta areo administrata de la Gaŭbejdiana Popolkomunumo, ĉie troviĝas kanaletoj interkruciĝantaj, kaj la kamparo surhavas araneaĵon da irigaciaj fluejoj. La akvo subtera kiu ŝprucas el la aperturo de elektra pumpilo, laŭ diversaj kondukejoj disfluas en ĉiujn direktojn. Kvankam pasintjare en Pekino mankis pluvo, tamen legomoj kaj grenplantoj verdis sur la kampoj de tiu ĉi komunumo tute sen signo de sekegeco.

K-do Ĝang Ŝizeng, la vicsekretario de la komunuma partikomitato, diris al ni, ke en la komunuma tereno 10 kilometrojn longa kaj 5 km. larĝa troviĝas 10 trunkaj kanaletoj kun totala longo de ĉirkaŭ 18 km. Plejparte el ili estis konstruitaj post la komunumigo. Nun la tuta komunumo havas 120 elektrajn maŝinojn por drenado kaj irigaciado, kaj 90% de ĝia tero jam fariĝis irigaciataj. La elektro-motoristo de la komunumo, Liang Ginde per sia propra travivaĵo rakontis al ni la historion pri la disvolviĝo de la akvoutiliga konstruado de la komunumo.

Jam 40-jara estas Liang Ginde. Antaŭ la Liberiĝo, kiam li havis nur 15 jarojn, li jam eklaboris kiel jardungito ĉe bienulo en najbara vilaĝo. Li diris, ke tiam neniu irigacia kanaletoj troviĝis en tiu areo kaj oni irigaciis per putakvo elprenita per vinĉo. En unu tago nur malmultan terspacon povis tiel irigacii eĉ tri fortaj junuloj. Post la Liberiĝo, la kamparanoj sin organizis en kooperativojn, aĉetis tiam noriojn per mono de la kolektivo, kaj komencis irigacii per brutoj. Kvankam tio moderigis la pezan fizikan laboron, tamen malrapida restis la irigaciado. Nur en 1958, kiam fondiĝis la komunumo, oni fosis paŝon post paŝo kanaletojn, formante tiel irigacian reton kaj aĉetis lokomobilojn por akvopumpado. En 1961, la komunumo pluaparte instalas elektrajn pumpilojn por drenado kaj irigaciado, kaj fundamente solvis la problemon de akvoutiligo. Liang Ginde turnis vinĉon en la pasinteco, uzis norion komence de la Liberiĝo, poste li laboris kiel lokomobilisto, kaj nun fariĝis funkciigisto de elektra pumpilo. Li



*Liang Ginde kontrolas la cirkviton de pumpilo.*

profunde spertis la ŝanĝojn en la akvoutiliga afero kaj profunde komprenas ĝian signifon en la agrokultura produktado.

### ELEKTRO SERVAS ANKAŬ LA KAMPARANOJN


Elektro estis maloftaĵo por la kamparanoj en la malnova Ĉinio. Tiam eĉ kamparanoj de tia vilaĝo kia Gaŭbejdian-vilaĝo tuj apud Pekino neniam uzis elektron.

Sed hodiaŭ en la Gaŭbejdiana Popolkomunumo, elektro jam fariĝis nemalhaveblaĵo en la agrokultura produktado kaj la ĉiutaga vivo de kamparanoj. Post 1958, tiu komunumo instalas sinsekve elektrajn dratojn alt- kaj malalt-tensiajn. Ĉiu el la 47 vilaĝoj de la komunumo estas nun provizata per elektro. Krome en la administrejo de la komunumo estas instalita unu telefona komutatoro kiu havas sub si 50 branĉaparatojn kiuj ebligas al la administrantoj rektan komunikon kun ĉiu el la produktaj brigadoj.

Gravan rolon la elektrenergio ludas por akceli modernigon de la agrokultura produktado. Nun la Gaŭbejdiana Popolkomunumo uzas jam elektrajn pumpilojn en la tuta laboro de irigaciado. En draŝado oni uzas elektrajn disgrajnigilojn. Kaj iuj brigadoj uzas ankaŭ elektrajn maŝinojn por legomtranĉado kaj dispecigado de furaĝo en la kolektivaj porkobredejoj de iuj brigadoj.

Aparte rimarkinde estas, ke la uzado de elektro multe faciligas kaj riĉigas la ĉiutagan vivon de la komunumanoj. Nun en la vilaĝoj de tiu ĉi regiono, elektraj lampoj anstataŭas la sojoleajn kaj kerosenajn lampojn, kiujn oni uzis dum multaj multaj jaroj. Radioricevilo jam fariĝis ŝataĵo en multaj hejmoj de komunumanoj. Elektra muelejo estas aparte ŝatata de la membrinoj de la komunumo, ĉar ili ne plu bezonas puŝturni muelilon kaj povas nun partopreni kolektivan produktadon.

En la Gaŭbejdiana Popolkomunumo, ni vidis la ŝanĝiĝojn de vilaĝoj en la nova Ĉinio post la socialisma transformado de agrokulturo, kaj ankaŭ la belan estontecon de la nova socialisma kamparo.



*Kamarado Vang Gie*

VU GEN:

# HIMNO AL REVOLUCIA JUNECO

—NOTOJ PRI LA KOMUNISMA BATALANTO  
K-DO VANG GIE

**E**N la 14-a de julio 1965, heroe oferis sian junan vivon k-do Vang Gie, la estro de subplotono de iu pionira roto de kirasa trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en Ginan. Li mortis por ŝirmi la vivojn de la ĉeestantaj milicianoj kaj kadroj de popolaj armitaj fortoj okaze de akcidenta eksplodo de pulvo dum trejnado de milicianoj. Lia heroaĵo estas rezulto de la zorga edukado al la juna generacio per la penso de Maŭ Zedong fare de la ĉina PLA.

## STUDO DE LA VERKOJ DE PREZIDANTO MAŬ

En julio de 1961, Vang Gie finis sian studon en la malsupera parto de la Ginhiang-a Mezlernejo en Ŝandong-provinco. Elirinte el lernejo li tuj armeaniĝis. Kiam li metis sur sin la uniformon de PLA, li ĝoje demandis la politikan gvidanton: “Mi nun jam estas revolucia batalanto, ĉu ne?” La gvidanto respondis al li afable: “Por esti vera revolucia batalanto oni devas bone reformi sian ideologion. En tio la plej grava afero estas studi la verkojn de Prezidanto Maŭ.”

Post ripeta lernado, Vang Gie iugrade ekkomprenis la grandan signifon de la instruo de Prezidanto Maŭ pri “tutkora servado al la popolo”. Kaj en sia persona sperto li trovis ke “revolucia batalanto, kiu ne armis sin per la penso de Maŭ Zedong povas perdi sian ĝustan direkton”. Li pene kaj diligente studis verkojn de Prezidanto Maŭ, regule kaj seninterrompe eĉ en tre okupataj

kaj lacaj tempoj. Foje lia dekstra mano estis vundita de brulanta asfalto dum laboro kaj estis sendita al hospitalo. Ankaŭ tie li ne ĉesis legi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj klopodis skribi siajn notojn per la maldekstra mano. Li diris: “La laboro estas ĉesigita, sed la lernado ne devas esti ĉesigita.”

## EKKOMPRENI KIO ESTAS KLASO

Kiam Vang Gie ankoraŭ estis en la roto de rekrutoj, oni lernis la verkon de Prezidanto Maŭ *Analizo de la Diversaj Klasoj de la Ĉina Socio* kaj disvolvis edukan movadon de rememoro pri la pasintaj amaraĵoj. El la pli ol naŭdek rekrutoj la patroj aŭ fratoj de 66 antaŭe laboris por terposedantoj kaj la familioj de 56 suferis la subpremadon aŭ ekspluatadon de imperiistoj, kuomintangaj reakciuloj kaj terposedantoj, tiel ke ili estis disigitaj aŭ perdis siajn membrojn. La patro de la rekruto Caŭ Gianjue estis forkondukita de japanaj agrosantoj kaj la avino estis mortigita de ili per la bajonetoj. La rekruto Ĝu Jupej estis almuzulo en sia infaneco, kaj li eĉ ne havis bovlon por kolekti manĝaĵon, tiel ke li devis anstataŭe uzi rompitan tegolon. Aŭdinte tiajn terurajn faktojn el la malnova socio kaj la sangajn kaj larmajn suferojn de la batalamikoj la juna Vang Gie ekkomprenis kio estas klaso, kio estas subpremo kaj ekspluato, kaj kial necesas revolucio. Li ne povis superregi sian indignon, salte surpaŝis la podion kaj deklaris: “Kvankam mi mem ne suferis, sed la suferoj kiujn



niaj kamaradoj traspertis, estas ankaŭ miaj. Mi venĝos miajn klasajn fratojn!”

## LERNI DE KAMARADO LEJ FENG

En marto 1963, Prezidanto Maŭ alvokis: “Lernu de kamarado Lej Feng.” Tio estis nova granda movforto por Vang Gie sur la vojo de sinrevoluĉio. Prenante Lej Feng kiel modelon kaj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, li ekkonis la klasan karakteron de sia familio kaj sia deveno per la metodo de klasa analizo. Li sobre ekvidis, ke li havas multajn etburgajn individuismajn influojn en si. Por forigi ilin necesas havi altan klasan konscion kiel Lej Feng kaj reformi sian ideologion duoble energie.

Li konscie kaj rigore reformis sian ideologion. Sub la helpado de siaj gvidantoj kaj kamaradoj, li luktis ofte kontraŭ siaj individuismaj pensoj. Li malamegis malunuecon inter la vortoj kaj agoj kaj absolute ne preterlasis eĉ “sensignifajn” bagatelaĵojn. Li rigardis neakordaj kun la nobla virto de revolucia batalanto tiajn aferojn, kiaj elekti bonan lokon dum kolektiva spektado de filmo aŭ en banejo, elekti bonan instrumenton dum laborado kaj similaj. Post la lernado pri la kvin kondiĉoj de revoluciaj daŭrigantoj elmetitaj de Prezidanto Maŭ li traktis sin ankoraŭ pli rigore kaj starigis por si pli altan normon. En ĉio li imitis kaj lernis de heroaj personoj kiaj Bethune, Dong Cunĵuj, Huang Giguang kaj Lej Feng.

## FARI PLI MULTE DA BONAĴOJ POR LA REVOLUCIO

Li intime ligis ĉiujn siajn agojn kun la nobla celado servi al la popolo. Kie ajn li estis, li faris bonaĵojn. Kiam li vidis dum marŝado ke kelkaj tritikaj plantidoj estis faligitaj, li tuj restarigis ilin kaj aldonis teron por ke ili rekresku. Vidante iun maljunulinon iri malfacile dum li transportis grenon survoje, li tuj ŝin invitis sur la ĉaron kaj tiris ĝin pli ol dek liojn por veturigi ĝis ŝia hejmo. Dum vojaĝo li plurfoje monhelpis kunvojaĝantojn, kiuj perdis sian bileton aŭ monsakon. Foje dum marŝado de la subplotono, li sola portis la plejparton de la tritaga greno por la tuta subplotono. Al siaj kamaradoj li donis sian akvon, kiun li mem ne lasis sin trinki. Foje en neĝventado la pioniroj riparitis ponton dum la tuta tago. La vatitaj vestoj de ĉiuj batalantoj estis malsekigitaj. Vang Gie sekigis ilin nokte per fajro unu post alia. Kiam li sekigis la lastan, jam pasis la tria horo de la sekvinta mateno. Sed liaj kamaradoj povis surporti sekan veston matene por rekomenci sian laboron.

Dum li vivis, iuj jam nomis lin “viva Lej Feng”. Vang Gie, tamen, ĉiam memoris la instruon de

Prezidanto Maŭ pri “kompleteco” kaj “ĝisfundeco” en servado al la popolo. Li opiniis ke oni devas oferi kiel eble plej multe al la popolo sed postuli de la popolo kiel eble plej malmulte. Li difinis regulon por si: “ne etendi la manon por honoro, nek por rango aŭ komforto.” Dum lia tuta vivo li ĉiam estis inter la unuaj alfrontante laboron kaj malfacilon, kaj inter la lastaj por ĝuo. Ĉion bonan por la revolucio kaj la popolo li faris per sia tuta forto kaj ĉiam pli fervore.

## ZORGO PRI LA MONDAJ AFEROJ

Kvankam Vang Gie estis simpla batalanto, tamen li ĉiam zorgis pri mondaj aferoj kaj atente sekvis la disvolviĝon de la situacio en sudorienta Azio. Lin brule indignigis la krimaj agoj de la usonaj imperiistoj, kiuj furioze bombas la Nordon de Vjetnamio, sendas pliajn trupojn al ĝia Sudo por tie masakri la senkulpan popolon, kaj senĉese provokis milite nian landon. Li prezentis deciddeklaron en la nomo de sia subplotono al la supera instanco por iri volontule al Vjetnamio por rezisti la usonajn agresantojn kune kun la vjetnama popolo. En sia taglibro li skribis:

*Por protekti la patrolandon, subteni la fratan vjetnaman popolon kaj defendi la mondpacon mi volas rebati la usonajn agresantojn kiel volontulo kune kun la vjetnama popolo. Mi ne bedaŭros, eĉ se mi devos oferi mian vivon.*

## NE TIMI IRI AL GLAVMONTO KAJ FAJROMARO

Kun plej granda revolucia fervoro kaj rigora seriozeco Vang Gie traktis ĉiujn laborojn. Antaŭ danĝeraj kaj malfacilaj taskoj li ĉiam elpaŝis kaj kuraĝe antaŭis la unua.

Foje la roto estis sendita por kontraŭbatali inundon. En la malluma nokto kaj antaŭ vastega akvego, la rotestro kriis: “Kiu scias bone naĝi, iru la unua por esplori la vojon!” Tuj respondis Vang Gie: “Mi iros la unua.” Li sentime antaŭiris ĉe la fronto kaj plurfoje falis en profundaĵon. Tuj kiam lia kapo elmergiĝis el la akvo, li ekkriis atenton al la sekvantoj. Tiel li trovis sekuran vojon por la kunirantoj.

En sia mallonga vivo li trapasis plurajn rigorajn elprovojn. Li skribis en sia taglibro:

*Dank’ al legado de la verkoj de Prezidanto Maŭ, mi komprenas ke la revolucio estas mia idealo kaj lukto por ĝi estas vera feliĉo.*

*. . . Pro la Partio mi ne timas iri al glavmontoj kaj fajromaro, pro la Partio mi eĉ pretas volontate suferi dispecigon de mia korpo.*

Tiuj metale sonorantaj vortoj figurigis la fidelecon de Vang Gie al la Partio, popolo kaj revolucio kaj ankaŭ brile portretis lian mallongan vivon.



*Vojkonstruantoj rigardas ilian prezentadon ĉe la konstruejo.*

JE LIN:

# Kantoj kaj Dancoj al la Kamparanoj

**E**N regiono de Langja-monto, la akva regiono de la lago Bajjangdian, kaj la krutaj mont-regionoj de Pingŝan-gubernio kaj Huaĵjoŭ-gubernio, fame konataj revoluciaj bazlokoj en Hebej-provinco dum la Kontraŭjapana Rezistmilito aperis lastatempe pluraj energiaj kulturlaboraj trupetoj. Kien ajn ili alvenis, ili loĝis ĉe malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj manĝis kaj laboris sur kampoj kune kun ili. Vespere ili aŭ faris prezentadon por la kamparanoj sur placoj aŭ donis gvidon al iliaj artaj agadoj. En la tago la artistoj prezentis amuzajn programerojn ĉe kamprandoj, kaj entreprenis tie propagandon en kunordiĝo kun la lokaj centraj taskoj, por eksciti aktivecon al produktado laŭdante bonajn homojn kaj aferojn. Krome, ili vektopor-tis akvon kaj balais la korton por siaj gastigantoj, flikis vestojn kaj tondis harojn por iliaj infanoj..... Ili interrilatis kun la popolamasoj tiel harmonie kvazaŭ ili estus samfamilianoj. La popolamasoj laŭdis ilin, dirante: “Jen revenis la kulturlabora trupo de la antaŭa Okavoja Armeo.”

Tiuj kulturaj trupoj estis organizitaj de la muzikaj, dancaj kaj operaj grupoj rekte sub la Ministerio

de Kulturo. Por plibone efektiviĝi la direkton ke literaturo kaj arto priservu la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kaj profundiĝi en la vivon de la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ili venis al tiuj foraj montregionoj kaj tie kanti kaj danci por la vastaj popolamasoj de malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

## UNUE LERNI DE LA REVOLUCIA POPOLO

Ĉe la mencio de Langja-monto oni povas tuj rememori la kvin bravulojn de Langja-monto, kiuj post furioza batalado kontraŭ la malamikoj fine sin mortigis per salto de krutaĵo donante heroan ekzemplon de nefleksebleco antaŭ dudek kvin jaroj. Ĝuste al la memorindejo de herooj venis la kulturlabora trupeto de la Centra Nacimuzika Ensemblo, spite al baro de montoj kaj riveroj por fari prezentadon al la tieaj popolanoj. En la lagoriĉa regiono ĉirkaŭ la lago Bajjangdian — la naskiĝloko de la Taĉmento kun Sovaĝansera Plumo, kiu konsternadis la japanajn agresantojn dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, aktivis gekamaradoj de la Ĉina Oper-baleda Teatro.

En tiuj ĉi regionoj ankoraŭ vivas pluraj revoluciaj veteranoj. Bone fartas ankoraŭ Liu Fuŝan, la antaŭa estro de la roto al kiu apartenis la kvin bravuloj, la antaŭa ruĝarmeano Jaŭ Binghuang, kiu partoprenis la Longan Marŝon de 25,000 Lioj, kaj Avino Liu Juloŭ, la estrino de la antaŭa Virina Nacisava Asocio. La gekamaradoj de la kulturlaboraj trupetoj aŭskultis ilian rakontadon pri la historio de revoluciaj luktoj, kiujn ili persone spertis. Neniom submetiĝis Avino Liu, malgraŭ ke la japanaj agresantoj metis sabron sur ŝian kolon kaj fortranĉis pecon da haŭto de ŝia kapo pro ŝia protekto al vunditoj de la Okavoja Armeo kaj greno de la kontraŭjapana registaro. Nun ŝi sendis sian solan filon al la armeo por defendi la popolan ŝtaton. Ĉiuj en la kulturaj trupetoj estis kortuŝitaj de la nobla penso de tiuj revoluciaj antaŭuloj.

En tiuj ĉi revoluciaj bazlokoj ĉie regas revolucia viveco. En la vilaĝoj, kiujn forbruligis aŭ detruis la agresantoj, konstruiĝis nun novaj domoj unu post alia. Vico super vico da ordaj ŝtupaj kampoj, granda akvorezervejo por kontraŭbatali sekegecon kaj inundon kaj la seninterrompa kreskado de la produktokvanto de grenoj — ĉio ĉi prezentas freŝnovan fizionomion de la antaŭaj revoluciaj bazlokoj. Tiuj emociaj scenoj, kiujn vidis kaj memorigis al si la gekamaradoj de la kulturlaboraj trupetoj, donis al ili kaj inspiron kaj edukadon, tiel ke ili konis pli bone la eminentajn kvalitojn de la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj plialtiĝis ilia entuziasmo priservi la popolamasojn.

### REVOLUCIAJ KANTOJ KAJ DANCOJ PROFUNDE EN MONTARON

Langja-monto kun siaj seninterrompaj montpintoj estas loko malfacile trairebla. Iun fojon, la

gekamaradoj de la Centra Nacimuzika Ensemblo, kondukante malgrandan azenon ŝarĝitan per instrumentoj kaj pakajoj kaj kunportante surdorse siajn muzikilojn, piediris pli ol 20 kilometrojn trans montojn kaj riverojn kaj alvenis al Kiju-vilaĝo en profunda montregiono por prezentado. Je la tago de ilia alveno, komunumanoj loĝantaj en la tereno kun diametro de dekelkaj kilometroj jam ĝoje diskonigis la novaĵon malgraŭ pluveto. Ĉiuj haste svarmis al Kiju-vilaĝo — knabinoj en belaj vestoj kun ombreloj en la manoj, surazene rajdantaj maljunulinoj en novaj vestoj, kiujn ili portas nur okaze de vizito al parencoj, kaj maljunuloj kun lambastono kaj lanterno en la mano. Du maljunulinoj pli ol sepdek jarojn aĝaj diris al la gekamaradoj de la kulturlabora trupeto: “Vi ja multe suferis dum la vojaĝo al tiu ĉi montvalo. Ni scias, ke vi ne faros prezentadon hodiaŭ, sed nin alpelis tiel malpacienca deziro, ke ni volas simple vidi vin, venintojn de Pekino, de apud Prezidanto Maŭ.”

“Ĉu ni povas lasi la kamparanajn gekamaradojn reiri hejmen sen rigardi nian ludon? Tute ne!” Malgraŭ sia laco pro la piedirado kaj la pluveto, la trupanoj ŝanĝis la antaŭe fiksitajn planojn de prezentado kaj okazigis tiuvespere “Koncerton en Granda Korto” por la komunumanoj alvenintaj de malproksime.

En la posttagmezo post la tago kiam la kulturlabora trupeto de la Centra Kanta kaj Danca Ensemblo faris prezentadon en Pingŝan-gubernio por la anoj de Hiapansong-komunumo, venis pli ol cent kamparanoj de iu produkta brigado, kiuj ial ne povis rigardi ilian prezentadon, kaj petis, ke ili ludu refoje. La gekamaradoj de la Ensemblo tuj pendigis kurtenon, tamburis kaj tamtamis por

*Ili faras prezentadon por kamparanoj en Pingŝan-gubernio, Hebej-provinco.*



anongi la komencon de la prezentado. La postulo de la amaso estis senprokraste kontentigita. Iufoje, kiam la trupanoj eksciis, ke du maljunuloj el malriĉ-kampanaj familioj sur la valo de Sovagansera Plumo ne povas malsupreniri por rigardi ilian ludon pro malfacileco en irado, dekelkaj anoj de la trupeto kun muzikiloj sur la dorsoj surgrimpis la monton kaj faris prezentadon en la korto de la maljunuloj. La maljunuloj diris kun larmo pro emociiĝo: “Se ne estus la ŝtatpotenco gvidata de Prezidanto Maŭ, kiel vi povus veni ludi en nia hejmo!”

#### LA POPOLAMASOJ BONVENIGAS PREZENTADON

La kamparanoj bonvenigas ilian prezentadon, precipe la enhavon de la prezentado. Onklino Ĝaŭ Hiuking, estrino de Virina Asocio, diris al la gekamaradoj de kulturlabora trupeto: “Kiam vi ludis sur la scenejo la operon ‘La Tombo de Hundaĉo’, en kiu la bienulo tiranas la malriĉulojn, mi ploris malsupre. En la malnova socio, ni malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj vivis eĉ malpli bone ol la hundoj de bienuloj. Tiam, kiam mi muelis grenon por bienulo, mi devis suferi malsaton kaj ŝteli manplenon da brano por manĝi dum la hundoj de la bienulo ricevis bonan manĝon! Mi ŝatas viajn programerojn pro ilia bona enhavo.”

Alifoj, la sekvintan tagon post ilia prezento de “La Tombo de Hundaĉo”, ili partoprenis terkulturan laboron sur kampo. Iu junulo demandis

dube: “Ĉu povis esti, ke homo portis funebran veston por mortinta hundo?” Iu maljuna malriĉ-kamparano Avo Dong Hiong, kiu antaŭe estis kontraŭjapana gerilano, tuj diris al li: “Tia afero okazis ankaŭ en nia vilaĝo antaŭ tridek jaroj. Iu bienulo volis perforte rabi pecon da bona agro de malriĉ-kamparano Ĝang Bingkian kaj ellasis hundon por mordi lin. Ekkolerinte Ĝang batmortigis la hundon. Poste la tuta familio el tri homoj estis persekutita ĝis morto!” Aldone Avo Dong diris al la anoj de la kulturlabora trupeto: “La nunaj gejunuloj ne scias, kiel mizera estis nia vivo en la malnova socio. Prezentu pli multe da programeroj kun tia enhavo por doni al ili klasan edukon.”

La kulturlabora trupeto de la Ĉina Oper-baleda Teatro kiu vizitis Bajjangdian, en kunordigo kun la loka tasko de sterko-kolektado, speciale verkis kaj ludis programerojn agitantajn la komunumanojn al sterko-kolektado. La ludo efikis tre bone. Iuj brigadaj kadroj diris: “La prezentado estas pli efika ol mobiliza parolado. La entuziasmo de la amasoj al laboro estas eksterordinare alta tiujn ĉi tagojn.”

Tiuj multaj emociaj scenoj travivitaj pluapase edukis la artistojn, tiel ke ili pli klare konis la fortan funkcion de literaturo kaj arto kiel batalilo de klasbatalo kaj kian gravan signifon havas la klopodoj disvastigi la socialisman kulturon al la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj rekte doni al ili kulturon por ke ili ĝin ĝuu.

*Komparo pri la dikeco de koloj kun kamparanino Onjo Ŝong.*



*Membroj de la Centra Kanta kaj Danca Ensemblo iras al kamparo kunportante siajn instrumentojn por prezenti kantojn kaj dancojn por la kamparanoj.*





*Veterana laboristo Ĝang Zihiang instruas junajn metilernantojn pri kolora pentrado.*

GONGMOŬ:

# La Urbo de Fajencaĵoj en Ŝandong- Provinco


**E**N belega aŭtuna tago mi venis al Ŝantoŭĝen de Zibo, la urbo de fajencaĵoj de Ŝandong-provinco, kiu kvankam ne estas tiel fama kiel Ĝingdeĝen\*, tamen multe disvolviĝis dum lastaj jaroj.

Kun granda intereso mi vizitis unue produktejon de delikataj porcelanoj. Enpaŝinte la produktejon, mi estis tuj allogita de diversaj bonegaj kaj elegantaj fajencaĵoj kaj porcelanoj. Tie estis ĉiutage bezonataj vazoj multe ŝatataj de urbaj kaj kamparaj popolanoj de nia lando, metiartaĵoj en formoj kaj koloroj kun apartaj gustoj kaj ankaŭ diversaj originalaj kafotrinkiloj, tetasoj, subtasoj k. s. kiuj plaĉas al multe da fremdlandaj geamikoj. Montrante al tiuj novaj produktaĵoj, la estro de la manufakturo sciigis al mi, ke laŭ la bezono de merkatoj en- kaj ekster-landaj, la produktokvanto de la manufakturo en la jaro 1965 pliiĝis je pli ol 10% kompare kun tiu de la jaro 1964 kaj la specoj pliiĝis ĝis 142. Tiuj produktaĵoj zorgeme faritaj ĉiuj havas bonan kvaliton kaj akiris laŭdojn de multaj fremdlandaj geamikoj dum la Ĉina Foiro de Eksportaj Varoj okazigita en Kantono dum la printempo de 1964. Nun la produktaĵoj de la manufakturo ĝuas debiton en Indonezio, Japanio, Aŭstralio, Mozambiko k. a. landoj.

## LA KADUKAJ BAKFORNEGOJ EN LA PASINTECO

La produkto de fajencaĵoj kaj porcelanoj de Ŝantoŭĝen de urbo Zibo, Ŝandong-provinco, komenciĝis, laŭdire, je ĉ. 8-a jc. Sed ĝis la tempo antaŭ la Liberiĝo en 1949 la bakfornegoj estis posedataj de feŭdisma

\*Ĝingdeĝen de Ĝianghi-provinco estas delonge fame konata kiel "urbo de porcelano".



*Nove konstruita laborejo por muldado kaj sekigado*

regantaro de ĉiuj dinastioj kaj de kapitalistoj. Dum jarcentoj kaj jarcentoj oni produktis per tirado de muelilo per bovo, radoturnado per mano, hejtado de bakfornego per brulligno k. s. primitivaj produktaj metodoj kaj instrumentoj. Tiam la vivo de la laboristoj estis tute sengarantia. La ĉiutaga laborotempo longdaŭris 14 ĝis 16 horojn. La fortaj junaj laboristoj fariĝis duonkripluloj kun ĝibigita dorso post malpli ol kvar-kvin jaroj da laboro en la manufakturo. La maljunaj kaj malfortaj laboristoj estis elpelitaj de la kapitalistoj el la manufakturo kaj falis en mizeran staton de migrado kaj manko de pano. Antaŭ la Liberiĝo agoniis la produktado de la Zibo-a Manufakturo de Fajencaĵo kaj Porcelano.

### LA NUNA TUNELA BAKFORNEGO

Hodiaŭ, la produkto de fajencaĵoj kaj porcelano de Zibo estas rapide restarigita kaj disvolvita. Laŭ mia peto la estro de la manufakturo akompanis min pririgardi la produktojn kaj la tunelan bakfornegon hejtatan per karbo mekanikigitajn kaj duonmekanikigitajn.

En la gigantaj domblokoj de produktoj instaligis modernaj diversaj maŝinoj por prilaboro de krudmaterialo kiaj tiuj por frakasado, muelado, filtrado, knedado k. a. Eĉ en la proceso de formigo de fajencaĵo kaj porcelano estas uzataj motoroj kaj la sekigon de duonproduktaĵoj oni plenumas per maŝinoj. Antaŭ la Liberiĝo, por bakpretigo oni uzis la malnovtipajn bak-

fornegojn kiel antaŭ pli ol 800 jaroj; dum nun oni uzas kontinue produktantan mekanikigitan tunelan bakfornegon hejtatan per karbo. Starante ĉe la tunela bakfornego, mi vidis, ke laboristoj metis duonproduktaĵojn en ĉarojn, ilin enpuŝis per maŝino en la tunelan bakfornegon, kaj post unu horo da antaŭvarmigo, bakpretigo kaj malvarmigo, produktaĵoj kun pompaj desegnoj kaj brila glazuro estas jam aŭtomate elportitaj tra la elirejo. Mi tre admiras la iniciativon de la laboristoj. Tiam la estro de la manufakturo, staranta apud mi, sciigis al mi, ke tiuj maŝinekipaĵoj estas ĉiuj kreitaj per la saĝo kaj kreiva laboro de laboristoj. En julio de 1964 la Malpezindustria Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko kunvokis kunvenon por interŝanĝo de progresaj teknikoj en kiu oni alvokis, ke la fajenca kaj porcelana metio de la tuta lando lernu la korektan direktigon al la kamparo kaj produktajn spertojn de la Zibo-a Manufakturo de Fajencaĵo kaj Porcelano kaj disvastigu kaj uzu tiujn spertojn.

### LERTAJ MAJSTROJ

Kondukate de la estro, mi alvenis la desegnejon, en kiu la pentristoj, ĉiu kun sia originala majstraĵo, elpentris desegnojn de impone belaj pejzaĝoj, pompe floran-taj floroj, animitaj homfiguroj, vivecaj birdoj, bestoj k. a. Mi proksimiĝis al la veterana meti-artisto Ĝang Zihiang. Kun granda emocio li diris al mi, ke la arto de fajencaĵo kaj porcelano neniam povis disvolviĝi en la malnova socio. Li estis 63-jara. Ekde sia 15-jara aĝo li eklernis la metiarton de pentrado. Dank' al sia diligenta lernado li akiris lertan arton de pentrado. Sed en la malnova socio li estis elpelita de kapitalisto el la manufakturo kaj ne povis utiligi sian talenton. Hodiaŭ la speciala arto de la maljuna meti-artisto trovis lokon por ludi sian rolon. Por pliriĉigi lian artan vivsperton, la ŝtato ofte sendas lin al pitoreskejoj kaj vidindaĵoj de diversaj lokoj, por ke li povu plivastigi la temojn de siaj verkoj. La ŝtato ankaŭ bone prizorgas lian vivon. La maljuna meti-artisto Ĝang Zihiang profunde sentas ke li vere fariĝis mastro de la lando. Tial, dum la pli ol dek jaroj li ĉiam diligente laboris. Li kreis kaj projektis ne malmulte da eminentaj verkoj spegulantaj la spiriton de la nuna epoko kaj entuziasme instruas al posteuloj sian arton. Pro sia tre distinginda laboro li estis 31-foje elektita kiel avangarda laboranto kaj krome ankaŭ honore fariĝis membro de la Kongreso de Popolaj Repraŝentantoj de Ŝandong-provinco.

### TALENTAJ POSTEULOJ


Dum mia pririgardado en la manufakturo, en ĉiu produkto, fako kaj grupo mi vidis viglajn gejunulojn

intense kaj lerte manipulantajn diversajn maŝinojn. En la 4-a produkto mi intervjuis junan laboriston Song Kefa. Li estis 23-jara metilernanto de veterana laboristo Ĝou Junhin. Sub la zorgema kulturo de Ĝou, post nur 1.5 jaroj da lerno li jam fariĝis sufiĉe kompetenta bakisto posedanta la teknikon kiun oni povis akiri en la malnova Ĉinio nur post pli ol dek-jara lernado. Alia junulo nomata Ji Šujan post penega studo nun jam fundamente posedis la eminentan arton de kolora desegnado kaj nun li povas elpentri dekelkajn desegnojn, kiuj senescepte atingis la normon de la unua rango. La gejunuloj firme decidis fariĝi laboristoj kun progresiva penso kaj eminenta tekniko. Sur sia posteno ili disvolvis vigan ekzercadon de fundamenta tekniko.

### FELIĈA VIVO DE LA LABORISTOJ KAJ OFICISTOJ

Kune kun la disvolviĝo de produkto, pliboniĝas senĉese ankaŭ la vivo de la laboristoj kaj oficistoj. La manufakturo starigis por sia personaro bone ekipitan hospitalon, sanatorion, infanvartejon, banejon, postlaboran lernejon k. a. bonstatigajn instalaĵojn. Mi vizitis la sanatorion de laboristoj, kiu situas sur deklivo de monteto oriente de la manufakturo, en medio tre kvieta kun belaj pejzaĝoj ĉirkaŭe. La manufakturestro interkonigis min kun maljuna laboristo Caŭ Zajfa, kiu estas fajenc-porcelanisto kun pli ol tridek jaroj da laborista kariero. Kun emocio li rakontis al mi sian propran travivaĵon antaŭ la Liberigo. Li diris: "Antaŭ la Liberigo min trafis senfinaj mizeroj, sed por esprimi mian vivon de post la Liberigo sufiĉas jam la vorto FELIĈO." Li ja eldiris la vorton en la koro de milionoj kaj milionoj da ĉinaj laboristoj.

*Malnova bakforno uzita dum jarcentoj*



## En Konstruado

**NOVA VOJO POR EKSTRAKTO DE NIKELO KAJ KOBALTO** — Metalurgiaj sciencistoj kaj teknikistoj en Ŝanhajo post eksperimentado de pli ol du jaroj sukcesis eltiri nikelon kaj kobalton el nikelfosfora fero, kromprodukto de kalcio-magnezi-fosfora sterko, kaj malfermis novan vojon por la produktado de nikelo kaj kobalto en Ĉinio.

### ALTPRECIZA DUONAŬTOMATA UNIVERSALA CILINDRA FROTUMMAŝINO

— La unua altpreciza duonaŭtomata universala cilindra frotummaŝino povanta fari frotumadon de spegulsurfaco estas sukcese provfarita de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko en 1965. Ĝi estas projektita kaj produktita de Ĉinio mem el enlandaj materialoj.

Maŝinpartoj prilaboritaj de ĉi tiu frotumilo povas atingi polurecon de 14 gradoj.

**NOVA SINTEZAFIBRA FABRIKO FINKONSTRUITA** — Sintezafibra fabriko estas finkonstruita antaŭ nelonge en Tiangin kaj jam ekfunkciis por amasa produkto.

La nilonfibroj produktitaj de ĉi tiu fabriko sin klasigas en la specojn de unuopaj, pluropaj, elastaj k.a. fibroj, taŭgaj por trikado de ŝtrumpoj, veŝtoj, ŝaloj, fiŝretoj kaj teksado de litkovrilaj surŝtofoj kaj aliaj produktaĵoj uzataj en industrio.

### AMASO DA KOMERCAĴOJ TRANSPORTITAJ EN LA KAMPARON

— Diverslokaj komercaj organizoj pretigis en la pasinta vintro kaj la kuranta printempo por la viglaj sezonoj de disvendado multspecajn varojn por ĉiutaga kaj kultura uzado. La kvanto superis tiujn de la pasintaj jaroj kaj estas amase transportitaj en la kamparon.

Tiuj komercaĵoj frape karakteriziĝas per tio, ke multe pliiĝis la varioj kaj specoj, kiuj taŭgas por esti vendataj en la kamparo. Plejparte de la pli ol 51,000 specoj de komercaĵoj transportitaj el diversaj lokoj kontentigas bezonon de la kamparanoj, el ili pli ol 3,300 estas tute novaj varioj aŭ specoj. Tio ĉi estas novo post kiam diverslokaj komercaj servoj turnis sian atenton al servado al la kamparo.

**AKVOREZERVUJO SUBTERA** — En Ĝiang-provinco oni finkonstruis akvoutiligan establaĵon por rezervi kaj konduki subteran akvon de riveretoj en servo al irigaciado, kaj oni donis al ĝi la nomon "Subtera Akvorezervujo".

Ĝi estas konstruita sub rivereta lito en montregiono kaj ĝia akvo, kiun oni utiligas, estas sub la tero en malprofunda tavolo.

# Ĵujgin—La Unua Ruĝa Ĉefurbo de Ĉinio


ĴUJGIN estas urbeto ĉirkaŭata de montoj, en la suda parto de Gianghi-provinco de Ĉinio. Preter la urbo, kiel flirtanta silkubando, milde fluas la kvietaj Mian-rivero, kies klara akvo irigacias la rizkampojn ĉe la bordoj. Kiam regas la somero kun ĉarmaj floroj, Ĵujgin sin prezentas vere pentrinda pitoreskejo.

Same kiel Jan-an kaj Ginggang-monto, Ĵujgin estas unu el la sanktejoj de la ĉina revolucio.

En januaro de 1929, estrata de kamarado Maŭ Zedong, la Ĉina Laborist-kampana Ruĝa Armeo venis de sur Ginggang-monto sudorienten por krei novan bazlokon. Tiam la Ruĝa Armeo, plena de heroo spirito de revolucio, forbalais la malamikojn tra centoj da li-oj de vasta areo kaj elhakis la centran revolucion bazlokon kun Ĵujgin kiel la centro, kaj tie fondis la Sovetan Respublikon de Ĉinio. Ĵujgin do fariĝis la unua ruĝa ĉefurbo en la historio de la proleta revolucio de Ĉinio.

En vintro de 1931, en Jeping, kvin kilometrojn oriente de Ĵujgin, la Komunista Partio de Ĉinio kunvokis la Unuan Tutlandan Kongreson de Rerezentantoj de Laboristoj, Kampanoj kaj Soldatoj, en kiu estis aprobitaj la Konstitucio de la Soveta Respubliko de


*La sidejo de la Centra Demokratia Registaro de Laboristoj kaj Kampanoj kaj oficejo de Prezidanto Maŭ dum la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito*



Ĉinio, Leĝo pri Laboro, Agrara Leĝo k. a. kaj fondiĝis la Centra Demokratia Registaro de Laboristoj kaj Kampanoj, kaj kamarado Maŭ Zedong estis elektita kiel la prezidanto. Sub la komando de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ Zedong, la Ĉina Laborist-kampana Ruĝa Armeo frakasis plurajn “ĉirkaŭekstermojn” fare de la kontraŭrevoluciaj trupoj de la kuomintanga reakciularo kun centmiloj da soldatoj kaj de tie komencis la mondfaman Longan Marŝon de 25,000 lioj.

Nun en Ĵujgin sin trovas pli ol tridek revoluciaj memorindejoj. Inter ili estas la Halo de la Unua Tutlanda Kongreso de Rerezentantoj de Laboristoj, Kampanoj kaj Soldatoj, la sidejo de la Centra Demokratia Registaro de Laboristoj kaj Kampanoj, la iama loĝejo de kamarado Maŭ Zedong, la startejo de la Longa Marŝo de la Ruĝa Armeo ktp., kiuj reprenis siajn originajn fizionomiojn dank’ al riparado post la Liberigo. Ĉujare, miloj kaj miloj da popolanoj de ĉiuj partoj de la tuta lando venas ĉi tien por ilin viziti. Guo Mojo, la prezidanto de la Komitato por Defendo de la Mondpaco de la Ĉina Popolo, fama erudito kaj poeto, verkis du poemojn “Vizito al Ĵujgin”, priskribantaj la grandajn meritojn de Ĵujgin en la historio de la ĉina revolucio. Ni citu unu el ili.

*Iama loĝejo de Prezidanto Maŭ en Ĵujgin*





*La monument' glorplena kun form' de obusego\*  
Penike skribas fluge sur la ĉiela rondo:  
La proletaro devas praktiki diktaturon,  
Kaj komunismo certe triumfos tra la mondo.*


*La sango de 1' martiroj heroe sindonintaj  
Eterne brilos freŝe en homa historio;  
Kun ruĝa flag' de Maŭ Zedong, ilin nun jam sekvas  
Sennombraj daŭrigantoj de la revolucio.*

Antaŭ la Liberiĝo, Ĵujgin estis urbo sen industrio kaj nur kun tre postĝintaj kulturo, edukado kaj sanprotektado. Precipe, post la foriro de la Ruĝa Armeo por la Longa Marŝo, la centra soveta regiono estis forte piedpremita de la kuomintanga reakciularo, i. a. Ĵujgin suferis pli gravan detruadon. Ĝis la Liberiĝo en 1949, en la urbo ĉie vidiĝis ruinaĵo. Post la Liberiĝo, la industrio, agrikulturo kaj diversflanka konstruado en Ĵujgin akiris senprecedencan disvolvigon. Nun en ĝi jam konstruiĝis dekoj da entreprenoj kiaj moderna sukerfabriko, moderna hospitalo, elektrejo, kemifabriko, riparejo de agrikulturaj maŝinoj, rizmuelejo k. a. Kaj en la tuta gubernio estas 15 mezlernejoj kaj pli ol 670 elementaj lernejoj.

Nun sur la placo de la tiama sidejo de la Centra Demokratia Registaro de Laboristoj kaj Kampanoj majeste staras Monumento al la Revoluciaj Martiroj de la Ruĝa Armeo. Sur la epitafranito brilas la aŭtografaj dediĉoj de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefkomandanto Ĝu De. Kaj sur la razeno antaŭ la monumento estas 11 mozaikaj ĉinaj ideografiaj signifantaj: "BRAVE MARŜU ANTAŬEN LAŬ LA SANGSPUROJ DE LA MARTIROJ!" Heredante kaj disvolvante la gloran tradicion de revolucio, la popolanoj de Ĵujgin, marŝas antaŭen kun batalspirito, sur la vojo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de sia patrolando.

*\*La Monumento al la Revoluciaj Martiroj de la Ruĝa Armeo similas kolosan kartoĉon.*

*La Halo de la Provizora Centra Registaro de la Soveta Respubliko de Ĉinio dum la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito (rekonstruita laŭ la originalo)*



**LA "ELEKTITAJ VERKOJ DE MAŬ ZEDONG" EN LA BIRMA LINGVO** — La unua kajero de la 4-a volumo de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* en la birma lingvo jam estas eldonita de la birma librejo "Fluga Skribilo" en novembro 1965, en Ranguno. Kaj la dua kajero eldoniĝos en sekvo.

**BILDRAKONTOJ POR KAMPARANOJ** — La Popola Belarta Eldonejo en Pekino lastatempe elektis dek bonajn bildrakontojn kaj ilin disvendas unu post alia malkare kaj grandkvante en kamparo por kontentigi ties bezonon.

Inter tiuj libretoj estas *Ĉe la Bordo de Giangan-rivero* verkita konekse kun la movado de socialisma edukado por speguli klasbatalon en la kamparo, *La Vojo de Daĝaj*, kiu diskonigas la avangardan brigadon agrokulturan, *Lej Feng*, por eduki la kamparanojn pri komunisma ideologio, kaj *Indigna Fajro de la Sudo* kiu priskribas batalojn de la popolo de suda Vjetnamio kontraŭ la usonaj agresantoj.

**BELARTAJ VERKOJ EKSPUZATAJ** — Parto el la belartaj verkoj kolektitaj de la Ĉina Arta Halo estas ekspozitaj. Ĉiuj ili estas kreitaj post la fondiĝo de la nova Ĉinio.

Ekspozitiĝas ĉifoje 302 pecoj da ĉinstilaj pentraĵoj, olepentraĵoj, skulptaĵoj, lignogravuraĵoj, novjaraj bildoj, propagandaj afiŝoj kaj akvareloj. Ili estas elektitaj el la gravaj ekspozicioj de belartoj okazintaj dum la pasintaj jaroj en diversaj lokoj tra la lando. La ekspozicioj koncentre montras ĉiam-plian prosperigon de la socialisma belarta verkado en Ĉinio, kaj spegulas la novajn atingojn akiritajn de artistoj en servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al socialismo.

**NOVA DIREKTO DE MEDICINA ESPLORADO** — Multaj fakuloj, profesoroj kaj esploristoj de medicino en Pekino komencis preni kelkajn malsanojn, oftajn en kamparo, por ilin esplori kaj trovi preventajn kaj kuracajn rimedojn kontraŭ ili. Sole en 1964, jam estis 400 esploristoj en la organoj de la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj formis pli ol 60 fakajn esplorajn grupojn, kiuj penetris en kamparojn de diversaj regionoj por fari sciencajn studojn pri prevento kaj kuraco de infektaj malsanoj, lokaj malsanoj, parazitaj malsanoj kaj toksigo de insekticido, sanprotektado al infanoj en la kamparo ktp. Kaj multaj grupoj jam akiris unuapasaĵajn sukcesojn.

# Printempa Kanto



1. Lej Feng estis batalanto de PLA kun tute malegoisma komunisma spirito. Legu artikolon pri li en la 6-a n-ro de EPC, 1965.
2. Roto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo gardstaranta en la granda moderna urbo Ŝanhajo. En la pasintaj pli ol dek jaroj, ĝi ĉiam tenadis la revolucionan tradicion de penlaboremo kaj ŝparemo de PLA.
3. Temas pri ŝparado de ĉiu ŝparebla groŝo en la socialisma konstruado.
4. Por savi multe pli grandan areon da kampoj de najbara komunumo, Bangŝan-komunumo de Longhaj-gubernio, Fugian-provinco volonte oferis parton de siaj kampoj. Kaj tiun noblan solidarecon oni nomas Bangŝan-spirito.
5. PLA=Popola Liberiga Armeo.

*En vento la printempa fajre flamas la koro,  
ke mi inklinas kanti pri la printempa moro.*

*Agrablas kanti odojn, sed verki — peza sporto,  
ĉar tuta tun' da inko necesas por ĉiu vorto.*

*Mi volas verki versojn, kaj inkon ne avaras,  
sed tro abundaj sentoj nun en la kapo svarmas.*

*Sub arda somer-suno, en vintra akra frosto  
spiritoj de Lej Feng<sup>1</sup> kaj l' Modela Oka Roto<sup>2</sup>*

*jam migris trans montegojn kaj iris tra la bordoj  
kun revoluci-misio kiel bravaj heroldoj.*

*La unu groŝ-ŝparemo<sup>3</sup> kaj la Bangŝan-a stilo<sup>4</sup>  
jam ĉien disvastiĝis per l' orientventa flugilo.*

*La Ŝamen-aj lumturoj, kaj l' Intern-mongoliaj kameloj  
revuis l' altebenojn, dezertojn kiel zefiroj.*

*Kaj nun, al la ĉina tero Printemp' denove venas.  
Ho, nia vivo — tigro kun flugiloj, arbo fruktoplona!*

*Printemp' per bundaj beloj, ornamas nian mondon,  
tajdigas ĉinajn marojn, briligas ĉinajn montojn.*

*De Mehe en la nordo ĝis Kjongja en la sudo,  
jen ondas verda maro kaj ĉarmas ruĝaj nuboj.*

*De Keŝi en la okcidento ĝis Ningbo en la oriento  
fajr-ruĝas ĉie persikfloroj, ŝvebas saliklanug' en vento.*

*La montgigantoj kaj la milmetre altaj deklivoj,  
humile ĉiuj kuŝas sub niaj kolektivoj.*

*La stepoj kaj dezertoj, sovaĝaj kaj senlimaj  
fariĝis por ni mildaj, ŝatindaj kaj intimaj.*

*Jen el la PLA-kazernoj<sup>5</sup> disflugas dekmil ĉaroj  
kun revoluciaj semoj por la ĉinaj kamparoj.*

*Jen de l' oleput-framoj flugas dekmil gruoj en l' aeron,  
kun flame-ruĝa flag' enbeke por beligi la ĉinan teron.*

*Ataki kaj ataki, venkadi en batalo,  
jen estas la naturo de l' granda proletaro.*

*Konduki revolucion venke kun firma volo,  
jen estas la naturo de la ĉina popolo.*

*Batalaj nuboj flugas senfine en l' aero,  
kaj venkoj flue venas kiel granda rivero.*

*Kiom da venkoj sume? Ne povas mi kalkuli,  
samkiel ĉiel-alton ne povas mi mezuri.*

*Ho, kara legantaro, mi certas nur pri tio,  
ke l' venkoj multas kiom printempa poezio.*

*Ja buntas kaj abundas printempa poezio,  
sed nune pretas de mi nur tiu ĉi ario...*

TRAD. LAŬLUM

# LA SUĜOŬ-A BRODARTO


Verkoj el la Giangsu-a Metiarta Ekspozicio

*Fotoj de Peng Gjun*

Ruĝas la Oriento

*de Song Gjujing*





Kateto

*de Vu Sujgen*




Du Tigroj

de Ĉen Gin



Gruoj

de Je Suĝen



Pavo kaj Magnolio

de Hiang Dabaŭ



Patro kaj Filo en Ĝangalo de la Sudo de Vjetnamio

*de Je Venting kaj Vang Suĝen*

# La Suĝoŭa Brodaĵo

De SU ĈANGLING de la Giangsu-provinca Metiindustria Buroo

**B**RODADO estas malnova popola metiarto de Ĉinio.

En la libro *Pri Metiartoj* skribita antaŭ pli ol 2400 jaroj, jam estis detala noto pri brodarto. Ĝi fariĝis arto por ornamo de kostumoj dumlonge en la pasintaj dinastioj. En la vasta kamparo de Ĉinio, preskaŭ ĉiu virino kapablas brodi. Okaze de festotagoj, la junaj virinoj kaj infanoj tre ŝatas porti vestojn, ĉapojn kaj ŝuojn kun bele broditaj floroj, birdoj, bestoj k. a.

El la brodaĵoj de diversaj regionoj de la lando, ĉiu havas siajn originalajn karakterizaĵojn. Precipe famaj estas brodaĵoj de Suĝoŭ, Guangdong, Hunan kaj Siĉuan, konataj kiel "la kvar specoj de brodaĵoj kun granda bonfamo" kaj reprezentas respektive la brodartojn de la provincoj Giangsu, Guangdong, Hunan kaj Siĉuan.

## KARAKTERIZAĴOJ DE LA SUĜOŬA BRODAĴO

La suĝoŭa brodaĵo estas fame konata pro siaj subtileco, eleganteco kaj delikateco. Suĝoŭ, Hangĝoŭ kaj aliaj lokoj situantaj sude de la malsupra Jangzi-rivero jam de longe estas regiono de tre disvolviĝinta silkproduktado en Ĉinio. Tial ankaŭ la brodarto multe disvastiĝis tie, preskaŭ "ĉiu domo posedas brodilon kaj ĉiu homo scipovas brodadon".

En la 16a jarcento, servis en la reĝa palaco iu oficisto Gu Mingŝi, kiu en sia maljuneco revenis al Ŝanhajo kaj instruis tie siajn familianojn pri brodado. Ili brodis pejzaĝojn, homojn, florojn, birdojn kaj bestojn, kiuj estis tiel versimilaj en la stilo de realismo ke ilia arto disfamiĝis tra la lando. Ekde tiam la suĝoŭa brodaĵo estas ankaŭ nomata Gu-brodaĵo lige kun lia familia nomo, kaj fariĝis ankoraŭ pli ŝatata, eĉ disvendita eksterlande. En 1929, la nombro de metiartistoj de la suĝoŭa brodaĵo, sole en Ŝanhajo, atingis jam pli ol 24,000.

## KOLOROJ KAJ KUDROMANIEROJ

La tradicia suĝoŭa brodaĵo estas farita per silkfadenoj. Oni dividis la brodaĵojn en du klasojn: unu estas tiu de praktikaj uzaĵoj, kiaj litkovrila surŝtofo, kusentegilo, tablotuko, kaptuko, ŝudorso, ceremonia kostumo, diovesto; alia estas tiu por aprezo, kiaj ekranoj kaj rulbildoj kun broditaj pejzaĝo, floro, homo, insekto, fiŝo, birdo, besto por dekoracii salonon kaj ĉambron.

Kiel fari brodaĵon versimila, viveca, bela kaj reliefa al nia sento? Ĉefe per la fadenkoloroj kaj kudromanieroj.

Rilate al fadenkoloroj, oni kutimas uzi por suĝoŭa brodaĵo mezajn kolorojn, ĉar ili povas nuanci la brodaĵon laŭnature sen ia signo de kudreroj. La kolorfadenoj uzataj por la suĝoŭaj brodaĵoj nombras pli ol mil specojn.

Kiom da kudromanieroj oni uzas en la suĝoŭa brodarto? Ekzistas diversaj onidiroj. Laŭ antikva libro, estis sume 18. Post la Liberiĝo, oni retrovis kaj kreis aliajn 28 specojn. Per tiuj pli ol 40 specoj de kudromanieroj, kiuj multe riĉiĝis la trezorejon de brodarto, oni povas nun brodi ankaŭ bildon de la ĉina inkverŝa pentrostilo kaj bildon similan al okcidenta olepentraĵo kiujn oni opiniis nebrodeblaj en la pasinteco.

Ni prenu kiel ekzemplon la brodadon de kateto versimila per viveco kaj vigleco. Ĝiaj okuloj estas tiom sagacaj, kaj hararo tiom mola kaj delikata ke oni ŝatus ĝin karesi. Kiel ĝi estas elbrodita? Jen vidu, brodanta knabino tute absorbite brodas puŝante la kudrilon kun kolora fadeno jen supren jen malsupren tra la fonoteksaĵo, ŝi faras tavolon sur tavolo de kudreroj pli kaj pli densaj kaj malhelkoloraj, ĝis apero de la molaj kaj delikataj haroj de la kateto. Nun la brodantino atente fadene pentras unue la okulblankon, poste la pupilon, la okulrandon kaj fine ŝi aldonas la etan brilan punkton laŭ direktado de ĝiaj okuloj. Por tiel elbrodi unu okulon de la kateto oni bezonas 7 aŭ 8 fadenajn kolorojn kaj plurajn kudromanierojn. Kiel ege subtila kaj komplika laboro ĝi estas! Kaj kian senliman kreivan talenton la laboranta popolo havas!

## DELIKATA ARTO

Estis en 1959, por celebri la Dekan Datrevenon de la Fondiĝo de la Respubliko, brodistoj de Suĝoŭ brodis ekranon 8 futojn alta kaj 12 futojn larĝa kun 16 specoj de floroj kaj arbo kaj 51 birdoj. En la brodaĵo estas peonioj kun malsamaj kolornuancoj, helaj kaj malhelaj, pro ilia frua aŭ malfrua ekfloro. Kaj la diferencon de la novaj kaj malnovaj folioj, la malsamajn flankojn de ili kaj la lumon kaj ombron oni bone distingis per diverskoloraj fadenoj. Ankaŭ la bunteco de la bela pavvosto kaj la diferenco de la molaj kaj malmolaj plumoj estis prezentitaj per variaj koloroj kaj kudromanieroj. Por la brodado de tiu ekrano, oni uzis sume 1630 labortagojn, pli ol 600 specojn de koloroj, pli ol 70 kompletojn da fadenoj. Vidante la belegan broditan bildon, oni ne povas sin deteni de admiro: Vere supernatura majstraĵo!

## RESPEGULADO DE LA EPOKA SPIRITO

Dum la 16 jaroj post la Liberiĝo, la suĝoŭa brodarto multe disvolviĝis kaj ĝiaj produktoj havas bonegan merkaton en kaj eksterlande. Por disvolvi tiun ĉi kulturan heredaĵon de la patrolando, laŭ la partia orientilo "cent floroj kune floru, kaj novon evoluigu el malnovo", la suĝoŭaj brodistoj persistas en la direkto ke "arto servu la politikon", "arto servu la laboristojn,

# Alilandaj Studentoj en Pekino

GANG GONGBI

ĈE vesperiĝo la sennuba ĉielo estas ruĝe farbita de la subiranta suno. En la bela Pekina Lingva Kolegio regas eksterordinare vigla atmosfero.

Aro kaj aro da gejunuloj en diversaj kostumoj, kun malsamaj naciecoj kaj haŭtkoloroj, faras ĉiu sian ŝatatan ludon en la sportejo, apud tabloj de tabloteniso, ĉe ŝak-tabuloj aŭ aliloke, kaj aliaj senbrue promenas du-triope... Se vi estus iom atentema, vi povus trovi, ke multaj el ili interparolas en la ĉina lingvo.

Ili estas alilandaj studentoj, kiuj lernas ĉi tie la ĉinan lingvon.

Multaj el la alilandaj studentoj, alvenintaj al Ĉinio devas unue veni ĉi tien por akiri elementan scion de la ĉina lingvo kaj poste transiĝi en aliajn respektivajn altajn lernejojn por faka studo.

## FERVORA EDUKADO

Nun studentoj venintaj el pli ol 30 fremdaj landoj studas en 28 altaj lernejoj en Pekino, inkluzive de la Pekina Universitato, Kinghua-universitato kaj la Ĉina Popola Universitato. Ili estas laŭdataj de multaj pro siaj disciplinemo, vigranimeco kaj precipe pro siaj bonaj atingoj en lernado. Iu pedagogo el Japanio, vizitante la Pekinan Universitaton, tre interesiĝis pri tio kaj demandis: "Kiamaniere vi edukas la alilandajn studentojn?"

"Ni edukas ilin en la internaciisma spirito, kaj ni ĉiuj instruistoj kaj laborantoj konsideras la laboron bone eduki la alilandajn studentojn kiel nian gloran internacisman devon," respondis kamarado, kiu prizorgas la aferojn de alilandaj studentoj en tiu ĉi universitato.

Jes, la alilandaj studentoj en Ĉinio povas senescepte ricevi fervoran instruadon de ĉinaj instruistoj kaj pacienca helpon de siaj ĉinaj kolegoj. Ni vidu kiel ili studas en la lingva kolegio.

Por solvi la malfacilaĵojn de la alilandaj studentoj en lernado la lingva kolegio organizas la studentojn en malgrandajn klasojn, kiuj konsistas el sep, ok aŭ maksimume dekkelkaj personoj, kaj asignas al ĉiu klaso du aŭ tri instruistojn por doni lecionojn kaj helpi la studentojn en lernado post lecionhoroj. La studentoj povas meti demandojn al siaj instruistoj en kiu ajn tempo; kaj eĉ dum vizitado, spektado, sinamuzado kaj aliaj aktivadoj la instruistoj ofte akompanas la studentojn por helpi ilin aŭskulti kaj paroli la ĉinan lingvon.

Tie ĉi oni ofte rakontas la historion kiel birma studento Maung Htoon Way lernis la ĉinan lingvon.

Ĉiu, kiu foliumis la ĉinlingvan ekzercokajeron de Maung Htoon Way havas la saman opinion, ke la ĉinaj ideografiaĵoj de li skribitaj estas laŭregulaj kaj belaj, la frazoj fluaj kaj freŝaj kaj la priskriboj vivecaj kaj elvokivaj.

kampanojn kaj soldatojn", studis kaj resumis la sperton en apliko de diversaj kudromanieroj, kaj lernis kaj studis pri kolorado, desegno, perspektivo kaj aliaj teoriaj scioj de brodarto. Oni kreis ankaŭ multe da brodaĵoj temantaj pri la aktuala vivo en kaj ekster la lando. Ekz-e, "La Patro kaj Filo" k. a. verkoj spegulantaj la batalon de la vjetnama popolo por savo de la patrio kontraŭ la usonaj agresantoj, "Batal-tam-

burado ĉe l' Ekvatoro", k. a. spegulantaj la revoluciajn batalojn de la afrika popolo, kaj multaj verkoj, ekz-e, "Ruĝas la Oriento" pri la majesta sceno de la pordego Tian-anmen en la brilo de aŭroro, spegulantaj novan Ĉinion.

La brodarto de Suĝou per sia bonega tradicia tekniko en belarto nun spegulas la novan spiriton de la epoko.



Sed, en efektiveco, tiuj ekzercoj estis faritaj de li jam en 1965, kiam li estis 16-jara kaj studis ĉi tie malpli ol unu jaron. Ĉar li antaŭe lernis neniun fremdan lingvon en sia patrio, li havis pli da malfacilaĵoj en la lernado de la ĉina lingvo ol siaj kolegoj, ekz. li kutime elparolis "ĥe" anstataŭ "ta". Tial li ne sukcese trapasis la fonetikan ekzamenon.

"Kion mi do faru por helpi al Maung Htoon Way en la lernado?" maltrankviliĝis lia instruistino.

Dum kaj post lecionhoroj, ŝi ĉiel helpis lin ripete sinekzerci. Ĉiufoje, kiam li senerare elparolis iun silabon, ĝoje ŝi kuraĝigis lin: "Htoon Way, korekte vi elparolis!" "Bonege! Daŭrigu la legadon!" Finfine Maung Htoon Way ne nur akiris same bonan atingadon en prononcado kiel siaj kolegoj, sed ankaŭ pli kaj pli bone progresis en skribado de ĉinaj ideografiaĵoj kaj ĉinlingva konversacio.

Ankaŭ la alilandaj studentoj, kiuj studas en diversaj fakaj altaj lernejoj, estas ĉiuflanke helpataj de ĉinaj instruistoj. Li Liangie, profesoro pri grundologio en la Pekina Universitato, lekciis al alilandaj studentoj krom pri grundo de Ĉinio, ankaŭ pri materialo de grundologio koncerne la respektivajn patriojn de siaj alilandaj studentoj.

## SEMADO DE AMIKECO

".....

*Por konstruado de Ĉinio nova,  
Sekundon vi samkiel tagon ŝparis.  
Tamen por helpi al mi ĉe l' lernado  
Vi tempon vian tute ne avaris.  
La nokton kaj laciĝon forgesante,  
Vi ĉiel igis min kompreni kun fervoro.  
Tuj kiam mia dubo malaperis,  
Jam sur vizaĝo via brilis ridetfloro.  
Hieraŭ —  
Rikoltis ni la semojn en lernejo nia;  
Hodiaŭ —  
Jen ĉarmas en Pjongjang florar' gracia."*

Tiu ĉi vervoplena poemo estis letero, kiun korea studento Ho Ĝongho sendis al unu el siaj ĉinaj kolegoj, post kiam li, fininte sian studadon en la Pekina Universitato, revenis al sia patrio.

Fakte el la alilandaj studentoj ja tre multaj kiel Ho Ĝongho interamikiĝis kun ĉinaj studentoj dum la kunstudado. Kameruna studentino M. Biambi kaj ĉina studentino Vang Dakiaŭ, kiuj studas en la terapia fakultato de la Pekina Medicina Kolegio, estas intimaj kaj karaj unu al la alia kvazaŭ veraj fratinoj. Foje M. Biambi elmetis siajn du memoraĵojn, kiujn iu kameruna revolucia martiro donis al ŝi antaŭ la morto, kaj donacis unu el ili al Vang Dakiaŭ, dirante: "Lasu niajn korojn ĉiam kuniĝi kaj pensadi pri la afrika popolo kaj ĝia luktado."

En oktobro de iu jaro, birma studento Maung Nyunt Way lernanta en la Pekina Lingva Kolegio intencis iri al

hospitalo por korpekzameno. Vidante lian malfortecon post ĵusa resaniĝo, ĉina studento Sun Lajguj, kiu loĝis kun li en la sama ĉambro, pensis en si: "Kiel bone estus, se iu akompanus lin al la hospitalo!" Eksciinte ke ĝuste tiam ĉiuj laborantoj de la kolegio estis okupitaj per kunsido, Sun Lajguj tuj decidis mem akompani lin al la hospitalo. Kiam ili estis sur la revena vojo subite ekventis kaj fariĝis malvarme. Sed Maung Nyunt Way portis sur si nur maldikan jakon. Timante, ke li malvarmumos, Sun Lajguj demetis sian vatitan jakon kaj metis ĝin sur lin, preferante mem porti nur la subveston. Maung Nyunt Way estis tiel kortuŝita de la sincera amikeco de la ĉina kolego, ke li longe memoris pri tio.

La intima amikeco inter la alilandaj kaj ĉinaj studentoj pli hardiĝas en la komuna batalado por defendo de la mondpaco kontraŭ la agreso fare de la usona imperiismo. Kiam la ĉinaj studentoj, kiuj partoprenis en Moskvo manifestacion kontraŭ la usona imperiismo kaj pro tio estis grave batvunditaj de policanoj de Sovetunio, revenis al Pekino por kuraco, pli ol 100 alilandaj studentoj iris al la aerodromo por ilin bonvenigi, kaj plie la alilandaj studentoj ankaŭ sendis siajn reprezentantojn al Hiehe-hospitalo por ilin viziti kaj konsoli.

Alilandaj studentoj ankaŭ aktive partoprenis mitingojn kaj manifestaciojn, kiujn la ĉina popolo kaj la ĉina junularo okazigis por subteni la naciliberigajn batalojn de la azia, afrika kaj latinamerika popolo kaj revoluciajn batalojn de diverslandaj popoloj. Tiaj justaj agoj de ili estis varme bonvenigataj de la popolo.

*Ĉina instruisto (la sidanto en la mezo) helpas eksterlandajn studentojn en lernado de la ĉina lingvo.*



**S**E oni demandus al eksterlanda amiko: Kia estas la ĉina skribolingvo? Li certe respondus sen pripenso, ke ĝi estas tre malnova lingvo hieroglifa. Sed, se oni skribus al li kelke da ĉinaj ideografiaĵoj, kiaj 山、水、鸟、鱼、马、鹿、人, dirante al li, ke ili signifas monton, akvon, birdon, fiŝon, ĉevalon, cervon kaj homon respektive, certe li dubus pri sia aserto. Ĉar ili ja ne similas tion figure.

#### LA HISTORIO DE LA ĈINA SKRIBOLINGVO

La ĉina skribolingvo jam havas historion de almenaŭ 4000 jaroj, dum kiuj ĝi multe ŝanĝiĝis. La plej malnova ĉina skribolingvo, en efektiveco, estis hieroglifa, evoluinta de bildoj. Sed komence de Kin-dinastio (221-206 a. K.) antaŭ pli ol 2000 jaroj, ĉe la formoj de la skribolingvo okazis granda ŝanĝiĝo, pro disvolviĝo de la homa socio. En tiu tempo, la skribolingvo estis uzata en pli vastaj kampoj kaj ĉe pli multaj okazoj. Ĝi devis esti skribebla pli rapide kaj pli facile, kaj estis netole-reble notadi per bildoj. Samtempe ankaŭ la tiamaj skribiloj multe progresis: antaŭe oni devis gravuri lingvajn signojn per tranĉileto aŭ ilin desegni per lako kaj bambustangeto kun lamenigita pinto; nun oni inventis oportunan penikon kaj dank' al tio multe rapidigis la skribadon. Tiam la malnovaj hieroglifaj bildoj ne povis plu resti en sia primitiva formo kaj transformiĝis en signojn el strekoj. Post senĉesaj simpligado kaj transformado, tiuj signoj fariĝis la nunaj ideografiaĵoj, kiuj estas ne plu figursimilaj.

La historio de la transformiĝado de la ĉina skribolingvo povas esti dividita en du stadiojn: tiun de figuroj kaj tiun de strekoj. Kaj Kin-dinastio estis la turno-punkto. Antaŭ Kin-dinastio estis tiu de figursimilaj signoj, kaj post ĝi estis tiu de nefigursimilaj signoj el strekoj.

#### LA STADIO DE FIGURSIMILAĴOJ

1. Gravurita Skribaĵo sur Testuda Kiraso kaj Osto — La plej frua ĉina skribolingvo en figursimila formo estis reprezentata de la gravurita skribaĵo sur testuda kiraso kaj ostoj de Ŝang-dinastio (ĉ. 17-a ĝis la 11-a jarcento a. K.) antaŭ pli ol tri mil jaroj. Ĝi estas rigardata kiel lingvo sed ne bildoj, pro tio, ke la desegnoj jam havis sufiĉe fiksjajn formojn, kaj, pli grave, ili estas jam legeblaj, kio estas la ĉefa karakterizaĵo por distingi antikvan lingvoskribaĵon

NI HAISHU:

## Transformiĝado de la

disde bildoj. La skribaĵoj gravuritaj sur testuda kiraso kaj ostoj estis eĉ sufiĉe matura skribolingvo. Tial ni povas motivi la konjekton, ke antaŭ la ekzisto de tiu skriboformo, la ĉina skribolingvo jam formiĝis kaj disvolviĝis.

Materialoj pri skribaĵo gravurita sur testuda kiraso kaj ostoj estis elterigitaj nur antaŭ ne tre longe, en la jaro 1899, ĉe Anjang-gubernio de Henan-provinco. Tie troviĝis en la antikveco la ĉefurbo de Ŝang-dinastio. Per esplorfosado oni trovis tie unujn post aliaj sume pli ol cent mil pecojn de testuda kiraso kaj ostoj kun tiaj skribaĵoj. Ilin pristudinte, specialistoj trovis ĉ. 3000 ideografiaĵojn, el kiuj ĉ. mil fariĝis korekte klarigeblaj kaj legeblaj.

MONTO					
AKVO					
BIRDO					
FIŜO					
ĈEVALO					
CERVO					
HOMO					




























# Ĉina Skribolingvo

Legante la skribaĵojn sur testudaj kirasoj kaj ostoĵoj oni povas vidi, ke la supre menciitaj ideografiaĵoj 山、水、鸟、鱼、马、鹿、人 estas tipaj signoj de hieroglifo, kvankam ĉiu ideografiaĵo havis plurajn skribomanierojn, simplajn kaj malsimplajn kiel la ekzemploj en la tabelo sur p. 94 montras.

2. **Skribaĵo sur Bronzaĵo** — La dua reprezentanto de la ĉina skribolingvo en figursimila formo estas la skribaĵo sur bronzaĵo de Ŝang-kaj Ĝou-dinastioj (de la 11-a jarcento ĝis 249 a. K.). Tio estas skribolingvo gravurita sur bronzaĵoj kaj ding-oĵoj\*, tial ĝi estas ankaŭ nomata “skribaĵo sur sonorilo kaj ding-o”.

Ĝis nun oni induktis, el la surskribaĵoj de pli ol 5000 bronzaĵoj, pli ol 3000 ideografiaĵojn, el kiuj ĉ. du mil estas korekte klarigeblaj kaj legeblaj.

Ankaŭ la skribaĵo sur bronzaĵo de Ŝang-kaj Ĝou-dinastioj estas tipaj hieroglifaj signoj en pluraj skribomanieroj simplaj kaj malsimplaj:








MONTO					
AKVO					
BIRDO					
FİŜO					
ĈEVALO					
CERVO					
HOMO					

## FINIĜO DE LA STADIO DE FIGURSIMILAĴOJ

**La Historia Fono** — Ĝou-dinastio, kiu ekzistadis pli ol 800 jarojn, estis tre longdaŭra dinastio en la ĉina historio. Sed en la 8-a jarcento a. K. ĝi eniris periodon de politika displitiĝo. La princoj ricevintaj feŭdan landon, fariĝis pli kaj pli potencaj, ne plu obeis al la reĝo kaj invadis kaj aneksis unu alian. En la ĉina historio, tiu periodo estas nomita “la Epoko de Printempo kaj Aŭtuno”. En la 5-a jarcento a. K., rezulte de la aneksado, el la princlandoj restis nur 7, el kiuj la plej forta estis Kin-regno. Kaj tiuj 7 regnoj daŭre intermilitadis kaj formis en la historio la tiel nomatan “Epokon de la Militantaj Regnoj”. Finfine, Kin-regno aneksis ĉiujn aliajn 6 regnojn, pereigis Ĝou-dinastion, denove unuigis Ĉinion per fondo de Kin-dinastio en la jaro 221 a. K.

Dum la tempo de “Printempo kaj Aŭtuno” kaj “Militantaj Regnoj”, han-nacio etendis sian terenon de la baseno de la Flava Rivero ĝis sude de Jangzi-rivero. Multe progresis ĝiaj produktado kaj kulturo, kaj same ankaŭ la skribolingvo. Tamen pro la perdo de politika unueco kaj plivastiĝo de la teritorio, pliiĝis ankaŭ la disbranĉiĝo de la skribolingvo. Kaj krome, la senĉesa simpligado de la skribosignoj pro la ĉiam pli ofta uzado de la skribolingvo ankoraŭ pli intensigis la disbranĉiĝon. En tiu periodo, nur la skribolingvo de Kin-regno restis relative simila al la origina pro tio, ke ĝia teritorio estis tiu de la antaŭa Ĝou-dinastio; sed la skribolingvoj de la aliaj regnoj ŝanĝiĝis tre multe. Kompreneble, la ŝanĝiĝoj ne tuŝis la fundamenton de hieroglifo.

3. **Ŝiaŭĝuan** — Post kiam Kin-dinastio fondis la grandan unuecan imperion, ĝi ne plu povis toleri la displitiĝon de la skribolingvo, kaj oni komencis ordigi la ideografiaĵojn kaj starigis norman skribon nomatan “Ŝiaŭĝuan”. Ĝi estis pli simpla ol la skribaĵo sur bronzaĵo, kaj ĉiu ideografiaĵo devas esti skribita en difinita maniero. Oni povas diri, ke ĝi estas la sola unueca skribomaniero dum la stadio de figursimilaĵoj de la ĉina skribolingvo.

			
MONTO	AKVO	BIRDO	FİŜO
			
ĈEVALO	CERVO	HOMO	

\* ding-o = tripieda antikva kaldrono kun du oreloj.

# Amatora Lignogravura Grupo de Kampanoj

ŜANG GIE kaj LAN JU



*Printempa Plugado*

*Cen Guanghan*

ANTAŭ ne longe ni vizitis la kamparon en Bahian-gubernio, Siĉuan-provinco, kaj vidis tie malgrandan cirkulantan ekspozicion de lignogravuraĵoj inter kelkaj produkto-brigadoj. Per siaj klara pensenhavo, intensa etoso de labora vivo kaj kuraĝa, simpla stilo, la ekspoziciaĵoj donis al la rigardantaj komunumanoj intiman kaj neforgeseblan impreson.

Tiu ĉi “Ekspozicio de Lignogravuraĵoj de Kampanoj” estis okazigita de la Amasa Artodomo de Ĉongking. En la ekspozicio elmontriĝis pli ol tridek lignogravuraĵoj, verkitaj de la ses junaj kampanoj de la amatora lignogravura grupo de Tuĝu-komunumo en Bahian-gubernio, dum ferioj aŭ post-laboraj horoj.

Depost la komenco de sia arta aktivado en la printempo de 1961, la membroj de la lignogravura grupo



*Eliro al Laboro*

*Giang Hianlu*

faris ĉirkaŭ kvindek lignogravuraĵojn, plejparte de kiuj jam estis ekspoziciitaj en diversaj ekspozicioj de amatoraj belartaj verkoj de la lando, provinco kaj urbejo. Kelkaj el ili estis aperigitaj en gazetoj, kelkaj plurfoje partoprenis ekspoziciojn eksterlandajn, kaj estis multe laŭdataj de laboristaj kaj kampanaj amasoj kaj profesiaj belartaj laborantoj. Ankaŭ en la “Ekspozicio de Amatoraj Belartaĵoj de la Tutlandaj Laboristoj kaj Kampanoj” okazigita en Pekino en 1965, ekspoziciĝis 19 el ili, inkluzive de “Printempa Plugado”, “Multe da Sterko, Fortaj la Rizplantidoj”, “Scienca Eksperimentado de Ma Jonglian” kaj “Nova Fizionomio de la Kampano”.

Dum la vizito ni informiĝis, ke la aŭtoroj estas gefiloj de malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Ili estas lertaj laborantoj kaj kadroj de produkto-brigadoj kaj samtempe ankaŭ amatoraj artaj aktivuloj,



*Multe da Sterko, Fortaj la Rizplantidoj* Giang Hianlu

propagandistoj de la Partio. Ili ĉiuj partoprenis persone fajran klasan kaj produktan bataladon, havas profundan klas-senton, kaj akumulis riĉan sperton de labora vivo. Sekve iliaj verkoj fervore kantas pri la talenta kaj saĝa gvidado de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, kaj pri la ĝenerala linio de socialisma konstruado, la antaŭen-saltego kaj la Popola Komunumo, kaj klare elmontras la revolucionan spiriton de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Tiamaniere ili ludas bonan rolon en edukado kaj kuraĝigo.

La aŭtoro de "Printempa Plugado" Ĉen Guanghan estas klerigita junulo reveninta al kamparo. Fininte sian lernadon en supera elementa lernejo, li memvole partoprenis agrikulturan laboradon kaj modeste lernis produkto-teknikon de veteranaj kamparanoj. En malpli ol unu jaro li ellernis transplantadon de rizplantidoj, draŝon de greno k. a. kamp-laborojn. En la printempo de 1961, kiam li ellernis plugadon dank' al sia penado, li faris, kun ekscitita koro, la skizon de lia unua lignogravuraĵo "Printempa Plugado", por esprimi sian profundan amon al la nova vivo. Sed la homo kaj bovo sur la desegnaĵo estis senfortaj. Poste, la kamarado, kiu lin gvidis en verkado, prenis lin al kampoj por observi plugadon, kaj rememorigis al li pri lia lernado de plugado. Li rimarkis ke forte laborante la bovo streĉas la kolon antaŭen, simile al tio ke viglanima homo elstarigas la bruston. Laŭ la impreso akirita dum la observado, Ĉen Guanghan faris alian lignogravuraĵon pri la sama temo kun figuroj fortaj kaj vivecaj, kaj subjekto klara, kiu bone montras la entuziasman produktadon en la laborplena printempo.

Ankaŭ la unua lignogravuraĵo "Eliro al Laboro" de Giang Hianlu estas verkita post multfoja observado pri eliro al laboro de la komunumanoj en frua mateno, kaj dank' al apliko de lia propra vivsperto. Nigra monto kaj ŝvebantaj kuiraj fumstrioj montras la kvietan belon

de montvilaĝa frumateno. La bildo impresas per freŝeco kaj viveco. Ankaŭ lia alia verko "Multe da Sterko, Fortaj la Rizplantidoj" estas bona verko inspirita de lia labora vivo. La desegno estas esprimplena, kaj per siaj fortecaj strekoj, fortaj rizplantidoj kaj viglaj vekto-portantoj de sterko montras al ni poeziecon de streĉa laboro. La aŭtoro organisme kunligas en sia verko la spertitan laboran vivon kun la natura medio. Lia laŭdo pri la riz-plantidoj estas kanto al homa laboro. Rigardinte tiun lignogravuraĵon komunumanoj diris: "Tiu ĉi bildo manifestas nian laboran entuziasmon kaj la bonegan situacion de la Popola Komunumo."

Ĉen Guanghan kaj Giang Hianlu kune verkis laŭ sia travivaĵo serion de lignogravuraĵoj "Nova Fizionomio de la Kamparo" kiu relative profunde respegulas la novan aspekton de la kamparo post la movado de socialisma edukado. Tiu ĉi bildoserio estas plena de revolucia entuziasmo. La penso de la subjekto atingis certan profundecon. La vicestro de la grupo de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj estas ilia fervora konsilanto. Rilate al tio, kio estas versimile pentrita kaj kio ne, kaj kiel desegni pli bone, li ĉiam sincere donas al ili siajn opiniojn. Li prenas kiel sian devon helpi al la amatoraj lignogravuristoj por pli bone prezenti la novan aspekton de la kamparo. Kaj la lignogravuristoj bone utiligas sian kolektivian saĝon en la verkado. La karaktero de Giang Hianlu estas serena kaj liaj verkoj karakteriziĝas per krudeco, akreco kaj forteco, sed mankas al ili sufiĉa delikateco. Sed Ĉen Guanghan estas junulo kun sentema koro kaj lertaj manoj. Liaj verkoj estas kompare delikataj kun forta gusto de ornamaĵo, sed estas tro zorgemaj, kaj liaj tranĉoj estas ne sufiĉe kuraĝaj. En tiu ĉi kunlaboro, tra reciproka lerno, ili garantiis fundamentan unuecon de tiu ĉi serio, kaj ankaŭ certgrade altigis sian esprimopovon.

Ilia atingo instigis junajn kamparanojn en la brigado lerni lignogravuradon de ili. La lignogravuraĵo "Sciencista Eksperimentado de Ma Jonglian", pri la klerigita junulo Ma Jonglian, kiu estas avangarda produktanto de Ĉongking kaj faris sciencan eksperimentadon en kamparo, estas kolektiva verko farita de Giang Hianlu kaj plejparto de la novaj membroj de la lignogravura grupo sub lia gvido.

Depost la fondiĝo de tiu ĉi amatora lignogravura grupo de kamparanoj en 1961, la nombro de ĝiaj membroj kreskis de tri ĝis ses. En la komenco, la membroj prenis lignogravuradon nur kiel ŝatokupon, kaj iliaj verkoj nur simple spegulis ilian produktan laboron, sed dank' al sia pena praktikado de arto kaj tra memvola hardado en ideologio nun ili fariĝis konsciaj aplikantoj de lignogravurado en servado al politiko kaj produktado, kaj prenas gravsignifajn subjektomaterialojn el la reala vivo por siaj verkoj. Dum la tuta periodo de ilia kreskado, diversrangaj partiaj organizoj kaj profesiaj belartaj laborantoj de koncernaj organizoj zorge gvidis ilin en ideologio kaj helpis en arto, tiel ke ili longdaŭre tenas sian fervorecon en arta kreado.

## La Marioneta Teatraĵo de Kjuanĝou

LA marioneta teatraĵo de Kjuanĝou estas tre malnova kaj riĉa je loka koloro. Ĝiaj marionetoj movataj per fadenoj estas delikate skulptitaj kaj kompletaj; ankaŭ la muziko akompananta estas tre bela. Kaj krome dank' al sia prezentado delikata kaj preciza kun tre ver-similaj movoj de la roluloj ĝi ĝuas grandan popularecon.

Antaŭ kelkaj jaroj, la Marioneta Teatro de Kjuanĝou profunde impresis la rigardintojn per siaj programeroj "Liberigo de la Jigiangŝan-insulo", "Ĝojo pri Abunda Rikolto" k. a. En 1965, ĝi prezentis antaŭ la pekina spektantaro siajn novajn teatraĵojn kun modernaj temoj, kiaj "Sentinelo ĉe la Orienta Maro", "Ĝang Gaŭkian"

kaj la novan fabelan teatraĵon "Milpersika Rokego", kaj rikoltis multajn laŭdojn de la vasta publiko. Ankaŭ artistoj pri pupoj taksis alte la perfektecon de ĝia prezentado.

"Ĝang Gaŭkian" prikantas heroan agon de la samnoma juna pioniro kiu lukta firme kontraŭ aĉulo por protekti kolektivajn proprajn. Tiu filo de mizera kamparano influate de siaj antaŭuloj, amas sian kolektivon kaj laboron ekde la infaneco. Li atente zorgas pri la ŝafidoj kaj iliaj patrinoj kun grandaj kurbaj kornoj. Kiam aĉulo intencas ŝteli ŝafojn en la vespero, Ĝang sin-




*Supre: Ĝang Gaŭkian bone prizorgas la kaprojn de la komunumo.*

*Malsupre: Ĝang Gaŭkian en batalo kontraŭ ŝtelanto*



*Supre: Tiamaniere oni manipulas la marionetojn.*

*Malsupre: En "Milpersika Rokego", la elefanteto kaj liaj kunuloj rikoltas siajn laborfruktojn.*



riske luktis kun la malamiko... kaj fine sukcesis projekti la ŝafojn.

La tuta prezentado estis streĉa kaj vigla, kaj la homfiguroj estas tre vivecaj. La teatraĵo sukcese figurigis la junan pioniron kun fortaj amo kaj malamo, kuraĝo kaj firma volo.

La "Milpersika Rokego" estis prezentata en alia stilo. Ĝi temas pri simieto, kuniklito, griza elefanteto, cerveto, urseto, la saĝa, lerta fratino najtingalo k. a. kiuj kultivas sovaĝan monton por kreskigi tie persikarbojn per siaj propraj manoj. Post nelonge, sur branĉoj de la arboj pezas efektive grandaj kaj dolĉaj persikoj, kaj ĉiuj komencas ĝoje kanti kaj danci pro tio! Sed la abomenindaj lupoj kaj kampomuso intencas detrui ilian persikarbaron, Tiam la simieto unuiĝis kun ĉiuj siaj kunuloj kaj mortbatis la lupaĉon kaj kampomuson....

Ĝi donis al infanoj-spektantoj ĝojon kaj utilan edukon, por ke la infanoj komprenu kiel ami laboron kaj kuraĝu gardi la fruktojn de laboro. Rilate la artan projektadon, oni faris lertan aranĝon de la intrigo laŭ la komprenebleco por infanoj. Surbaze de la vivo de ĉiuj bestoj, oni ilin prezentas hiperbole preskaŭ en ĉiuj detaloj, kaj ĉiu el ili havas sian klare distingeblan karakteron. Precipe interesa kaj vigla estas la prezentado de la griza elefanteto. Elefanto, en la impresado de homoj, estas besto malvigla, sed ĝi troviĝas en la "Milpersika Rokego" kiel besteto portanta ruĝan ventrokovrileton, kun la rostro ĉiam levata supren al la ĉielo, tio donas sufiĉan guston de infaneco. La viva prezento ke ĝi forte batis la formikon kaj fine mortigis la malgrandan kampomuson per sia rostro, rikoltis varmajn aplaŭdojn de la junaj rigardantoj.

La marionetoj estas movataj per maldikaj, ĉ. 4 metrojn longaj fadenoj. Unu marioneto havas almenaŭ 20 fadenojn, kaj iuj eĉ 30. Per ili la ludantoj povas lerte kaj senerare igi la marionetojn demeti veston, ricevi korbon, pedali biciklon, tamtami, tamburi ktp. kaj akompanante la movojn per necesaj kantado kaj paroloj oni vivigas la marionetojn.

En la pasinteco la marionetoj povis nur paŝi kun rigidaj kruroj, movi siajn brakojn supren aŭ malsupren, kaj sin turni mekanike, do estis malfacile por ili prezenti komplikajn intrigojn de rakonto kaj la sentojn de homoj. Sekve de la renovigo de enhavo, la Marioneta Teatro de Kjuanĝoŭ faris senĉesan perfektigon en la arto de figurado kaj prezentado. Ekzemple, en la teatraĵo "Sentinelo ĉe la Orienta Maro", milicanoj vigle prenas la pafilon de sur sia ŝultro kaj ĝin tenas antaŭ si horizonte, tuj sekve ili faras paŝon per sia dekstra kruro puŝante la pafilon antaŭen por piki kaj poste stariĝas rapide kun la pafilo en la pozicio de "Atent!". Tre interesa kaj admirinda estas la tute senerara kaj versimila serio da movoj.

En la pasintaj dekkelkaj jaroj, la teatro rondiris plurfoje al pli ol 20 provincoj kaj urboj, sude kaj norde de Jangzi-rivero en Ĉinio, farante prezentadojn por fabrikoj, minejoj, kamparoj, trupoj, lernejoj kaj loĝantaroj en urbetoj, kaj ili estas multe ŝatataj de la vasta spektantaro. En 1960, la teatro aliĝinte al la Ĉina Marionetarta Delegacio partoprenis la konkurson de la Dua Internacia Marioneta Festivalo en Rumanio kaj gajnis la kolektivajn duaklasan premiojn.



**EKSPozICIO DE SERPENTOJ** — La Ĝeĝiang-provinca Sanprotektita Oficejo, kunlaboro kun kelkaj aliaj sciencaj organizoj, okazigis lastatempe rondiran ekspozicion de serpentoj. Estis elmontrataj diversaj venenaj kaj senvenenaj serpentoj, mortaj kaj vivantaj, diversaj specimenoj de drogherboj por preventi kaj resanigi serpentvundojn kaj vivantaj drogplantoj en vazoj, kaj multe da tradiciaj receptoj por kuraco de serpentvundoj kun klarigoj pri la produktejo de la drogoj, efiko, maniero de uzo ktp. La ekspozicio ricevis multan aprobon de la kamparanoj.

**KURBA SPINO REKTIGITA** — Jang Bangan, kies spino kurbiĝis je 97 gradoj ĉe la talio pro sufero de longdaŭra reŭmatisma plurartrito, jam povas sin rektigi kaj movi kiel ordinaro, post kuracado en Hinhua-hospitalo dependanta de la Ŝanhaja Dua Medicina Kolegio. La kurbiĝo malbone influis la funkciojn de la koro, pulmo kaj stomako. La kuracistoj kaj flegistoj de Hinhua-hospitalo persistis en scienca praktikado, kaj faris al la malsanulo operacion de spinosta detranĉo. Pasis 4-monata flegado, la detranĉita vertebraro de la malsanulo jam rekuniĝis. Nun li povas rektigi sian talion, kuŝiĝi surdorse, kaj libere sin movi sur la piedoj kaj ankaŭ la aliaj simptomoj malaperis.

**PLIPRODUKTADO DE KURACILOJ POR LA KAMPARO** — Laŭ bezono de la vasta kamparanaro, la medikamento-produktejoj en Pekino fervore multigas la produkton de medikamentoj ofte uzataj en la kamparo. Tong Ren Tang, la fama fabriko de ĉinaj medikamentoj, pliproduktis por la kamparanoj dekkelkajn pretajn kuracilojn. Kaj alia Pekina Kuracilfarejo produktis novan kuracilon "Kontraŭastmaj Piloloj" kaj komencis ĝian vendon en vilaĝoj por plenumi la bezonon de tusantoj kaj astmuloj kiuj estas pli multaj dum vintro en la nordaj vilaĝoj.

**AMASO DA SANSKRITA MATERIALO** — La arkivejo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kolektis el diversaj lokoj en Tibeto amason da antikva sanskrita materialo. La plej malnova el ili estas verkita antaŭ pli ol mil jaroj. Plejparte de tiu materialo estas budhismaj sanktaj libroj, kaj parte de ili estas verkoj pri historio, lingvo, literaturo, filozofio k. a.

Troviĝas inter ili ankaŭ valora ekzemplero de "sankta libro sur palmfolioj". Nun ili estas ordigataj, klasifikataj kaj listigataj de specialistoj por plua studo de koncernaj organizoj.



*La serpentumanta Granda Muro sur la monto Badaling*

# La Ĉina Granda Muro sur la Monto Badaling

ĜENG ĜENGIE

*Observa Turo de la Granda Muro*




ĈIUJ fremdaj amikoj, kiuj vizitas Pekinon, volas vidi la famkonatan Grandan Muron de Ĉinio, konstruitan en antikva tempo. La monto Badaling estas la plej ideala loko por rigardi la Grandan Muron.

Badaling estas unu el la mont-pintoj de Gjundumonto, pli ol 1,000 metrojn alta super la mar-nivelo, ĉirkaŭ kvindek kilometrojn nordokcidente de Pekino. Veturinte kvardek kilometrojn de Pekino al Badaling, oni venas en montgorĝon, kie la vojo serpentumas akompanate de murmuranta rivereto inter krutaj montgigantoj verde kovritaj, kaj grimpadas ĉiam pli supren — vere grava pasejo en milito. Kiam oni alvenas al Kinglongkiaŭ-stacio de la Pekin-Baŭtoŭ-a Fervojo, oni povas vidi la alte elstarantan Badaling kun la majesta Granda Muro sur ĝi en senfina kontinuo.

Parolante pri la Granda Muro, ĝenerale oni ekpensas pri Kin Ŝi Huang Di (la Unua Imperiestro de Kin-dinastio), kiu konstruigis tiun ĉi grandiozan muron antaŭ 2180 jaroj. Fakte, li nur kunligis la multajn apartajn grandajn murojn en unu tuton. La originaj grandaj muroj komencis sian ekziston multe pli frue.

La parto de la Granda Muro, kiu serpentumas sur Badaling, estis konstruita de Jan-regno dum la periodo de la Militantaj Regnoj (476-221 a. K.). Pasej-pordego estis konstruita aldone al ĝi kaj ĝi transformiĝis en la nunan staton en Ming-dinastio, en la jaro 1368 p. K. Laŭ historia verko, antaŭ Ming-dinastio la Granda Muro estis konstruita per loeso, kaj oni masonis al ĝi ekster-





ajon el longaj pecoj de ŝtono kaj brikoj nur post Ming-dinastio.

La Granda Muro kuras trans multajn strategie gravajn lokojn. Badaling kun la najbara Gjujong-pasejo estas unu el la plej gravaj en la orienta parto de la Granda Muro. La tiea pejzaĝo estas tre grandioza. Antikva poeto priskribis tiun ĉi lokon per la jenaj versoj:

*Tridek mil futojn alte ĉe l' stelaro  
Rigardas mi Jan-landon sub nubmaro.*

Vere tiel estas. Suprenirinte la plej altan parton de la Granda Muro sur la monto Badaling kaj rigardante orienten, ni vidas milojn da belaj montoj kun verdaj pinoj, kaj ke la Granda Muro transkuras la montojn kaj valojn ĝis la malproksima nubozo ĉielrando; okcidente ni vidas en nebula maro la ondantan montaron de la antikva Jan-regno kun la

brilanta Guanting-akvorezervejo kiel ornamaĵo. La montoj kaj riveroj sude kaj norde de la Granda Muro estas klare videblaj antaŭ niaj okuloj. Tia pitoreska pejzaĝo donas al ni ĝojon kaj plezuron. Proksime de Badaling estas multaj historiaj restaĵoj kaj lokoj de kortuŝaj legendoj. Gjujong-pasejo en ĝia najbareco kun mirinde belaj montoj estas natura fortikaĵo facile defendebla, kiun militistoj en la pasinteco nepre klopodis kapti. Ĝi estas unu el la ok vidindaĵoj de Pekino. Ĉe la pasejo staras Observa Turo, konstruita el blanka

marmoro. Sur la arkaĵo de la turo estas subtilaj gravuraĵoj, ŝtonaj skulptaĵoj kaj budhisma Dharanisutro en la tibeta, mongola, hana, sanskrita, uĝura k. a. lingvoj. Tiuj antikvaj gravuraĵoj havas tre altan valoron en studado de antikvaj lingvoj.

Proksime de la Kinglongkiaŭ-stacio staras la bronza statuo kaj Memora Halo de S-ro Ĝan Tianjoŭ. Li estis la unua eminenta inĝeniero fervojkonstrua de Ĉinio. Estis li, kiu gvidis fervojajn laboristojn mem projekti kaj mem konstrui la Pekin-Ĝanggiakoŭ-an Fervojon antaŭ sesdek jaroj. Krome, cirkulas pri la Granda Muro multaj kortuŝaj legendoj, el kiuj tiu pri la malfeliĉulino Meng Ĝiangnju estas tre fama. Ŝia edzo s-ro Fan estis forvokita de la tiama feŭda reganto por konstrui la Grandan Muron. Meng Ĝiangnju piediris dek-mil liojn spite al malfaciloj kaj suferoj por serĉi sian edzon. Poste, ŝi aŭdis, ke ŝia edzo s-ro Fan mortis de penlaborego kaj estis enterigita sub la Granda Muro. Ŝi sidigis apud la Granda Muro kaj ekploris, ploregis dolore. Fine tiu parto de la Granda Muro disfalis pro ŝia plorado.

Post la Liberiĝo, la Granda Muro sur Badaling kaj Gjujong-pasejo estas difinitaj de la Popola Registaro kiel gravaj historiaj restaĵoj protektendaj. La partoj disfalintaj kaj breĉitaj pro sablovento estis riparitaj. Administrejo, vendejo, akceptejo kaj klubo por fremdlandaj amikoj starigis. Nun sur la asfalta vojo de Pekino ĝis Badaling ĉiam iras kaj revenas diversnaciaj laboruloj kaj multaj fremdaj gastoj. Ili venas ĉi tien por rigardi kun admiro la grandiozan konstruaĵon de la antikvaj laboruloj de Ĉinio — la Grandan Muron.

## FIŜETO POVANTA MANĜI FIŜEGON

En la regiono de la Orienta kaj Flava Maroj de Ĉinio, troviĝas speco de eta fiŝo kiu sin nutras precipe per grandaj fiŝoj. Tia fiŝeto estas ĉ. 50 centimetrojn longa, kaj oni nomas ĝin Blinda Angilo, pro ĝiaj malevoluintaj okuloj.


Ĝi havas buŝon similan al suĉilo, sur la palato estas dentoj tiel akraj kiel fajlilo, kaj forta estas ĝia lango. Per tiuj ĉi iloj ĝi atakas fiŝojn kies korpoj estas kelkdekoble pli grandaj ol la ĝia.

Tre lerta estas la Blinda Angilo en manĝado de fiŝo multe pli granda. Ĝenerale ĝi unue alkroĉiĝas al la brank-truo, gorĝo aŭ okulo de la granda fiŝo, iom post iom manĝante ĝi enpenetras en ties korpon, kaj formanĝas unue ties intestaĵon kaj poste ties karnon. Ifoje unu granda fiŝo estas tiel enpenetrata de kelkaj Blindaj Angiloj, kaj ĉi tiuj povas formanĝi la intestaĵon kaj karnon de la granda fiŝo nur post malmultaj tagoj.



*Branktruo*

*Blinda Angilo kun la ventro supre*



*vidata deflanke*



# INSPEKTISTO DE ELEKTROLINIO

Verkis LIU ANKI

Ilustris ĜOŬ GIANFU

## I

**F**ININTE la lernadon en la lernejo de teknikaj laboristoj, mi estis asignita al la Oficejo de Elektra Povo por fariĝi lini-inspektisto.

Post kiam mi lernis kun aliaj lernantoj en la Stacio de Lini-protektado dum pli ol unu monato, la supera instanco difinis ke mi laboru en iu fora lini-inspekta stacio. Mi aŭdis, ke mia Majstro Gu Ĝigian estas labormodelo de la tuta lando, okaklasa\* lini-inspektisto

\* okaklasa: En Ĉinio, la laboristoj estas nun dividitaj en ok klasoj laŭ sia lerteco kaj sperto en la laboro. La oka estas la plej alta klaso.

kun laboraĝo de tridek jaroj. Pro tio mi multe ĝojis kaj deziregis vidi lin kiel eble plej baldaŭ. Kiel feliĉa mi estis, ke kelkajn tagojn antaŭ la Printempa Festo Majstro Gu revenis de malproksima montvalo al la stacio. Kiu atendis, ke “renkontiĝo senvalorigas la famon”! Tuj kiam mi vidis lin, mi ekstultiĝis. Li estis malalta en staturto, iom lama, kaj neniom simila al la Majstro Gu en mia imago.

Je la 28-a de la dekdua monato laŭ la luna kalendaro, du tagojn antaŭ la Printempa Festo, mi prenis la saman trajnon kun Majstro Gu por reveni al la naskiĝloko kaj ĝui la feston.

Envagoniĝinte mi tre baldaŭ endormiĝis.

“Tuj leviĝu, Malgranda Li!” Post dormado mi ne sciis kiom longa, la majstro subite vekis min el mia sonĝo.

“Celstacio atingita?” mi demandis, frotante la dormemajn okulojn.

“Ne, ni iru plenumi taskon!” Antaŭ ol mi komprenis kio efektive estas, li tiris min kaj ni kune iris. Post la elvagoniĝo mi trovis, ke ni estas en malgranda stacio en Hebej-provinco.

“Majstro, kian taskon — ni plenumos?” Rigardante al la neĝkovrita stepo, kie blovdadis frostiga vento, mi estis ja plene konfuzita.

“Iru malantaŭen sekvante min!” Li surŝultrigis la laboril-sakon kaj diris eksvingante la brakon: “Ĵus en la trajno mi rimarkis, ke iamaniere difektiĝis iu fera turo. Ni iru ĝin esplori!” Tion aŭdinte mi tuj ĉaĝreniĝis kaj pensis: Kiel stranga maljunulo! Kial sin ĝeni, ŝovante la nazon en alies vazon? Jen li eĉ sin okupas per afero aliprovinca. Senpacience mi demandis: “Ĉu tio estas en nia sfero, Majstro?”

“Ni estas lini-inspektistoj de la lando. Ĉiu difekto trovita estas en nia sfero!” Li respondis gravmiene kun tono treege firma. Senkonsile mi povis nur sekvi lin. La neĝo sur la vojo estis unu futon dika kaj la deklivo estis relative kruta. Ni devis ŝancelpaŝi antaŭen malfacile. Rigardate de sur la trajno, la turo ŝajnis proksima. Sed kiam ni iris al ĝi, la distanco montriĝis sufiĉe longa. Post irado de kvin-ses lioj ni finfine atingis la turon. Vibrigate de la norda vento, la altensiaj dratoj eligis metalecajn sonojn.



Ĵetinte teren la grandan dors-sakon, Majstro Gu diris: “Malgranda Li, rigardu kio estas ne en ordo!” Mi forviŝis la ŝvitgutojn de sur mia frunto kaj levis la kapon por rigardi. “Malleviĝis la kurbigo de la tera drato,” mi diris.

Tion aŭdinte li diris nek jes nek ne. Li forte premis unu oreilon al la turtrunko kaj aŭskultinte dum momento diris decideme: “Malfirmiĝis ŝraŭbo!” Mi penis aŭs-

kulti retenante mian spiradon, kaj aŭdis nenian neordinaran sonon sed nur la zumadon de la dratoj. Mi ne povis ne pensi en la koro: “Kiel certa li estas, ke li povas aŭdi eĉ malfirmiĝon de ŝraŭbo!”

“Malgranda Li, ĉu vi iam grimpis alten?”

“Jes.”

“Grimpu tien por rigardi kaj firmigu la ŝraŭbon! Se drato delokiĝos, povos okazi granda fatalo.” Tion dirinte li elsakigis sekurigan zonon kaj instrumentojn.

“Bone!” Mi ja volis montri al li mian kapablon. Kiel mi povis preterlasi tiun ĉi bonan ŝancon. Tial mi tuj ĉirkaŭligis taliŝnuron, prenis la instrumentojn kaj komencis grimpi supren.

“Zorgu pri sekureco! Piedpremu stabile la piedtabulojn!” li konsilis senĉese.

“Estu libera de zorgoj!” mi respondis senzorge.

Pli kaj pli alten mi grimpis, kvin metrojn, dek metrojn, dek kvin metrojn. . . . . Kiam mi grimpis ĝis la alteco de dudek metroj, miaj kruroj komencis tremi. Mi subkonscie ĵetis rigardon supren. Aĥ! Turniĝis la ĉielo. En miaj okuloj ekbrilis fajreroj. Ŝajnis ke la fera turo estus falonta unuflanken. Mi eksentis froston en mia dorso. Kun okuloj fermitaj mi ĉirkaŭprenis la turon per ambaŭ brakoj. Miaj kruroj estis tiel malfortaj kvazaŭ ili estus el kotono. Kiam mi praktikis en la lernejo de teknikaj laboristoj, mi grimpis plej alte nur cementan stangon dek ses metrojn altan. Ja estis

la unua fojo dum mia tuta vivo ke mi surgrimpis tiel altan feran turon.

“Ne timu! Estu trankvila! Ne rigardu malsupren, sed grimpu rekte supren!” La aplomba tono de Majstro Gu eĥis en miaj oreloj. Mi ektrankviligis min, plikuraĝigite grimpis supren laŭ lia direkto kaj unuspire grimpat-atingis sub la porcelanajn pendizolilojn. Zorgeme mi alligis la sekurigan zonon kaj rajdante sur transversa trabo atente esploris, sed trovis nenion en malordo. “Troviĝas neniu malfirma ŝraŭbo!” mi laŭte kriis tra la funelo formita per la manoj.

“Rigardu pli supren!” kriis la majstro al mi.

Mi denove levis la kapon kaj zorgeme rigardis supren. Efektive tie sur la subtenilo de la tera drato malfirmiĝis du ŝraŭbingoj ĉe artikpunktoj. Mi rapide elprenis tenajlon kaj plifirmigis ilin. Mi pensis: “Vere li meritas sian reputacion. . .” Ekde tiam mi ne plu kuraĝis malestimi lin.

## II

Post la Printempa Festo kaj la Lanterna Festo (la 15-a tago de la unua monato), mi forlasis mian naskiĝ-

lokon kun nedisiĝema sento kaj trajne veturis al la lini-inspekta stacio. Kiam mi preterpasis Pekinon, mi speciale devagoniĝis por viziti Majstron Gu, esperante reveni kune kun li. Sed mi ne trovis lin hejme. La edzino de la majstro diris al mi bedaŭre: “Mia maljunulo estas nekvietema kvazaŭ simio. Nur la Novjaran Tagon li pasigis trankvila. La duan tagon li komencis maltrankviliĝi kaj la trian li haste forrapidis!”

Antaŭe mi intencis pasigi kelkajn tagojn en Pekino por bone min distri, sed aŭdinte kion diris la edzino de la majstro, mi sentis, kvazaŭ ekbrulis fajro en mia koro, kaj mi jam ne povis resti. Tiuvespere mi hastis reveturi al la inspekta lini-stacio.

Nia lini-inspekta stacio estas en tre fora soleca loko. Post devagoniĝo mi devas ankoraŭ iri tridek liojn tra dezerto kaj dek kvin liojn tra forsta regiono. La stacio troviĝas en kaduka antaŭa templo de la Mara Reĝo konstruita sur montodeklivo, kie multas groteskaj rokoj. Ĝi estas bona loko por kontrolado, de kie oni povas superrigardi la elektrolinion ĝis la distanco de dudek lioj.

En la vespero de mia reveno, mi regalis mian majstron per la peklita viando kiun mi kunportis de mia hejmo kaj ni kune ĝuis abundan vespermanĝon. Post tio ni babilis longe antaŭ la enlitiĝo.

En la unuaj monatoj la vivo estis sufiĉe streĉa kaj interesa. Tage Majstro Gu instruis al mi teknikon per demonstrado, tiel ke tre rapide mi ellernis la metion de lini-kontrolado kaj riparado. Vespere, kiam ni sidis ĉirkaŭ tend-fajro sub la luno, li rakontis al mi sian sperton en urso-kaj cervo-ĉasado kaj antikvajn legendojn sur la stepo. Estis treege interese. Kiel fiera mi estis, kiam mi sukcesis inspekti sola la unuan fojon! Kaj Majstro Gu estis tiel ĝoja, ke li speciale iris al la Proviza Kooperativo dek liojn for de nia stacio kaj aĉetis duonĝinon da sorgobrando kaj al la birdo-ensvarmata regiono kaj ĉasakiris pli ol dudek grasajn sablotetrojn.\*\* Reveninte li fritis ilin kaj ni kune frandis la bongustaĵojn trinkante la nektaron. Nia interbabilado daŭris ĝis profunda nokto.

La laboro de lini-inspektado estas kaj banala kaj unu-tona. Ĉiutage oni iradas ĉirkaŭ la stangoj kun tri dratoj. Ĝi enuigis min antaŭ ol forpasis unu jaro. Sed Majstro Gu estis ĉiam serioza kaj plenokupata. Ĉiun tagon li nepre ripetfoje rigardis kaj esploris stangon post stango kaj neniam sentis sin tedita, ne grave ĉu la vetero estas venta aŭ pluva kaj ĉu al la transsenda linio okazis io erara aŭ ne. Mi pensis, ke pro sia troa zorgemo li faras al si senbezonaĵojn malagrablajn.

“Vi estas tro rigida, Majstro,” foje mi diris al li nere-teneble. “La transsenda linio ne estas el papero. Nenio erara povas okazi, se ne ventas aŭ pluvas. Kial vi iras ĝin prizorgi ĉiutage, tiel ke vi povas ripozi nenium tagon?”

“Ne. Estas popoldiro, ke oni timas ne miliardon, sed hazardon. Se hazarde okazos eraro, la perdo estos granda. Se haltas elektrofluo eĉ unu sekundon, la fabrikoj produktas multe malpli da riĉaĵoj por la ŝtato!” Li diris severe: “Oni devas esti neniam malseriozaj en la plenumado de laboro kia la nia, ĉar la ŝarĝo sur

niaj ŝultroj estas tre peza!” Tion aŭdinte, mi tute ne samopiniis kun li, pensante: Kiel povas esti tia hazardo? Mi jam inspektis pli ol unu jaron, sed ankoraŭ trovis nenan akcidenton. Malgraŭ ke li tiel penis, mi tamen ne volis fari tian vanan fortostreĉon.

Kiam la majstro vidis ke mi inspektis tre senzorge, li fariĝis pli severa. Ĉiutage post mia reveno de inspektado, li ĉiam surmetis siajn konveksajn okulvitrojn kaj kontrolis mian “Inspekt-taglibron” vorton post vorto. Iun fojon, mi skribis jenajn vortojn en la taglibro: “Ŝajnas al mi, ke la 27-a ligna stango de la branĉa linio al la minejo putris.” Leginte tion, li tuj demetis la okulvitrojn, alvokinte min al si kaj demandis gravmiene: “Ĉu ĝi efektive putris? Ej? Ĉu vi esploris? Ĉu sin trovas en ĝi kavo? Ej?.....” Li elmetis senfinajn demandojn por ataki unu punkton furioze, ke mi longe balbutis ne povante doni klaran respondon.

“Junulo, tio estas ne permesebla! Oni devas labori honeste, sed ne ŝajnige!” Post tio li insistis iri tien por fari refojan esploron, kvankam baldaŭ jam vesperiĝos. Ĉar mi ne sukcesis lin kontraŭpersvadi, mi estis devigita akompani lin pli ol dudek liojn sur montvojo kaj alvenis al la loko. Li atente observis la marĉojn ĉirkaŭ la stangbazo kaj trovis grize verdajn ŝimmakulojn. Poste li batis la stangon per la mano kaj aŭdis kavan sonon. Post momento da meditado li tiris de sia zono pikilon, kiun li forte enpuŝis en la trunkon de la stango. Efektive putris ĝia interno!

“Ah, kiel terure ĝi putris!” li diris rektigante la korpon kaj aldonis kun firma decido: “Raportu al la Stacio de Lini-protektado ĉivespere kaj petu ke la stango estu tuj ŝanĝita!”

Kvazaŭ lernanto farinta malbonon kaptita de la instruisto, mi ruĝiĝis pro honto kaj klinis la kapon senparole.

“Konscio pri la respondeco estas plej grava en ĉiu ajn laboro. Neniam ludu ruzaĵon, ĉar ni apartenas al la laborista klaso!” Reveninte al la stacio, la majstro babiladis longe, sed mi neniam aŭskultis.

Post tio en ŝajno mi montriĝis serioza kaj penis en ĉio ne fari iun ajn eraron, kiun la majstro povos kapti por min riproĉi, sed en la koro mi pli kaj pli malŝatis mian metion. Kiom teda ĝi estas! Printempe oni devas inspekti paŝante en malvarmega koto; somere oni devas labori inter verdaj kreskaĵoj plialtaj ol homo; aŭtune, post la rikolto, inspektante oni devas zorge eviti pintajn stoplojn sub la piedoj; kaj vintre oni devas kontroliri sur senvoja dezerto spite al frosta neĝoŝtormo..... Ĉiun tagon oni laboras nekonate en montvaloj “izolitaj de la ekstera mondo”. La vivo simple estas ekstreme unutona kaj seninteresa. Mi pensis, ke tia ĉi okupo estas vere senperspektiva, en kiu neniu povas fari ion grandan meritplenan. Tial mi intencis transposteniĝi al la Taĉmento de Instalado, kies laboro devas esti multe pli interesa ol la nia. Sekve ne sciiginte la majstron, mi sekrete sendis al la Sekcio pri Personaro de la Oficejo kelkajn petskribojn sinsekve, insistante ke ĝi min transpostenigu.

Iuvespere, estis mia noktodejoro. Post vespermanĝo mi eliris deĵori kun lanterno en la mano. Estis severa vintro kaj la vetero estis eksterordinare malvarma. Furiozis kirlovento kunportanta glacierojn, kiu akre

\*\**sablotetro: Syrrhaptis paradoxus Pallas.*

trancis al mi la vizaĝon. Farinte du ir-reirojn sur la susurantaj glacieroj kun kuntirita kolo, mi trovis nenion en malordo. Tial mi elektis iun kavon ŝirmatan kontraŭ vento, ĉirkaŭvolvis mian korpon per la malnova palto el ŝafpelto kaj tuj ekdormetis. Proksimume en la noktomezo, min abrupte vekis iu kruda tertremiga muĝo kaj mi tuj sidigis. Ĝi estis la voĉo de Majstro Gu simila al la sono de sonorilego.

“Malgranda Li.....! Malgranda Li.....!”


“Jes! Pro..... kio.....? Mi..... estas..... ĉi tiel!” Iu antaŭsento de malbona aŭguro min atakis. Rapide mi kuris tien kun la svingiganta lanterno.

“Okazis akcidento!” li diris anhelante. “La Stacio de Lini-protektado ĵus telefonis al mi, ke ekmalfermiĝis la cirkvito en la elektrejo. La kurento jam ĉesis du minutojn!” Sub la lumo de la lanterno mi vidis, ke elstaras liaj bluaj vejnoj kaj ruĝas liaj okuloj.

“Ah!.....” Ekŝvelis mia kapo.

“Rapidu! Pro kio gapi stulte? Inspektu orienten laŭ la turoj!” Tion dirinte, li eksvingis manon kaj mi sekvis lin en konfuziteco. Ĉar la vojo estis tre glitiga pro glacio kaj la mallumo estis tiel densa, ke ni ne povis vidi niajn proprajn manojn, ni ofte glitfalas. Jen falante jen rampante li haste kuris antaŭen. Ĉe ĉiu turo li haltis kaj ĝin prilumis per elektrotorĉo por trovi signon de la kaŭzo de la akcidento. Ni kuris kaj kuris. Kvantkam estis severa vintro, ni ambaŭ estis ŝvitplenaj tutkorpe kaj niaj palpebroj kovriĝis per prujno. Post kapturna kurado preter pli ol kvardek turoj, ni ankoraŭ ne trovis ian difekton. Mi komencis ŝanceliĝi en mia koro kaj diris bruspirante: “Eble — la akcidento okazis en alia parto. En nia parto — ne povas esti —” Sed la majstro estis surda al miaj vortoj, daŭrigante sian kuradon rekte antaŭen.

“Rigardu! Drato falis sur rulaĵon!” Dum mia hezitado, li subite haltis kaj kriis montrante al la antaŭo per la lumo de la elektrotorĉo. Mi direktis la rigardon en ĝian direkton kaj vidis, ke efektive sin liberigis metalfadeno de la faden-krampilo kaj svingiĝis supren kaj malsupren kvazaŭ serpento.



“Rapidu! Iru alporti faden-streĉilon!” li ordonis al mi en severa tono. Post tio li sin ĵetis antaŭen sola kaj kun sia pelta palto disetendita de la frosta vento, kvazaŭ aglo svinganta la fortajn flugilojn. Kiam mi faletante alkuris al la turo kun duhoka faden-streĉilo sur mia ŝultro, la majstro jam delonge grimpis sur la turon. Li pene levis la aluminian fadenon, kaj ĝin li tiris per sia tuta forto sur la faden-subtenilon.

“Rapide donu al mi la streĉilon!” Li ĵetis sian ŝnuron malsupren. Mi rapide alligis la streĉilon. Ĝin suprentirinte per la ŝnuro, li eklaboris rapide.

“Tuj sciigu al la elektrejo, ke oni fermu la cirkvito!” Forte li svingis la manon al mi.

Kiam mi revenis post telefonado, li jam malsupreniĝis. Ekscitite mi firme tenis liajn manojn, kaj sentis ion malseka. Sub la lumo de la lanterno mi rigardis. Ah, estas ruĝa sango!

Vidinte tion, mi ne povis reteni miajn larmojn, dirante: “Majstro, vi multe..... suferis!” Senzorge ridetante, li diris: “Nun ĉio jam en ordo! Denove fluas la kurento!”

“Mi prirespondas pri tiu ĉi akcidento. Estis tute pro mia malatento dum la inspektado. Majstro, severe min punu!”

“Sufiĉas, se vi konas la eraron!” li diris milde. “Ĉu vi de nun ankoraŭ diros, ke la lini-inspektado ne estas grava? La elektraĵdratoj estas la arterioj de la lando. Kia danĝero se la arterioj interrompiĝas! La maŝinoj ne plu povos funkcii. La urboj fariĝos plene mallumaj..... Kiel peza estas la ŝarĝo sur niaj ŝultroj!”

Por diri la veron, tiu akcidento donis al mi vere profundan lecionon, kiun mi neniam forgesos dum mia tuta vivo. Ĝi ne nur igis min scii la gravecon de lini-inspektado, sed pli grave igis min koni la noblajn kvalitojn de Majstro Gu kaj scii kiel labori kaj vivi. Tiam la sekreto en mia koro ne povis esti kaŝita plu. Mi elverŝis al li ĉiujn miajn erarajn pensojn kaŝitajn profunde en mia koro kaj samnokte skribis al la Oficejo, petante ke mia pet-skribo pri transposteniĝo estu nuligita. Mi decidis resti ĉe Majstro Gu kaj labori kiel lini-inspektisto dum mia tuta vivo.

“Malgranda Li, ne restu pro via dankemeco al mi. Pensu, ke vi estas ano de la Komunista Junulara Ligo kaj posteulo de la laborista klaso. Vi devas obei la bezonojn de la afero de la klaso kaj fariĝi ruĝa daŭriganto. En la pasinteco multaj homoj demandis al mi, kial mi povas esti por ĉiam progresema, kaj mi ofte respondis jene: Mi aspiras nek al famo, nek al profito. Mi amas nur la aferon de socialismo, ĉar mi estas komunisto kaj ano de la laborista klaso, kiu jam fariĝis mastro de la lando!”

Antaŭe mi estis malpacienca kiam mi aŭdis principan rezonadon. Sed nun mi trovas ke ĉiu el liaj vortoj estas ŝlosilo por malfermi mian koron kaj ke ju pli mi aŭdas, des pli klera mi fariĝas.

(Daŭrigota)

Trad. PANDIŜO

# POST LA KURSO

Vortoj kun "" estas klarig-itaj en "Nia Vortareto"

*Nofhan: Letero al Malproksimaj Amikoj (XII)*

## PRI LA "INSTITUCIO DE KUNLABORADO INTER ĈINIO KAJ USONO"

Karaj geamikoj!

Vi parolis pri "kun-labor-ado kun Usono". Sed vi ne diris klare, ĉu kun la usona popolo, aŭ kun la usona reg-ist-aro kiu praktikas agresan kaj militan politikojn (t. e. la usona imperi-ismo). Se temas pri la usona popolo, kunlaborado estas ĉiam necesa; se temas pri la usona imperiismo, la afero estas tute alia.

La ĉina popolo jam longe rilatis kun la usona imperiismo. La vorto "kunlaborado" facile memorigas al la ĉina popolo la "Institucion de Kunlaborado inter Ĉinio kaj Usono", kiu estis tipa produktaĵo de kunlaboro inter la reakcia Ĉiang Kajšek-kliko kaj Usono.

La plena nomo de la institucio estis "Institucio de Kunlaborado inter Ĉinio kaj Usono pri Specialaj Teknikoj". Kio estis la "specialaj teknikoj"? Ili estis teknikoj de turmentado kaj mortigado de revo-

lucioj kaj patriotoj de la landoj kun kies reakci-uloj Usono kunlaboris. La "Institucio" estis terura mal-liber-ejo, kie estis praktikataj tiuj specialaj teknikoj. Laŭ grandeco ĝi multe superis la francan Bastille; laŭ kruel-eco ĝi superis la koncentr-ejon de Oświęcim de la hitlera Germanio.

Tiu "Institucio" havis sian sidejon ĉe la piedo de Gele-monto nord-okcidente de la urbo Ĉongking, Siĉuan-provincino. Ĝia teritorio ampleksis longe kaj larĝe pli ol dek kilometrojn. Sur la loko estis konstruitaj pli ol 800 domoj. Inter ili estis malluma kaj fortika malliberejo, tenejo de municio\* kaj militaj materialoj konstruita de Usono, klasĉambroj por trejni 2,000 sekretajn policanojn, loĝejoj por 1,800 gard-istoj kaj domoj por usonaj sekretaj policanoj sufiĉaj por enteni 1,000 personojn. Plie estis loĝpunktoj por la familioj de la sekretaj policanoj kaj elementa lernejo por iliaj infanoj. La ĉef-uloj de la sekreta polico de Ĉiang Kajšek-kliko kaj tiuj de ĝia usona mastro havis tie tre luksajn loĝejojn. La fi-fama iama usona ambasadoro\* Hurley ankaŭ loĝis tie por certa tempo. Krome estis banko, vendejoj, radio-telegrafejo, presejo ktp... sen manko de io necesa. Estis vere reĝlando de sekreta polico de Ĉinio kaj Usono.

Tiu homa infero, en la vera senco de la vorto, estis konstruita en 1942 de la usona imperiismo kaj Ĉiang Kajšek-kliko sub la nomo de "helpo al Ĉinio". La vera mastro de tiu "Institucio" estis usonano nomata Miles. La usonaj sekretaj policanoj instruis tie teknikojn de sekreta


polico kaj uzadon de inter-nacie mal-permes-itaj murd-iloj, kiujn Usono liveris. La ŝtalaj skurĝoj kaj katenoj\* tie uzataj estis ĉiuj kun surskribo de "USA".

Publike kaj sekrete la ĉinaj kaj usonaj sekretaj policanoj murdis tie multajn revoluciulojn. En la 27-a de novembro 1949, tri tagojn antaŭ la liberigo de Ĉongking, ili mortigis samtempe pli ol 300 revoluciulojn tie malliberigitajn, inkluzive infanojn. Ankaŭ la fama generalo Jang Huĉeng, kun-iniciat-into de la Hi-ana Incidento, kiu postulis reziston kontraŭ Japanio antaŭ la Kontraŭjapana Rezistmilito, estis mortigita tie. En neokupitaj spacoj, legom-kampoj, eĉ flor-plena ĝardeno kaj sub la planko de iuj ĉambroj ĉie estis en-ter-ig-itaj revoluciaj martiroj\*.

Kiuj estis foje ĵetitaj en tiun homan inferon, estis malfacile eliri vivaj. Sed la demonoj ne lasis facile morti la viktimojn. La martiroj devis tra-sperti ĉiujn pli ol 130 senhom-ecajn torturojn, kiujn la demonoj elpensis. "Tigra benko", "elektra puno", "fer-brulo", "pikado de mam-pinto", "enterigo dumviva", "dron-igo", "mort-akompano" kaj aliaj torturadoj estis iliaj kutimaj punoj.

Sed ĉiuj tiuj torturadoj restis senefikaj al veraj revoluciuloj. Estis komparti-ano nomata Hju Gianje, al kies dek fingroj la sekretaj policanoj enbatis sub la ungoj bambuajn pinglojn por devigi lin konfesi. Sed li ne ĉesis riproĉi la sekretajn policanojn antaŭ sia senkonsciigo, kaj laŭte kriis al ili: "Venu kun ĉiuj viaj torturiloj! Nenio min timigos!"

1. La enirejo de la "Institucio de Kunlaborado inter Ĉinio kaj Usono" en Ĉongking
2. Restaĵo de unu el la malliberejoj de la "Institucio de Kunlaborado inter Ĉinio kaj Usono" en kiu Uson-Ĉiang-aj sekretaj policanoj masakris la politikajn malliberulojn kaj intencis kaŝi sian krimon per forbruligo de la kadavroj.



Alia kompartiano Ĉen Jan traspertis ĉiajn torturojn kaj estis kelkfoje enterigata viva, sed li diris nenion pri la partia sekreto. En sia post-las-ita poemo "Mia Konfeso" li skribis:

*Tintu la pezaj katenoj,  
Levu alte vian skurĝon.  
Ne bezonas mi la "liberecon" vian,  
Eĉ kun brusto antaŭ bajoneto.*

*Kiel homo mi ne klinos mian kapon,  
Nur timulo petas "liberecon".  
Ja nenio estas via torturado.  
Eĉ la Morto ne sukcesos min ekparoligi!*

*Rekte kontraŭ morto mi ridegas  
laŭte,  
Tiel ke l' palaco de l' demonoj  
tremas ŝanceliĝe;  
Jen konfeso de mi komunisto,  
Alta kant' funebre al la entombig'  
de Ĉiang-reĝimo.*

La sangaj kruelaĵoj de la usona imperiismo kaj la pri-kant-indaj hero-ajoj de la revoluciaj martiroj okazintaj en la "Institucio de Kunlaborado inter Ĉinio kaj Usono" estis tro multaj. En tiu ĉi mallonga letero mi povas nur tuŝi unu du punktetojn. Estas romano titol-ita *Ruĝa Roko*, kiu estas verkita sur la bazo de faktoj. El ĝi oni povas koni tiun "Institucion" pli vaste kaj ankaŭ ekkomprenos pli profunde, kio signifas "kunlaboro" kun la usona imperiismo.

### Batalrakonto de Vjetnamio

## TRI JUNULINOJ SAĜE EKSTERMIS MALAMIKOJN

En Quang Nam-provinco de suda Vjetnamio oni rakontas inter si la

historion pri tri junulinoj, kiuj ekstermis grupon da malamikoj.

De kelkaj tagoj la kanajla ĉefo de la pup-arme-anoj posten-igis siajn sub-ulojn vespere ekster la "strategia\* vilaĝeto" por kapti surprize revoluciajn funkci-ulojn, kiuj ofte venis al la vilaĝo ŝtele.

Revenante de foiro renkont-igis la tri junulinoj Go Mai, Go Jung kaj Go Hua. Ili tre maltrankvilis ne sciante, ĉu la revoluciaj kamaradoj jam sciis pri la afero. Sendi informon al la kamaradoj ne eblis, ĉar la vojo estis jam fermita. Kion fari, se la kamaradoj venos al la vilaĝo? La tri knabinoj longe interkonsil-igis kaj venis al decido: "Ni batalu!" Kaj ili faris detalan planon.

Tuj post noktiĝo, Go Jung vidis ke la ĉefo de la pup-arme-anoj kondukis grupon da soldatoj iri al la tombejo ekster la vilaĝo kaj alia grupo al la alia flanko.

Go Jung tre ĝojis en si, ĉar la malamikoj agis, ĝuste kiel konjekt-ite\*. Ŝi tuj prenis plen-brak-umon da pik-iloj kaj ŝtele iris laŭ la vojo ĵus irita de la malamikoj. Kiam ŝi atingis la voj-kruc-igon, ŝi trovis ke ankaŭ Go Hua alvenas. Ili ambaŭ rapide star-igis firme la al-port-itajn pikilojn sur la vojo kondukanta de la tombejo al la vilaĝo.

En la sama tempo, Go Mai enigis kvar kartoĉojn\* en amason da riz-ŝeloj, malrapide ekbrulantan apud for-las-ita kabano, kiu troviĝis meze inter la du kaŝ-lokoj de la pup-arme-anoj.

La sin-kaŝ-antoj ne trovis eĉ unu "Vjet Kong-on" (vjetnama komunisto) ĝis profunda nokto. Iuj eĉ

dormetis. Subite aŭdiĝis ekpafo. Kaj poste ankoraŭ kelkaj pafoj. Tion kaŭzis la kartoĉoj, kiujn atingis la brulado de la amaso de riz-ŝeloj.

"Vjet Kongoj, Vjet Kongoj!" Ekkriis la ĉefo kaj kuris al la direkto de pafado mem pafante. Liaj subuloj lin sekvis. Post kelka distanco, li kaj la unuaj kurantoj surpaŝis pikilojn kaj falis. Tiel ili faligis ankaŭ la postkurantojn. La pikiloj enpuŝiĝis en la korpojn de la falintoj, iuj je membroj, aliaj je brusto aŭ ventro, tiel ke la falintoj terure kriaĉis.

La maldekstra plando de la ĉefo estis trapikita. Kiam li pene sukcesis levi sin, subite alflugis kugloj de flanko. Ĉar ankaŭ la sinkaŝinto en la alia flanko alrapidis por ataki "Vjet Kong-ojn". En mallumo la pup-arme-anoj komencis energie batali inter si.

Kiam ili rimarkis sian eraron, pli ol 10 soldatoj jam estis vunditaj kaj mortigitaj. Inter la lastaj estis la ĉefo.

### Nia Vortareto

**ambasador-o** — plej alta reprezentanto de unu regno ĉe iu alia.

**kartoĉ-o** — kunmetaĵo de kuglingo kaj de kuglo, uzata por pafiloj.

**katen-o** — fera ĉeno por ligi la membrojn de malliberulo.

**konjekt-i** — opinii surbaze de eventualaĵoj.

**martir-o** — homo, kiu suferis morton aŭ turmentegojn pro kredo.


**munic-i-o** — militaj pafaĵoj.

**strategi-o** — arto prepari planon de milito.

3. *La Baj-Gongguan ĉirkaŭata per elektra pikdrata barilo*

4. *Observejo super la ĉirkaŭmuro de la malliberejo ĉe Ĝazidong*

5. *Miles, la usona spiono de la "Institucio de Kunlaborado inter Ĉinio kaj Usono" kies manoj estas makulitaj per la sango de la ĉina popolo.*



# Kontraŭ Pirato Efikas Nur Rebato



*Ne lasu forfuĝi ankaŭ la aerajn banditojn.*

*Supre maldekstra: Usonaj agresantoj ĉie klopodas kapti kaj mortigi vjetnamajn popolanojn inkluzive de infanoj.*

*Sube maldekstra: Senkulpaj popolanoj en suda Vjetnamio fariĝis viktimoj de la usonaj agresantoj.*

*Supre dekstra: Jen praktiko de la politiko de "bruligita tero" de la Johnson-registaro!*

*Sube dekstra: Usonaj agresantoj disŝutis grandan kvanton da toksaĵo en la ĉirkaŭaĵo de Sajgono.*









*Flugrapide antaŭen marŝas trupo de la Liberiga Armeo de Suda Vjetnamio por ĉirkaŭi usonajn agresantojn.*



*Tran Kim Ky, heroa plotonestro de sudvjetnamia gerila taĉmento*




*Ke neniu usona agresanto forfuĝu.*



*Nova servo de helikoptero de usona "atuta" trupo*

*Usonaj pilotoj revenintaj de batalo*

*Du postvivantaj usonaj paraŝut-soldatoj*



**CERTE TRIUMFOS LA POPOLO DE VJETNAMIO! CERTE MALVENKOS LA USONAJ AGRESANTOJ!** (La Dua Kajero) — Bildolibro eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Formato: 23×25.7 cm. 72 p. Havebla ĉe la Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio, kaj ĝiaj perantoj en diversaj landoj.



Ni jam recenzis ĝian unuan kajeron en nia gazeto (n-ro 5, lastjare). Multaj legantoj skribis al ni ke ili unuafoje informiĝis el la bildolibro ke la okcidenta t. n. "civilizita" lando faris tiajn senhontajn agojn en suda Vjetnamio, ke estas Usono kiu sendis trupojn por agresi fremdan landon, situantan fore je miloj kaj miloj da kilometroj, kaj masakras ĝian popolon sed ne la "Vjet Kong-oj" agresas Usonon, kaj ke estas la usona imperiismo kiu detruas la sendependecon kaj unuecon de Vjetnamio kaj la pacan vivon de la vjetnama popolo. La vjetnama popolo luktas ĝuste por la sendependeco kaj unueco de sia patrolando kaj restarigo de sia paca vivo. La t. n. "pafĉesigo" kaj "intertraktado" de la Johnson-registaro celas nur daŭrigi sian okupadon de vjetnama teritorio kaj liberan murdadon al la vjetnama popolo. Paco povos vere realiĝi en Vjetnamio nur post fortiriĝo de


la usonaj trupoj aŭ kiam la vjetnama popolo ilin plene elpelos. Blinde ĉhadi al la "senkondiĉa intertraktado" de la Johnson-registaro, sendiferencigo de pravo disde malpravo kaj de agresantoj disde agresatoj, helpos nur la usonan imperiismon en ĝia agresa intrigo "restadi daŭre en suda Vjetnamio".

La dua kajero kun 106 fotoj kaj 2 mapoj plie pravas la supre diritan veron per pli multe da novaj faktoj. Ĝuste kiel iu usona leganto diris, ĝi "enhavas pli vastan informadon kaj pli multe da fotoj kaj valoran fon-materialon, tiel ke ĉiuj legantoj povas vidi, kiel la usona imperiismo malobeis la Ĝenevajn Interkonsentojn". La du mapoj klare montras la agresan agadon de la usona imperiismo kaj samtempe ankaŭ ĝian pezan malvenkon kaj la brilan venkon de la vjetnama popolo, kiu fariĝas ĉiam pli forta kun la progreso de la milito. La fotoj pri la armita subpremo kontraŭ la virinoj kaj infanoj, persekuto kontraŭ budhismaĵoj, uzado de venengaso por mortigi vilaĝanojn kaj venenkemiaĵoj por detruigi kampojn kaj plantaĵojn, perfortoj kaj rabadoj, kaj murdado de vjetnamaj patriotoj fare de la Johnson-registaro en suda Vjetnamio estas elokventa akuzo kontraŭ la senhomecaj agresantoj antaŭ la tutmonda popolo kiu amas justecon kaj pacon. Kaj ni legas el ĝi ankaŭ la heroecon de la vjetnama popolo, kiu unuanime batalas kontraŭ la potencaj agresantoj tute sentime kaj starigas brilan modelon por la tuta mondo bati la usonan imperiismon per popola milito. Ĉiu, kiu volas informiĝi pri la vera stato de la vjetnama problemo, kaj ĉiu, kiu subtenas la vjetnaman popolon en ĝia rezisto kontraŭ la agresado de la usona imperiismo, devas legi tiun ĉi libron.

**Honfan**

**TIEL LI VIVIS** — Biografio pri la vjetnama nacia heroo Nguyen Van Troi, kolektita de Tran Dinh Van laŭ la rakonto de la vidvino Fan Thi Kujen. Eldono de Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio. Formato: 13×19 cm. 108 p.

La vjetnama popolo estas heroo popolo. Ĝuste kiel iu alilanda ĵurnalisto diris, kiam li vizitis Vjetnamion, ĉiuj vjetnamoj estas herooj.



Tiu ĉi libro estas biografio ĝuste de tia heroo. En la 15-a de oktobro 1965, la 24-jara vjetnama patrioto Nguyen Van Troi estis ekzekutita en Chi Hoa-malliberejo de Sajgono. Li restis flegme nefleksebla antaŭ la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj ĝis la ekzekutiĝo. Lia voĉo sonis tra la tuta mondo kaj juĝis la usonan imperiismon nepre fiaskonta kaj pereonta je konsterno de la usonaj agresantoj kaj iliaj lakeoj diskonigante lian nomon tra la tuta mondo.

Nguyen Van Troi estis elektrolaboristo en suda Vjetnamio. En majo 1965 li estis akuzita pri atenco kontraŭ la vivo de McNamara, la Sekretario de Defendo de Usono, per mino. Post la aresto li estis terure torturita kaj kondamnita de la milita juĝejo al morto.

En la tago de ekzekuto la usonaj imperiistoj kaj iliaj lakeoj alvokis kelkdekon da okcidentaj ĵurnalistoj al la malliberejo por rigardi la plenumon de la mortpuno. Evidente ili tion faris kun sia aparta intenco. Sed ilia intrigo vaniĝis. Kvankam la heroo estis korpe malforta pro longa turmentado, sed en lia spirito kaŝiĝis senfina energio. Fronte al la ŝargitaj pafiloj, kiuj lin mortigos, kaj trovante ĉerkon kun usona marko apude, li estis tute trankvila, senĝena kaj plena de fido. Li akuzis la usonajn agresantojn kaj la naci-perfidulojn, kiuj elvendis la interesojn de la vjetnama popolo. Li laŭte kriis: "For el Vjetnamio la jankioj!" Kaj li diris: "Mi estas senkulpa. Mi faris nenion kriman kontraŭ la popolo. Mi ne perfidis la vjetnaman popolon..."

Kiam iu pastro venis por instigi lin al konfeso, la mortonto ne ĵetis

## PEKINAJ GEESP-ISTOJ PASIGIS GAJAJN HOROJN

Ĉe alproksimiĝo de la jaro 1966, la Ĉina Esperanto-Ligo okazigis en Pekino amuzan kunvenon kun duobla signifo de festado.

La kunvenon ĉeestis gvidantoj de la Ligo, la tuta personaro de ĝia Libroservo, la redakcio de *El Popola Ĉinio* kaj la Esperanta Sekcio de Radio Pekino, kune kun la diplomitoj el la Esperanto-kurso de la Fremdlingva Fakultato de Pekina Brodkasta Instituto kaj Esp-laborantoj de aliaj organizoj en Pekino.

Sur la ruĝa kurteno en la kunvena halo brilis la oraj vortoj "Feliĉan Novjaron!" kaj "1966". Ĝojo kaj ekscitiĝo ondis en la koro de ĉiu ĉeestanto. Estas vere ke en 1965, la ĉinaj Esperanto-laborantoj akiris nemalgrandan sukceson en servado al la popolo de Ĉinio kaj de la mondo. Tio estas priĝojinda por ĉiu esperantisto en Ĉinio. Kaj aparte menciinda estas tio, ke la tria diplomitaro el la Esperanto-kurso de la Pekina Brodkasta Instituto alportis novan vivforton kaj junecan sangon al la esp-aj laboroj de Ĉinio.

En sia parolado, la prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, k-do Hujucz montris ke en la bonega situacio en kaj ekster la lando, la nuna tasko de la ĉinaj Esperanto-laborantoj estas uzi Esperanton kiel ilon por servi pli bone la popolon de Ĉinio kaj de la mondo. Li esprimis ankaŭ sian gratulon al la diplomitoj el la Espe-

ranto-kurso de la Pekina Brodkasta Instituto kaj donis al ili varman kuraĝigon.

En pli-ol-unujara lernado, tiuj gejunuloj akiris fundamenton de Esperanto kaj komprenis kiel uzi tiun ĉi ilon en servado al la popolo. Ilia reprezentantino parolis tiel flue kaj arde en Esperanto, ke ŝi rikoltis varmajn aplaŭdojn de la tuta ĉeestantaro.

Sekvis la amuza programo el esp-aj kantoj, deklamoj, dancö, ludo de multkorda muzikilo k. a. de la diplomitoj, gek-doj de la Esperanto-sekcio de Radio Pekino kaj aliaj junaj geesperantistoj. La programo finiĝis per rigardo de "Brila Festotago" la unua longa dokumenta kolora filmo en Esp. farita de Ĉinio. Kvankam tiun ĉi filmon kun ĉinlingvaj klarigoj oni jam antaŭe rigardis, eĉ ne nur unu fojon, tamen ĉifoje aŭskultante la esperantaj klarigojn kaj rigardante la bildojn pri la diversflankaj rapidaj progresoj de la patrolando, oni sentis, ke la ĉinaj Esperanto-laborantoj havas la devon bone informi la popolon, kaj unue, la esperantistojn de la tuta mondo pri tiuj ĉi atingajoj.

## LA UNUA KUNVENO DE ESPERANTISTOJ EN DRESDENO

La esperantistoj de Dresdono (Germana Demokratia Respubliko) okazigis sian unuan solenan festeton la 9-an de julio, 1965. Kunvenis ĉirkaŭ 250 ges-roj, parte esp-istoj parte interesuloj. Estis fondita la loka laborrondo en la "Germana Kultura Ligo". Alvenis salutleteroj de E-organizaĵoj el diversaj landoj. La Dresdona estas la unua distrikta laborrondo post la fondiĝo de la centra rondo en Berlino. Unuanime

estis akceptita protesta rezolucio kiu kondamnis la usonan fibataladon kontraŭ la heroo popolo en Vjetnamio. La nove starigita laborrondo ekde tiam jam finis sep kursojn por komencantoj kun ĉ. 150 partoprenantoj. Sekvos baldaŭ novaj kursoj krom tiuj por progresantoj, kaj krome oni kunvenas por konversacii ĉiumonate.

## LA JUBILEA 50-A BRITA KONGRESO DE ESPERANTO

La 50-a Brita Kongreso de Esperanto okazos de la 27-a ĝis la 30-a de majo, ĉijare en Norfolk, Anglio. Ĝi estos relative granda jubileo en la historio de la Esperanto-movado en Anglio. Estas informite, ke oni bonvenigas partopreni la kongreson geesp-istojn ne nur enlandajn, sed ankaŭ eksterlandajn. Adreso de la kongresa sekretario: S-ino E. Watson, 5 Rolleston Close, Norwich, Norfolk, Britio.

## LA 5-A INTERNACIA KULTURA SEMAJNO EN "GRESILLON", FRANCIO

La Unuiĝo Franca por Esperanto organizos ĉijare la 5-an Internacian Kulturajn Semajnojn de la 1-a ĝis la 8-a de aprilo, en la Kastelo Gresillon. Tiu ĉi aktivado estas sub la aŭspicio de la Ministerio de Edukado de Francio. En la dirita semajno, estos prelegoj de eminentaj esp-istoj, kurso de praktika Esp-o, ludoj, vesperkunveno, ekskurso al Loire k. a. Por 5 eksterlandaj gejunuloj oni oferdonos senpagan restadon. Ĝia adreso estas: Union Francaise Pour L' Esperanto, 34, Rue de Chabrol-Paris (10<sup>e</sup>), Francio.

al li eĉ ekrigardon. La malamikoj lin ligis al fosto por lin pafi, sed li ne ĉesis akuzi: "La usona imperiismo venas ĉi tien por fabriki mortojn kaj tragediojn." Kaj tiel li estis heroe pafita, kriante: "For la usonan imperiismon!" "For Usono-Nguyen-klikon!" kaj trifoje "Vivu Prezidanto Ho!" Post la forsono de la unua salvo, oni ankoraŭ aŭdis lian mallaŭtigantan krion: "Vivu Vjetnamio!"

La heroeco de Nguyen Van Troi montris la decidemon kaj fidon de nepra venko en sia kontraŭusona kaj nacisava batalo de la tridekmiliona vjetnama popolo. Unu Nguyen Van Troi falis, miloj kaj dekmiloj da novaj levigaĵoj kontraŭ la usonaj agresantoj. Li fariĝis modelo ne nur de la vjetnama popolo, sed ankaŭ tiu de la popoloj de la mondo, kiuj luktas por sia sendependeco kaj liberiĝo.

La vidvino de la heroo rakontis tre kortuŝe lian vivon kaj lukton kaj sian travivaĵon post la arestiĝo de la edzo. Tre emocie estas rakontitaj ankaŭ la sentoj de la kunluktantoj kaj sajgonanoj al la martiro. La libro estas de tia speco, kiun oni, komencante legi, ne povas forlasi ĝis la tralego. Mi sincere rekomendas ĝin al ĉiuj esperantistoj.

Veren

**LA PLEJ GRAVA AFERO**

La vjetnama problemo, nuntempe, la plej grava afero sur nia planedo, min tre interesas. Mi ŝategas la heroe batalantan kaj suferantan vjetnaman popolon. Pri tio, kio en Vjetnamio nun okazadas, estas necese informadi la tutan mondon. Bonvolu skribi pri tio plu kaj pli multe.

Ŝ. M., ĈSSR.

**ĈIUJ KONU VJETNAMION!**

La artikoloj pri Vjetnamio estas tre bonaj. Ĉiuj homoj en la tuta mondo devas koni vivon en Vjetnamio.

H. H. P., Danlando.

**REGULE INFORMU PRI VJETNAMIO**

La vjetnama problemo certe estas nun la plej grava afero en la mondo. Ĝi estas sufiĉe informita en nia komuna E-revuo. Ĉiuj artikoloj pri tiu ĉi temo enhavitaj en la jarkolekto 1965 tre bone respegulas intencojn de la usona agresantaro kaj ili ankaŭ montras la streĉan batalon de la vjetnama popolo. Estas bone, se konstante kaj regule mi povus legi artikolojn pri Vjetnamio venontjare (t. e. 1966) en nia gazeto.

J. B., Pollando.

**INFORMU PRI LA USONAJ KRUELAĴOJ**

Informo pri la vjetnama problemo estas tre necesa. Informu la mondon pri la usonaj kruelaĵoj ktp.

J. R., Nederlando.

**USONAJ MENSOGOJ SENVUALIĜIS**

La dua kajero de CERTE TRIUMFOS LA POPOLO DE VJETNAMIO! CERTE MALVENKOS LA USONAJ AGRESANTOJ! estas same grava laŭenhave kaj altni-

vela presteknike kiel la numero 1. Tial mi povas doni al ĝi nur superlativojn. Ĝi estas tempodokumento por ĉiuj antiimperiistoj kaj antikoloniistoj en la tuta mondo; dokumentara libro pri la vjetnama evoluo sub la premo de la imperiista militado de Usono. Ĝi prezentas faktojn pri la "malpura" usona agreso kontraŭ lando, kiu nur volas konstrui sian propran estontecon kaj vivi en paco. Kaj la bildlibro senvualigas la mensogojn de la usonaj presagentejoj. Sekve la bildlibro estas kaj instrua kaj necesa por ĉiu, kiu volas ricevi klaran koncepton pri tio, kio okazis kaj okazas en Vjetnamio, pri la ĉiutageco de la gevjetnamoj, kiuj devas vivi, labori kaj batali sub usonaj bombadoj kaj amerikaj "purigoperacioj".

La bildoj montras klare la hombestiecon de la novfaŝistaj usonaj soldatoj sed ankaŭ la nerompeblan pac-kaj batal-volon de la gevjetnamoj. Neniu, kiu vidas tiujn bildojn povas esti indiferenta pri la tragiko, kiun la amerikanoj disemas, sed devas preni starpunkton kontraŭ Usono kaj por Vjetnamio.

Mi estas konvinkita, ke la bildlibro havas gravan taskon plenumi kaj ke ĝi plenumos sian celon. Tial mi esperas, ke vi daŭrigos la eldonadon, ke venos tri, kvar novaj numeroj ĝis la numero, kiu havos la titolon TRIUMFIS LA POPOLO DE VJETNAMIO! MALVENKIS LA USONAJ AGRESANTOJ!

G. H., Svedio.

**ELPELU LA AGRESANTOJN EL VJETNAMIO**

Via informado pri la vjetnama problemo estas sufiĉa. Min interesas la artikoloj pri la heroaĵoj de la vjetnama popolo. Sed kun plej granda ĝojo mi legus pri la finvenko de ĉi tiu heroa popolo, kaj pri la elpelado de la agresantoj.

S. T., Rumanio.

**MALAPERU LA NUNA HITLER JOHNSON!**

La dua bildlibro CERTE TRIUMFOS LA POPOLO DE VJETNAMIO! CERTE MALVENKOS LA USONAJ AGRESANTOJ! atingis min antaŭ kelkaj tagoj. La malhumanaj kruelaĵoj de usonanoj kontraŭ pacamaj vjetnamoj forte indignigas nin ĉiujn, kiuj amas la justecon. La kuraĝa rezisto de la popolo tamen certe forpelos la agresantojn el sia patrujo. Prezidanto Johnson, la nuntempa Hitler, kaj liaj flatuloj, inkluzive niajn reakciulojn, plej baldaŭ malaperu de la mondo, kies pacon ili malordigas, kaj la mizera popolo reakiros tiam sian pacan vivon, mi firme kredas.

S. N., Japanio.

**KOMENCA MALVENKO DE IMPERIISMA USONO**

Mi estas komunista partiano kaj pro tio la problemo de Vjetnamio antaŭ ĉio interesas min, ĉar laŭ dialektiko de Marx, mi opinias ke malvenko de tie, de U.S.A. estas komenca puŝado al malvenko de imperiismo en U.S.A. Ĉar unue en la okuloj de sia propra popolo, ilia stulteco tiras grandegan honton sur sin mem. Kaj plue tio ekskuegas tutan kapitalistan mondon. Atombombojn ili povas uzi nenie ĉar ili scias sian propran ekstermon.

M. M., Finnlando.


**PROVERBOJ DE VJETNAMIO**

- \* Je minaco de ondegoj ne forjetu la remilon.
- \* Se ventetoj sin kuntordas, uragane ili fortas.
- \* Por estingi flamojn uzu malvarman akvon, por venki malamikojn uzu forton.
- \* Ne subtaksu malamikon nefortan, nek timu kontraŭulon sovaĝan.

# DU BRIKOGRAVURAĴOJ

La brikogravura arto komenciĝis jam en la antikveco de Ĉinio. Precipe la brikogravuraĵoj de Han-dinastio antaŭ la tria jarcento p. K. vekis atenton de arkeologoj. Ĉar ili havas ne nur belartan valoron, sed ankaŭ liveris utilan materialon por koni la tiaman socian vivon.

*bildo 1*



La du brikoj de Han-dinastio en la bildoj 1 kaj 2 estas elterigitaj ĉe Fenghuangŝan en Ĉengdu, Siĉuan-provinco. La bildoj sur ili prezentas la socian vivon de du malsamaj klasoj en forta kontrasto. La supra parto de la bildo 1 montras ĉasadon de la laboranta popolo, tie du ĉasistoj forte streĉas sian pafar-

kon celante sovaĝanasojn kiuj flugas en la aero. Kaj ĝia malsupra parto donas la bildon de riza rikoltado, kelke da kamparanoj svingante sian falĉilon falĉas plantaĵojn. Tiu bildo montras ke la kamparanoj devis multe peni por sin vivteni en tiu tempo.

La bildo 2 prezentas geedzan paron aristokratan, kiu sin distras per plezuroj. Maldekstre supre en la bildo la sidantoj sur mato kun kru-citaj kruroj sub si estas la herooj de la bildo. Povas esti, ke ĵus festeno finiĝis kaj nun venigitaj muzikistoj, dancistoj kaj akrobatoj prezentadas por ilin amuzi.

*bildo 2*



## Sur la Fronta Kovrilo

Komunisto Vang Junĝaŭ estas la ĉefkuracisto de la Radiologia Sekcio de la Pekina Ĝiŝujtan-Hospitalo. Li estas lerta en apliko de la penso de Maŭ Zedong en scienca esplorado pri oftaj osto-malsanoj. En la lastaj du jaroj, li publikigis 12 sciencajn disertaĵojn. Dum sia esplorado, li trovis la regulon en turniĝado de la homa antaŭbrako, starigis normon pri ĝusta rekunigo de rompita osto por la ostokuracistoj, kio ricevis altan takson de la Ŝtata Scienca kaj Teknologia Komisiono kaj aprobojn de en- kaj eksterlandaj ĥirurgoj. Li sukcesis ankaŭ en la studo rilate x-radian esploron de kapilaroj per ordinara ĉina inko.

## Korespondi Deziras

\*Esperanto-rondeto STROJAREN PIESOK, posto PODBREZOVA, ĈSSR, aranĝos letervesperon dum Pasko 1966. Bv. sendi bk. leterojn, esperantaĵojn. Skribu amase! Respondo garantiita.

\*Jenaj italaj s-anoj dez. kor. pri ĉ.t. kun ĉ.l.:

Odriono Teodari, v. Valvenara 13/4-Lovere (Bergamo)

Lorenzo Ferrari, v. Decio Celeri, 1-Lovere (Bergamo)

Benedetto Lardi, v. Valvendra 22-Lovere (Bergamo)

Germano Crisanti, v. Conti 39-Lovere (Bergamo)

\*Esperantistoj de entreprena klubo de banejaj institutoj en Podebrady, 50km oriente de Praha, aranĝos dum 5-12a de junio 1966 6-an renkontiĝon kun antaŭvidata programo:

5-12. VI. ŝakturniro de EŜLI-anoj, filmoj, ekskurso en vitro- kaj facet-fabrika. Trarigardo de urbaj vidindaĵoj. Ekskurso per motor-ŝipo.

11. VI. Kultura programo kaj danco.

Per belaj rememoraĵoj estos premiitaj: plej maljuna, plejmalproksima kaj plejnova partoprenanto eĉ ĉiuj unuopuloj. Pluajn informojn petu ĉe: F.Pytloun del. de UEA Podebrady, Husova 6. Ĉeĥoslovakio.

\*Dez. kor. kun esp-istoj de Ĉinio, Vjetnamio, Japanio por interŝ. pk. k. pm. Leduc Paul, 35 Ave. N.D. du Lac, Angers (M et L), Francio.

\*Fervojista Fakgrupo dez. kor. kun s-anoj el ĉ.l., interŝ. gazetojn, esperantaĵojn, ktp. Respondo garantiita. Adr: Kiskunhalas, Mau, Hungario.

\*H. Liebelt, Magdelsteu Vo. 91, -69-Jena, DDR. Dez. kor. pri ĉ.t. el ĉ.l.

\*F-ino Wanda Janina Knobloch, inĝenierino pri nutraĵ-industrio, 27-jara dez. kor. kun ĉ.l. pri turismo, lit. kulturo, arto; interŝ. pm. albumojn kaj prospektojn, ktp. Adr: Wroclaw, str. Stalowa 73/9, Pollando.

\*Ĉeĥa esp-ista familio dez. kor. kun ĉ.l. k. interŝ. pk., fotojn, alometetiketojn, insignojn, esp. gazetojn, pm., ktp. Adr: Otakar Halas, Brno 16, P.O. Kesto 3, ĈSSR.


\*Armando Angel Sedenio, Lernanto, 15-j., interŝ. bk. pm. kaj ideoj. Adr: Agramonte 30, Florida, Camaguey, Kubo.

\*Ladis Lopez Herrera, 25-j. aguilera-226, Florida, Camaguey, Kubo, interŝ. revuojn, diskojn, ktp.

\*Gordon Kinder, instruisto, dez. kor. kun iu el Rusio, Balkanlandoj. Adr: 25, Princes Drive., SALE, Anglujo.

\*Basile Giovanni, dez. kor. kun s-anoj de ĉ. l. kaj interŝ. pm. Adr: via Acrone 16, Agrigento, sicilio-Italio.

\*VERDA LIRO petas muzikemajn gesanojn sendi per registritaj leteroj aktualajn adresojn kaj divers-specajn muzikkontribuaĵojn al la fondinto de klubo AMIKA SERVO, mag. fil. Mieczislav ZGORZERWSKI, lit. publicisto, WROCLAW 2, Skrytka pocztowa 22, Pollando. La interesuloj ricevos informleterojn pri jam eldonitaj memorig-muzikkartoj kontraŭ tri int. poŝt-resp.-kup. aŭ egalvaloro en neuzitaj memorig-poŝtmarkoj de siaj landoj.



## Leteroj el Ĉinio

Anna Louise Strong

En tiu ĉi libro kolektiĝis 27 leteroj pri Ĉinio, skribitaj de la fama usona ĵurnalistino kaj ŝiaj geamikoj dum la periodo de sept. 1962 ĝis jul. 1963. El tiuj ĉi leteroj, la legantoj povas informiĝi pri la vera situacio en Ĉinio dum tiu periodo.

Formato: 13×18.5 cm. 118 p.

Eldonis: Novmonda Eldonejo

Prezo: Rb. 0.41, £ 0-3-3, C\$ 0.45, Gld. 1.65



## Modernaj Lignogravuraĵoj de Ĉinio

Post la apero de la albumoj *Pejzaĝoj de Ĉinio*, *Moderna Pekino*, *El Ĉina Fotografia Arto*, jen eldoniĝas pli altvalora arta albumo, kiu ĝisdate spegulas la atingojn de la lignogravura arto de Ĉinio en la lastaj jaroj. La 81 diversskolaj lignogravuraĵoj en tiu ĉi kolekto temas pri la diversaj flankoj de la vivo de la laboranta popolo. 56 el ili estas presitaj en koloroj.

Formato: 23×25.7 cm. 92 p.

Eldonis: Ĉina Esperanto-Ligo

Prezo: Rb. 1.14, £ 0-9-0, C\$ 1.25, Gld. 4.55



## La Varma Sudo kaj Frosta Nordo

Tiu ĉi kolora bildolibro por infanoj prezentas al la legantoj la vastan, belan kaj riĉan Ĉinion tra interparolo de du infanoj. La bildoj ĉarmas per sia freŝa stilo kaj la teksto plaĉas per siaj simplaj kaj fluaj versoj.

Formato: 14.2×18.5 cm. 20 p.

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo

Prezo: Rb. 0.09, £ 0-0-9, C\$ 0.10, Gld. 0.40

Mendu ĉe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo (P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio) aŭ ĝiaj perantoj en diversaj landoj



人民中國報道

Dumonata gazeto eldonata de  
ĈINA ESPERANTO-LIGO  
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 2 (97) 1966

## Ĉefa Enhavo

Sur la kovrilo — Kuracisto Vang  
Junĝaŭ akirinta novajn sukcesojn  
en la esplorado de ostaj malsanoj  
(detalon legu sur p. 113)

Foto de Di Hianghua

La Spirito de Daking

Prezidanto Maŭ, Ni Diversnaciaj  
Popoloj Varme Amas Vin!

La Usona Popolo Vekiĝis

Por la Kamparo kaj Kampanoj  
En la Gaŭbejdiana Popolkomunumo  
Himno al Revolucia Juneco

Kantoj kaj Dancoj al la Kampanoj  
Ĵujĝin — La Unua Ruĝa Ĉefurbo  
de Ĉinio

La Suĝoŭ-a Brodarto (*bildpaĝoj*)

Alilandaj Studentoj en Pekino

Transformiĝado de la Ĉina Skribo-  
lingvo

Amatora Lignogravura Grupo de  
Kampanoj

La Marioneta Teatraĵo de Kĵuan-  
ĝoŭ

La Ĉina Granda Muro sur la Monto  
Badaling

Inspektisto de Elektrolinio (*novelo*)

Kontraŭ Pirato Efikas Nur Rebato  
(*bildpaĝoj*)

Sur la dorskovrilo — Forsta Zono

Foto de Huang Taiŭpeng


# La Varmobanejo de Conghua

Fotoj de He Ŝijaŭ




Novaj Domoj en Verdajoj

La Nove Konstruita Akvorezervejo de Liuhi-rivero



Ŝvebanta Ĉielarko — Unu el la Tri Akvofaloj en la Ĉirkaŭaĵo de la Varmobanejo



Angulo de la Sanatorio

La varmobanejo de Conghua ĉe Liuhi-rivero en Guangdong-provinco estas fama sanigejo kaj pitoreskejo alloga por turistoj. Post la Liberiĝo, multe da novaj konstruaĵoj kaj ekipaĵoj por turisma aktivado kaj sanigado aldoniĝis tie konforme al la bezonoj de la laborantaj popoloj, kaj tio multe plibeligis la lokon.

